

Albana Esperanto-Asocio estas jure agnoskita laŭ decido nr 3503 dato 15/02/2013 de la Juĝejo de Tirana

Retpaĝo: <http://esperantoshqipria.weebly.com/index.html>

aŭ simple: www.esperanto.net/al kaj www.esperanto.net/sq

Por diskuti:

albanaj-esperantistoj@yahoo.com

[Unue aniĝu: albanaj-esperantistoj-subscribe@yahoo.com](mailto:Unue_aniĝu:_albanaj-esperantistoj-subscribe@yahoo.com)

BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO INSTITUTO

Nr. 110, decembro 2013

Nia sentenco: *"Se vi efektive estas regata de nobla idealo, forgesu viajn defalintan amikon, forkurintan edzinon, sendankan kamaradon kaj nekompreneman fraton. Ili ĉiuj estas lernantoj kaj preterpasantoj, kiel vi mem... Gravaj ja estas la intensigo de la lumo, la progreso de la vero kaj la venko de la bono."* -

Andreo Ludoviko (de la libro "Kristana Agendo", psikografiita de Chico Xavier, eldono FEB).

Adreso de redakcio: p/a Bardhyl Selimi, Rr. Fortuzi 9/1/3 Tirana 1016 Albanio (00355682580758; bselimi@gmail.com)

Kunlaborantoj: Shaban Hasani 00355682080677, shabanhasani@gmail.com; Gjergji Gusho: 0035583222326, gjergji_gusho@yahoo.com; Agim Peraj: (00355694472430, agimperaj@yahoo.it; Sajmir Beqiraj: (00355684030613, s_beqiraj@yahoo.com; Nehat Sokoli: 00355682587699, nehatsokoli@gmail.com; Engjell Gusho: 00355692350111, engjellgusho@yahoo.fr; Rita Permeti: 0035542363 360; 00355686857800 ; Luan Jaupi: 00355682165870, luanjaupi@hotmail.com; Enkela Xhamaj: 00355685135105, xhamajkl@yahoo.com;

La enhavo

Ni kaj ILEI, AIS, UEA

Ĉefdelegito por Albanio

Kotizpago al UEA

Aktivula maturigo

Raporto de Tatjana Loskutova

Vizito de estraranino de TEJO

Klopodoj por establi nian retpaĝon

Nova esperantista studenta grupeto "AGLETOJ"

UEA: aktivula maturado

Rekomendo de la Akademio pri la uzo de propraj nomoj

"Agletoj" nova esperantista studenta grupeto

Klopodoj por establi nian retpaĝon

La nova albana esperanta ŝlosilo

Korespondo de gejunuloj

El la leteroj

Evandro, Robert, David, Mara, Alicja, Templo de la Bona Volo, ka

Nia propagando

Nova informilo pri Esperanto en la albana

Esperanto estas adoptita kiel unu el la laborlingvoj de "Monda Unio de Bonpo".

Ĉu Filipinoj pretas por lerni Esperanton

Kiosko-propagandisto

Esperanto en elementa lernejo

Natura simbiozo

Kiel verki en facila Esperanto

Artikoloj- eseoj- politiko

Analiza novajxletero

Sikullando

Tago de Homaj Rajtoj

Stato de la ŝtatoj de la eksa Jugoslavio

Beletraĵoj

Albana beletro

Besnik Mustafaj- La rezervita kajero

Fatos Lubonja: La maro

Fatos Kongoli: La Perdinto

Ismail Kadare: la filino de Agamemnono

Anekdotoj el la urbo Shkoder

Ni funebras

Forpasis nia franca esperantisto Pol Dennis

Anoncoj

Konkurso pri desegnajxo

Nova ĉefredaktoro de la revuo Esperanto

Nova direktoro en la Muzeo de Vieno pri planlingvoj

Korespondamikoj el Kongo

Aktivecoj en Herzberg

Nova retkurso ĉe Jagelona universitato

UEA, ILEI, AIS kaj ni

Ĉefdelegito por Albanio

Kara direktoro, espereble vi bonfartas. Mi kunsendas la jam plenigitan formularon rilate la difinon de la ĉefdelegito por Albanio. (Temas pri s-ro Bardhyl Selimi)

Elkoraĵo dankon al vi,

altestime

Shaban Hasani, la prezidanto

Tirana, la 2-an de decembro 2013

Kotizpagoj al UEA

Tre estimata s-ro direktoro,

nia estraro jam diskutis pri la kotizpago al UEA. Prikonsiderante la enlandan individuan jaran kotizon kiu estas 500 albanaj Lekoj, egale al 5 USD, ni decidis pagi al UEA je 1 USD por ĉiu individua membro. Do, por .12 aktivaj membroj, pagantaj regule la kotizon, ni dividos por UEA.12 USD, kiuj, konvertite en eŭroj, estas 9 eŭroj eŭroj.

La menciitan monsumon bv retiri el nia konto ĉe UEA (konto malfermita de Eŭropa Komisiono de UEA por Albanio). Bv anonci nin pri la elpago.

Dankon,

amike

Shaban Hasani, la prezidanto de la Albana Esperanto- Asocio

Tirana, la 2-an de decembro, 2013

Raporto pri Albanio de Tatjana Loskutova

Aŭguste 2013 laŭ komisio de EK de UEA mi entreprenis vojaĝon al Balkanio. Pro tio, ke planita en aŭgusto E-kurso en Skopje estis nuligita (poste evidentiĝis, ke oni planis ĝin en la dua duono de la monato), mi lanĉis korespondadon kun albanaj UEA-delegitoj pri ebla organizo de E-kurso en Tirana. Post certa tempo evidentiĝis, ke albanoj ne sukcesos dum kurta tempo varbi dezirantojn por lerni Esperanton. Tamen, ili pretis organizi mian priesperantan prelegon. Tiun eblecon disponigis la Nacia Biblioteko de Tirana, kiu prenis sur sin respondecon pri kunvenigo de aŭskultantoj en sia sino. Ĝia vicestrino, i.a. parolanta la francan, ankaŭ zorgis pri invito de ĵurnalistoj de unu el lokaj televidkanaloj. Tial, antaŭ starto al Balkanio, mi komencis pretigi prelegon en formo de PowerPoint-prezentado. En la prelego aperis diversaj informoj ligitaj al E-lingvo kaj movado, ĝiaj organizaĵoj kaj kongresoj, originala kaj tradukita E-literaturo, disvastigo de la internacia lingvo tra la mondo kaj, precipe, en Balkanio ktp. Aparte, sed skize, estis menciita ankaŭ E-movado en Albanio. Por la prelego estu pli komprenata de albanoj Bardhyl Selimi, la sekretario de Albana E-Ligo (nun E-Asocio), helpis traduki certajn frazojn al Esperanto, kiujn mi enmetis en la prezentadon. La prelego okazis la 2an de aŭgusto kaj daŭris 80 minutojn. Ĝin interpretis B.Selimi kaj filmis la ĉefurba televidkanalo ABC News. Fine de la prelego por kompletigi E-fakon de la Nacia Biblioteko mi enmanigis al la vicestrino la libron de A.Puŝkin «Elektitaj verkoj», eldonitan en Rusio.

Post la prelego B.Selimi kaj mi estis intervjuitaj. En la halo de la biblioteko estis prezentitaj kelkaj libroj (oni vidas ilin en televidraportaĵo) de albanaj verkistoj, tradukitaj al Esperanto de B.Selimi (en redaktado/korektado de Tomasz Chmielik, Pollando). Samtage la menciita televidkanalo elsendis kelkfoje dum la tago la informon pri okazintaĵo. La 3an de aŭgusto la sama raportaĵo aperis en interreto:

http://www.youtube.com/watch?feature=player_embedded&v=8NsfxU6F1dY#at=11

Antaŭ la prelego mi konatiĝis kun du pliaj albanaj esperantistoj, nuna Prezidanto de Albana E-Asocio s-ro Šaban Hasani kaj aliurbano, Engjell Gusho, kiu speciale alvenis ĉi-tage al Tirana.

Tatjana Loskutova,
UEA-delegito,
Ivanovo, Rusio.

Vizito de fraŭlino Veronika Poor, estraranino de TEJO

Lastan semajnon de novembro vizitis Tirana-n la fraŭlino Veronika Poor, estrarano de TEJO.



Dekstre: Veronika en la strato Mine Peza, Tirana, la 25-an de novembro 2013

Ŝi gastis ĉe la hejmo de s-ro Shaban Hasani tri tagojn. Ĉikaze Veronika vizitis la fakultaton de la naturaj sciencoj kie instruas ankaŭ nia estrarano, s-ro Sajmir Beqiraj. Akompanate de la anoj de la nova esperantista grupeto "Agletoj", ŝi vizitis la nacian historian muzeon, la komercan foiron kaj ĝuis iom la etoson de la albana ĉefurbo je sojlo de festado de Tago de Sendependeco. Ni diskutis kune pri la organizado de la junulara esperantista movado enlande kaj la agnosko far TEJO de la grupeto "Agletoj".

Ili Gërdupi d.v

Rrjeti i Vullnetarëve Shqiptarë (RVSh)

[+355695239156](tel:+355695239156)

[+355673922992](tel:+355673922992)

<http://www.youtube.com/watch?v=1HO0MTIGE7o>

Veronika mem rakontas:

Miaj tri tagoj en la ĉarma ĉefurbo de Albanio

Tirano – urbo de espero

Malfacilas por mi verki pri miaj spertoj en Tirano, mi ne scias kion elekti, ĉu la ĉarmegan gastfamilion, ĉu la zorgan ĉiĉeronadon, ĉu la viziton en la naturscienca fakto de la ŝtata universitato, ĉu la interesajn donacitajn librojn, ĉu la bonetosajn kaj klerigajn babiladojn kun engaĝitaj junuloj. Aŭ mi menciu la manĝojn, la Nacihistorian Muzeon (kaj ekstere kaj ene)? La nura sento kiu certas en mi estas: mi ŝatus reveni al tiu urbo, kie mi ricevis tiom da espero kaj homeco!



Post la surpriza busvojaĝo el Tesaloniko (nia buso alvenis tra la montoj ekzakte kiam la forfuĝintoj de la malliberejo estis serĉataj en la montoj) mi tuj sentis min hejme kiam mia gastiganto, Shaban Hasani diris al mi „Saluton, Veronika!“. Ni babilante iris hejmen, kie mi renkontis mian gastfamilion – tiam mi ne sciis ke tie mi ricevos ege bongustegan matenmanĝon krom la afabla etoso. Sekvonttage tien alvenis Bardhyl Selimi, kiu nuntempe havas plurajn junajn studentojn kaj post interesa babilado kaj prezentado de interesaj libroj, li prezentis la studentojn al mi. Tiel mi konatiĝis kun Anisa kaj Ili, du mirinde talentitaj kaj engaĝitaj junuloj. Mi tre ĝojis ke ili havis tempon por mi, por montri Tiranon, la Nacian Historian Muzeon kaj babili pri kiel la mondo iru. Mi jam sopiregas la babiladojn, la novekonatajn amikojn do mi nur povas diri: espereble ĝis baldaŭ!

Veronika Poór

volontulo de Muzaiko (www.muzaiko.info)

konsiliano de UEA (www.uea.org)

estrarano de TEJO (www.tejo.org)

poorveronika@gmail.com

UEA - AKTIVULA MATURIGO

Ni bezonas kreskantan aron da aktivuloj, kiuj scias kunlabori internacie, malfermaj al novaj ideoj kaj al influoj kaj tendencoj en la granda mondo, pretaj lerni kaj adapti sukcesajn alilokajn projektojn al la propra loka situacio. Estas evidente, ke UEA devas ludi gvidan rolon en la plenumo de tiu celaro.

Esperanto inter lingvoj unikas. La parolkomunumo de naciaj lingvoj renovigas sin mem nature, kaj la lertigo de ties infanoj kaj junuloj okazas nature kaj intense en la familia kaj apuda medio, suplementata plej ofte per establita delonge funkcia kaj financata infrastrukturo. Esperanto havas avantaĝojn pro sia klareco kaj logikeco, sed gravajn malavantaĝojn, ĉar unike ni devas krei kaj maturigi niajn proprajn novajn generaciojn kaj reprodukto-mechanismojn, sen abundaj rimedoj. Kio mankas al ni ĉe rimedoj, ni kompensu per lerteco kaj supleco ĉe niaj agantoj.

Tial ni bezonas koheran kaj ambician planon de Aktivula Maturigo – laŭprononce: AMO. La planata projekt-simbolo videblas apude.

La programon ni nun evoluigas pere de la estrara subteamo MOVADO (kies celdifinon vi trovos en aparta dokumento: MOV-01). Ĝi estos la unua tereno en kiu la centra UEA provas intensigi siajn rilatojn kun siaj Landaj Asocioj (LA), kunlaborante krome kun Fakaj Asocioj (FA), Landaj Sekcioj de TEJO kaj ILEI kaj aliaj.

La programo funkcios pere de serio de seminarioj, laŭ konceptoj detaligitaj en kreata dokumentaro. Ilin logistike kutime prizorgos enlandaj asocioj, sekcioj aŭ E-Centroj; la programa realigo estos unuavice la tasko de UEA

Rekomendo de la Akademio pri la uzo de propraj nomoj

ENKONDUKO

1.1 Ekzistas kaj estas praktike uzataj la jenaj tri sistemoj por trakti la proprajn nomojn en Esperanto: a) Plena esperantigo, jam tradicie uzata por multaj gravaj geografiaj nomoj (ekzemple *Afriko*, *Nov-Jorko*, *Bulonjo-ĉe-Mar*, *Rejno*, *Himalajo*) kaj por historie gravaj personoj (ekzemple *Konfuceo*, *Julio Cezaro*, *Ŝekspiro*). Plene esperantigitan propran nomon karakterizas kelkaj nepraj trajtoj:

1) Ĝia parola formo uzas nur la 28 Esperantajn sonojn, kiuj en ĝia skriba formo estas reprezentataj de la respektivaj Esperantaj literoj;

2) La nomo havas la finaĵon¹ "-o" (kio estas nepra por ĉiuj Esperantaj substantivoj).²

3) Ĉe elparolo de la nomo oni sekvas la akcentajn regulojn de Esperanto.

Krome, en plenaj esperantigoj oni emas eviti sonkombinojn nekutimajn por Esperanto.

b) Parta esperantigo, kiun karakterizas la uzado de Esperantaj literoj prononcataj laŭ la reguloj de Esperanto, sed eventuale kun alia akcentado ol en Esperanta vorto (ekzemple *Zamenhof*, *Gamal Abdel Naser* kaj *Ban Ki-mun*).

c) Uzo de la originala skribo de la propra nomo (tradicie uzata nur se la originala nomo estas skribata per latinalfabetaj literoj, ekzemple *Kálmán Kalocsay*) aŭ iu pli-malpli akceptita sistemeca latinliterigo de la propraj nomoj, originale skribataj per alia skribosistemo (ekzemple ĉinaj propraj nomoj en pinjina transskribo, kiel *Dèng Xiǎopíng*).

1.2 Aldone, esperantigo (ĉu plena aŭ parta) povas en tri malsamaj manieroj baziĝi sur alilingvaj versioj³ de la nomo:

a) Ĝi povas baziĝi sur la origina prononco de la nomo, ekzemple *Ŝekspiro* kaj *Budapeŝto*.

b) Ĝi povas baziĝi sur la origina skribo de la nomo, ekzemple *Londono* kaj *Freŭdo*.

c) Ĝi povas baziĝi sur la origina signifo de la nomo, ekzemple *Nigra Maro* kaj *Bonaero*.

Ofte estas uzata kompromiso inter du aŭ tri el ĉi tiuj esperantigo-manieroj, ekzemple *Alzaco* (bazita sur originaj skribo kaj prononco), *Santiago de Ĉilio* (bazita sur originaj skribo kaj signifo) kaj *Nov-Jorko* (bazita sur originaj signifo kaj prononco).

LA AKADEMIO KONSTATAS, KE:

2.1 Ĉiu el la tri sistemoj menciitaj sub 1.1 havas siajn proprajn relativajn avantaĝojn kaj malavantaĝojn:

a) Plena esperantigo pli bone konformas al la spirito de la lingvo, estas facile uzebla parole, ebligas tujan kaj klaran derivadon kaj estas egale oportuna rilate al ĉiuj lingvoj kaj skribosistemoj. Tamen ĝi povas malfaciligi la rekonon de la esperantigita propra nomo; krome, ne ĉiam estas facile elekti la plej taŭgan plene Esperantan formon (ofte pri tio decidas nur la lingva tradicio).

b) Parta esperantigo ebligas facilan legon kaj elparolon de la nomo (se ne atenti pri la akcento, kies pozicio estas neniel indikita), sed manko de la Esperanta finaĵo ne ebligas al la propra nomo iĝi normala Esperanta vorto. Ĉi tiu sistemo estas uzata precipe por la lingvoj kaj skribosistemoj, kiuj uzas alfabeton alian, ol la latinan (kaj ties variaĵojn).

c) Uzo de la originalaj latinliteraj propraj nomoj ofte (sed ne ĉiam) ebligas facilan rekonon de la koncerna vorto en la skriba formo (precipe por tiuj, kies gepatra lingvo uzas variaĵon de la latina alfabeto), sed malebligas facilan derivadon kaj povas kaŭzi multajn problemojn kaj miskomprenojn ĉe la bezono pri ĝia parola uzo.

2.2 Pro la supre prezentitaj konsideroj nun ne eblas rekomendi unu solan ĉiam uzindan manieron trakti diversajn proprajn nomojn en Esperanto.

LA AKADEMIO REKOMENDAS:

3.1 Elektante kaj uzante iun el la prezentitaj sistemoj (depende de la bezonataj celoj en diversaj situacioj) oni ĉiam konsideru kaj pesu la eventualajn

avantaĝojn kaj malavantaĝojn, kiujn povas kaŭzi la uzo de ĉiu sistemo en ĉiu konkreta okazo.

3.2 Indas plu flegi kaj subteni la kutimon plene esperantigi ofte uzatajn proprajn nomojn, precipe kiam temas pri:

a) Ofte bezonataj kaj menciataj aferoj (ekzemple la komputil-rilataj nomoj *Vindozo*, *Linukso*, *Guglo*).

b) La propraj nomoj vaste konataj (ekzemple grandaj urboj aŭ aliaj geografiaĵoj; nomoj de eminentaj historiaj personoj, ekzemple *Komenio*, *Voltero*, *Ejnŝtejno*, *Baĥo*) aŭ ĉiuj ajn nomoj, por kiuj oni bezonas la eblon de facila derivado (ĉefe en scienco, ekzemple *Galvano* – galvanismo, *Koŝio* – koŝia vico).

c) La propraj nomoj ofte ripetataj en iu sama teksto (ekzemple la nomo de la ĉefobjekto en iu granda informa teksto aŭ la nomoj de la ĉefaj personoj de iu beletra verko; ekzemple *sinjoro Tadeo*).

3.3 Dum mankas ĝenerale akceptitaj principoj pri esperantigo de diverslingvaj propraj nomoj, ĉe eventuala esperantigo estas rekomendate sekvi la modelojn de la jam tradiciiĝintaj ekzemploj: interalie, ne ĉiam sufiĉas rekte transskribi la originalan elparolon per la Esperantaj literoj, aŭ simple kopii la skriban formon aldonante al ĝi la finaĵon "-o"; necesas zorgi, ke la rezulto estu ekvilibra rilate la prononcon, skribon, kaj laŭeble facilan rekoneblon. Traduki nomojn aŭ nompartojn eblas en ĉiuj okazoj, kiam la nomo aŭ nomparto havas travideblan signifon en sia origina formo; tamen tia tradukado estas klare preferinda al prononca-skriba adapto nur kiam temas pri nomoj, kies diverslingvaj versioj similas inter si pli laŭ la signifo ol laŭ la prononco kaj skribo (kiel ĉe *Nigra Maro*).

3.4 Krome, oni konsideru la fonetikajn apartaĵojn de Esperanto: la esperantigo ne entenu silabe elparolendajn konsonantojn (kiel la "r" en *Brno*⁴), kaj prefere oni evitu nekutimajn sonkombinojn, precipe se por multaj Esperanto-parolantoj estas malfacile prononce distingi ilin de iuj pli kutimaj sonkombinoj (kiel la "rŭ" en *Rŭando*⁵ aŭ la "ngk" en *Hongkongo*⁶, kiujn multaj prononcus same kiel "ru" kaj "nk").

3.5 Kiam temas pri relative novaj aŭ malmulte konataj esperantigoj (tamen nepre bezonataj en iu konkreta okazo pro la supre prezentitaj konsideroj), oni laŭeble menciui la originalan formon de la nomo parenteze aŭ piednote por eviti miskomprenon.

3.6 La neesperantigitajn proprajn nomojn laŭeble akompanu prononc-indiko konforma al la jenaj postuloj:

a) La prononc-indiko estu prezentita tuj ĉe la unua apero de la propra nomo inter rektaj aŭ rondaj krampoj per minusklaj literoj.

b) La prononc-indiko principe uzu nur la Esperantajn literojn (en la okazo de manko de ĝusta Esperanta sono responda al la alilingva oni prezentu la plej proksiman Esperantan sonon, eĉ se tiel oni nur proksimume transdonas la originalan prononcon kaj perdas iujn informojn).

c) Por indiki la akcenton oni prefere uzu la dekstran tipografian kornon super la akcentata vokalo (tio estas la modelo prezentita en la Fundamento), ekzemple [gastón varengjén]; en la okazoj, kiam ĝia uzo prezentas malfacilaĵon, oni prezentu la akcentatan vokalon majuskle (ekzemple [gastOn varengjEn]).

Rimarko 3.6.1. Kiam tio povas esti utila, precipe en fakaj aŭ enciklopediecaj tekstoj, oni povas libere prezenti diverslingvajn proprajn nomojn ankaŭ en la origina formo, eĉ se ili uzas nelatinliteran skribon. Okaze de nelatinlitera skribo estas tamen dezirinde provizi ilin ankaŭ per latinlitera formo (plene aŭ parte esperantigita) aŭ per prononc-indiko.

Rimarko 3.6.2. En specialaj okazoj, kiam la prezento de ĝusta prononco estas aparte grava, oni povas prezenti ankaŭ aliformajn prononc-indikojn (ekzemple per la uzo de la Internacia Fonetika Alfabeto aŭ iuj aldonaj tipografiaj signoj kaj rimedoj), tamen oni konsciui, ke la sola sistemo egale komprenebla por ĉiuj esperantistoj estas la uzo de la Esperantaj literoj.

3.7 Ĉiu esperantisto povas mem decidi kiuforme uzi sian nomon en la Esperanta medio. Sed oni konsciui, ke formo, kiu ne estas almenaŭ parte esperantigita, ĉiam estos konsiderata kiel fremdaĵo en Esperanta teksto kaj povas esti misprononcita aŭ iel misformita okaze de kopiado aŭ alia reuzo de tiu nomo.

4. Ĉi tiu rekomendo plene anstataŭas la antaŭajn Rekomendojn pri propraj nomoj de la Akademio de Esperanto de la jaro 1989 (el la Aktoj de la Akademio III, 1975 – 1991, Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto, n-ro 11). Tiuj antaŭaj rekomendoj do perdas sian statuson de validaj rekomendoj de la Akademio de Esperanto.

Kromdeklaro pri la nomoj Zamenhof kaj Vaŝington

La Akademio de Esperanto, lige kun sia esploro pri la skribado de diversgrade esperantigitaj propraj nomoj, rekonsideris rimarkon IV en la Oka Oficiala Aldono al la Universala Vortaro. La rimarko aperis en sekcio I(B) de la Aldono:

“B) 2 propraj nomoj

Paŭl/o

Zamenhof

RIM.IV. La nomo *Zamenhof* komence estis uzata kun apostrofo (ekzemple en la “Unua Libro”); en la Fundamento (fine de la Antaŭparolo) ĝi aperas sen apostrofo, tiel same kiel la virnomo *Vaŝington* (12, 19). Dume oni trovas en la U.V., ĉe *an/*, la urbonomon *Nov-Jork* sen apostrofo, sed en la ekzercaro (37, L. 1) troviĝas *Nov-Jorko*, kie ne povas temi pri preseraro. Fakte temas pri neesprimita licenco al la 16a Regulo pri apostrofado de substantivoj, licenco, laŭ kiu ĉe propraj nomoj povas esti forlasata ne nur la finaĵo de l’ substantivo, sed ankaŭ la apostrofo mem.”

(Fonto: *Aktoj de la Akademio II, 1968-1974*, p. 12.)

La Akademio ĉi-pere nuligas tiun licencan interpreton de la apero de senapostrofaj *Zamenhof* kaj *Vaŝington* en la Fundamento kaj konstatas, ke tiuj nomformoj estas rigardendaj kiel nur parte esperantigitaj.

La estraro de la Akademio de Esperanto kaj la direktoro de la Sekcio pri Prononco: Christer Kiselman, prezidanto; Brian Moon, vicprezidanto; Probal Dasgupta, vicprezidanto kaj direktoro de la Sekcio pri Prononco; Renato Corsetti, sekretario.

1Notu ke kiam finaĵo aldoniĝas al iu vortobazo en Esperanto, tiu vortobazo ĉiam devas havi almenaŭ unu silabon. Tial, ekzemple, oni konsideru la nomon *Bo* ne plena esperantigo, sed nur parta esperantigo.

2Ĉi tiu regulo ne validas por citaĵecaj nomoj, ekzemple la nomo de la komedio *Kiel plaĉas al vi* de Ŝekspiro. Sub ĉi tiun fenomenon de citaĵecaj nomoj oni ankaŭ klasigu la uzon de nesubstantivaj Esperantaj vortoj kiel propraj nomoj, ekzemple la nomojn *Amplifiki* kaj *Kore* de Esperantaj muzikgrupoj. Tiaj citaĵecaj nomoj eĉ povas enteni skribsignojn kutime ne renkontatajn ene de vortoj; ekzemplo estas la krisigno en la nomo *lernu!*.

3La esperantigo povas baziĝi ne nur sur la origina lingvo de la nomo aŭ (ĉe geografiaj nomoj) sur la lingvo parolata en la nomata loko, sed sur diverslingvaj formoj: ekzemple, la Esperanta nomo *Kopenhago* de la dana ĉefurbo baziĝas ne sur ĝia dana nomo *København* [kebmháŭn], sed sur ĝiaj nomoj en multaj aliaj eŭropaj lingvoj.

4Preferinda povus esti la formo *Bruno* laŭ la germana kaj latina nomoj de tiu urbo (temas pri la dua plej granda urbo de Ĉeĥujo).

5Preferinda estas la formo *Ruando* (temas pri la afrika ŝtato).

6Preferinda estas la formo *Honkongo* (temas pri speciala administra parto de Ĉinujo).

"Agletoj" - nova albana esperantista studenta grupo

Laŭiniciate de kelkaj gestudentoj kaj interkonsentite kun la Albana Esperanto-Asocio, je 17-an de oktobro fondiĝis la nova albana esperantista studenta grupo. Ĝi portas la nomon "Agletoj" laŭ la simbolo de la albana standardo kaj la nomo per kiu albanoj vokas sin, "la idoj de la aglino".

La iamaj du junularaj esperantistaj grupoj fonditaj kaj agintaj ekde la jaro 1991, plejverŝajne, ne plu aktivis. Nia grupo celas pluteni vigla la junularan albanan esperantistan agadon. Ni esperas ke baldaŭ aliĝos la grupon pluraj aliaj studentoj kun kiuj ni estas laborante serioze.

Ni kunlaboros kun TEJO organizaĵo kaj aliaj esperantistaj fremdaj grupoj en la mondo.

La provizora estraro estas:

Prezidanto Ili Gerdupi

retadreso iligerdupi@yahoo.com

portebla telefono 00355695239156

Sekretario Anisa Gjini,

retadreso nsgjini@gmail.com

portebla telefono 00355692844259

Kasisto Ada Tafaj

retadreso ada.tafaj@hotmail.com

portebla telefono 00355698310276

Informis: Rita Permeti

Tirana, je 18-an de oktobro, 2013

Klopodoj por establi nian retpaĝon

Profesoro Renato Corsetti, (Renato Corsetti <renato.corsetti@esperanto.org>) delonge subtenanto kaj helpanto de movadoj ankoraŭ malfortaj, lastatempe entreprenis laboron por establi nian retpaĝon. Tiucele, li aktivigis kelkajn fremdajn fakulojn. (Martin Schäffer <esperantst@gmail.com>, Ralph Schmeits <ralph@co.uea.org>, Stano Marček <stano.marcek@gmail.com>, Aurora Bute <a_bute@yahoo.com>)

Jen parto de lia korespondo:

- Geestimataj,
Jes ĉio eblas. Mi ĝisdatigos la albanan paĝaron. Mi skribos ankoraŭ aparte al s-ro Selimi por detaloj pri la albanaj ligiloj.
Mallongan retadreson mi kreos, sed por tio mi eble bezonos interkonsenton kun

Paskalo aŭ Andrejo, mi informos al vi kiam tio estos preta.
Espereble ĉi-vespere mi povos fintrakti la ĝisdatigon.
Amike,
Ralph

- Ralph, fakte estus grave ke aperu la retpaĝo, sed por la informilo eĉ pli grava estas, ke ekzistu iu mallonga adreso, kiu redirektu al tiu adreso.
Tio povas esti ekzemple: www.esperanto.net/al <<http://www.esperanto.net/al>>
aŭ www.esperanto.net/sq <<http://www.esperanto.net/sq>>
kiu redirektu al: <http://esperantoshqipria.weebly.com/index.html>
Ĉu vi tion povas aranĝi?
- Rilate al la paĝo mem, ni interkonsente kun la albanoj kaj Renato, devus eventuale enmeti aliajn tekstojn en http://esperanto.net/info/index_sq.html. Renato, ĉu la praga manifesto ne ankaŭ ekzistas en la albana?
Amike, Martin
- Kara Ralph, laŭ informoj vi estas la nuna zorganto de la pagharo www.esperanto.net <<http://www.esperanto.net>>.
Mi kun Martin Schäffer kaj Stano Marcek provas realigi ideon de Martin produkti informileton en la albana (kaj en aliaj lingvoj). Ni havas unu problemon pro kiu ni bezonas vian helpon. En la ĉefa pagho de www.esperanto.net <<http://www.esperanto.net>>, sub "sq: Gjuha shqipe" vi devus aranĝi, ke la unua linio kiu aperus estu <http://esperantoshqipria.weebly.com/index.html> kiu estas la nuna adreso de la konstruataj ret-paghoj de la albana ligo.
Ĉu vi povas aranĝi tion?
Dankon, nome de la albanaj esperantistoj.
Amike
Renato
- Saluton Ralph, Saluton Stano, bonege, nun la plej bona paĝo por la informilo do estas www.esperanto.net/al

Homoj, kiuj vizitas tiun adreson tuj estas plusenditaj al la adreso ĉe Weebly. Se poste Albana Esperanto-Ligo havus alian adreson oni nur devus ŝanĝi ĉe www.esperanto.net/al al plusendilon kaj la informilo daŭre restus uzebla.

Perfekte,

Dankon al ĉiuj kontribuantoj.

Amike, Martin

- Estimataj,

La albana parto de esperanto.net estas ĝisdatigita.

Krome mi kreis aŭtomatan plusendilon el la adreso esperanto.net/al al la albana esperanto-retejo kiun vi povas uzi por publikigo. (cetere funkcias nun ankaŭ esperanto.net/sq kiu iras al la albana parto de esperanto.net).

De s-ro Selimi mi atendas ankoraŭ tradukon por "Naciaj Esperanto-organizoj, Internaciaj Esperanto-organizoj, Universala Esperanto-Asocio ktp.

Mi ĝojas ke aperos informilo en la albana! Ĉu poste biblioteko Hodler povus ricevi ekzempleron? Eventuale pdf-an.

Antaŭdankon,

salutas

Ralph

Korespondo de gejunuloj- konsilioj

Karaj instruistoj, kiel vi fartas? kiel progresas via kurso?

Se vi ankoraŭ ne faris, bonvolu prezenti vian grupon.

Lasu min doni al vi kelkajn ideojn kion kiel uzi la grupan

korespondadon ene de la instruado: Oni povas peti la lernantojn verki tekstojn pri siaj landoj, kulturoj au diversaj temoj, kiuj iel ligiĝas al la lernataj temoj, ekz festoj, sportoj, hobiaj... ktp. La lernantoj povas verki tiujn tekstojn kune (dum au ekster la kurso) au individue (kiel hejmtaskon eble). Tion decidu ĉiu instruisto konante la grupon. La ideo estus sendi tiujn verkajxojn regule al la korespondpartneroj, demandi ilin pri iliaj ideoj, kutimoj, opinioj pri diversaj temoj, tiel ili povas interkonatiĝi, ekkoni aliajn kulturojn. Mi ofte spertas kun la lernantoj ke ili tute ne estas motivitaj verki tekstojn pri bazaj temoj, ĉar ili ne vidas la sencon prezenti al mi (kiu korektos la tekston) ion, kion mi jam verŝajne

konas, scias. Estas multe pli amuze vere korespondi kun aliaj personoj.

Kompreneble tiu ĉi estas nur unu ideo, vi povas inventi kion ajn.

Ĉu aliaj instruistoj havas aliajn ideoj?

Kore, Petra

La nova albana esperanta ŝlosilo

Ankaŭ por la nova albana esperanta ŝlosilo prof. Renato laborigis siajn amikoj. Jen korespondo rilate tion:

- Bardhyl Selimi tradukis al la albana la novan ŝlosilon laŭ la nederlanda versio kaj nun la tuta dosiero pretas. Ionel informas min, ke vi havas la originalan dosieron de la kovrilo de Saska Idzerda sen teksto. Ĉu vi povus komposti por ni la kovrilon, se ni sendus al vi la tekston? Mi kredas, ke ni mem povus komposti la ceteron. Kion vi pensas? Mi respondis ke mi povos ne nur la kovrilon sed ankaŭ la internan tekston komposti, kaj Bardhyl sendis tiun ĉi, ankaŭ duan fojon post revizio petita de mi. Mi iom prilaboris la koncernan Word-dosieron kaj sendis la novan version al Nikola, kiu estis dirinta ke li havas albanlingvan kolegon kiu povus fliki la tekston. Montrighis ke tiu kolego ne havis sufiche da tempo au emo por fari la pluan revizion, sed Nikola diris ke li faros. Nikola shajne ne faris ghis lastatempe, kiam mi estis en Italio/ujo kaj Bruchjo informis min, je mia granda miro, ke Edistudio jam eldonis albanan shlosilon en 1980. Li nun estas sendinta al la UEA-Libroservo kelkajn ekzemplerojn, che kiuj ni rimarkas ke ghi aperis en eldono de 3000 ekzempleroj, multaj el kiuj shajne ankoraŭ ekzistas kaj vendeblas. Kun tiu ĉi surpriza informo, mia impresio estas ke nova shlosilo fine ne estos produktita, dum restas disponebla stoko de la malnova. Mi bedaŭras do ne esti finlaborinta la

novan shlosilon lau mia plano/intenco, kaj mi bedauras se Bardhyl estas perdinta tempon laborinte super neeldonota (au ne tuj eldonota) verko. Sed ja ne shajnas ke mi faros, pro la supre indikita kialo, char la lasta revizio ne estas farita, kaj char mia emeritigho okazos post malpli ol du monatoj. Amike, Roy

- *Mi iom prilaboris la koncernan Word-dosieron*

Bone. Ne detruu tiun dosieron, sed bonvolu sendi ĝin al mi kaj Bardhyl.

|Edistudio jam eldonis albanan shlosilon en 1980.

Neniu konsciis pri tio. Bonvolu sendi al mi unu ekzempleron de tiu versio, kiam ĝi atingas la oficejon.

Amike Renato

Kiel verki en facila Esperanto

Vidu sur youtube lekcion tre interesan rilate la temon.

<http://www.youtube.com/watch?v=ŜzJfyN-CFo>

Tonin Çobani

Artikoloj- Eseoj- Politiko

Analiza novaĵletero

de la Veromovado de Berkshire kaj la grupo 'Keep Talking', Britio, por septembro 2013 (2013-10-05 – esperanta versio 2013-10-11)

(Fragmentoj)

* Post Sirio: malvolviĝas la propaganda rakonto

Mia kunorganizanto de la grupo Keep Talking, Nick Kollerstrom, intervjuiĝis en la retejo de Kent Freedom Movement [Libero-Movado de Kent] okaze de la dek-dua datreveno de 9-11, en kiu li metis la sirian

krizon en kuntekston de la Milito kontraŭ Terorismon (<http://kentfreedommovement.com/video/kent-freedom-movement-with-nick-kollerstrom-on-9-11-and-the>). La nunaj invadoj sekvas de raporto de 'Project for a New American Century' [Projekto por Nova Usona Jarcento], kaj kompreneble la rusoj certe estas plene konsciaj pri tiaj dokumentoj.

"Mi opinias, ke la ege grava afero pri tiu ĉi fabrikita teror-evento estas, ke ĝenerale ĝi ne estas kredata de la plimulto de la mondo. ... Nun la tuto komencas malvolviĝi ... Mi opinias, ke tiu estas la vera signifo de tiu ĉi dek-dua datrevena momente en la historio: La rakonto malvolviĝas. Kiam la rakonto komencis malvolviĝi? Ĉe la rakonto pri la bostona bombado, kiam subite ... ĉirkaŭ duono de la usona popolo ne kredas la oficialan rakonton, kaj eĉ Fox News diras: Ĉu FBI [la federacia polico] faris tion? Ĉu ili starigis ĝin? ... sed ĝenerale tio ne eŝiĝas en tiu ĉi lando", Nick klarigis.

Pri Sirio, Nick diris, ke ni ne vidis tian ĝisrandan politikon de post eble la Kuba Misilo-Krizo. Mi opinias, ke estas multe pli malbone ol tio. Almenaŭ en la Kuba Misilo-Krizo ni havis raciajn homojn kiuj gvidas ambaŭflanke, kaj ili ambaŭ volis eviti militon; tion ni ne vidas nun. Ĉe de la anglo-usona flanko ni havas politikistojn kiuj aŭ fanatikas por milito, aŭ estas nuraj marionetoj de tiuj kiuj fanatikas por militoj. "AIPAC [La Uson-Israela Komitato de Publikaj Aferoj] amasskale kampanjas por milito", Nick diris, " – ĵus konstatante kian teruran eraron ili faris. Homoj ne volas tion. Ordinaroj ne plu kredas la inferajn mensogojn".

* La fiasko de la pacmovadoj

Demandite pri la sinteno de la Pac-Movado, Nick diris: "Normale estas ege bedaŭrinde kaj hontinde kiel la pacmovado ne volas tuŝi ion ajn rilatan al fabrikita teroro", sed li ja raportis pri parolado farita de antaŭa diplomato Craig Murray ĉe la kontraŭ-milita manifestacio en Trafalgar Square, en kiu li parolis pri suspektintaj spioninformoj. Pri tio mi raportis en mia aŭgusta novaĵletero. Iom post tio mi iris al la 'radikala' librovendejo Housman's en Caledonian Road

(<http://www.housmans.com/>) kaj demandis, ĉu ili havas 'Terror on the Tube' [Teroro en la Subteroj]. "Ni ne faras konspirteoriojn", la butikista servisto diris. Mi atentigis, ke la aŭtoro faris seriozan enketon, kaj ke li havas doktorecon pri la historio de la scienco. "Tio ne impresas min", li diris. Ŝajnas, ke estas kompania politiko, decidita de la estraro.

Tion mi trovis interesa, ĉar mi ĵus vidis ekzempleron de 'Undercover: The True Story Of Britain's Secret Police' [Kaŝe: La vera rakonto de la brita sekreta polico] de Paul Lewis kaj Rob Evans, eldonita en junio ĉi-jare. Supozeble ĝi raportas pri la aferoj pri politika policado pri kiuj mi skribis en miaj novaĵleteroj dum la pasintaj jaroj. Kiam 'konspir-teorio' fariĝas 'teorio de konspiro', mi scivolis. Sur la servotablo antaŭ mi estis staplo da gazetoj Peace News [Pac-Novaĵoj] produktita de War Resisters International [Milit-Rezistantoj Internacia], kies oficejo estas ĉe la librovendejo Housman's. Apud tiu estis stablo da Pac-Agendoj de Housman's (<http://www.housmans.com/diary.php>). La eldono 2014 inkluzivas "Mondan Pac-Kompilaĵon, kiu listigas 1500 naciajn kaj internaciajn organizaĵojn por paco, mediprotektado kaj homaj rajtoj, de la tuta mondo. La ĉi-jara speciala ĉefartikolo rigardas al la 100-jara datreveno de la Unua Mond-Milito". Ĉu iu bonvolus diri al mi kiu milito dum la pasintaj milionoj da jaroj ne komenciĝis per konspiro?

* La Kabineto kontraŭ la Polico

Kiam la ĉefministro estas en malkaŝa konflikto kun la polico, kaj publike vokas por pardonpeto de policanoj, oni scias, ke estas io serioze malĝusta. Tamen okazis ĝuste tio rezulte de la skandalo 'Plebgate' [plebo-skandalo], en kiu kabineta ministro estis starigita en kaptilon fare de la polico, kiu rifuzis malfermi por li kradpordon, por ke li eliru la ĉefministrejan straton Downing Street sur biciklo. Kompreneble la ministro, Andrew Mitchell, maltrankviliĝis. Tiun incidenton oni poste uzis por planti la semon de disputo, en kiu la polico falsigis provaĵon, tiel ebligante al ties stabana asocio, la Federacio de Policanoj, lanĉi publikan kampanjon, vokante por la demisio de la ministro (<http://en.wikipedia.org/wiki/Plebgate>). La demando, "Ĉu vi fidus la policon?" estis eĉ la temo de diskuto en la televidserio 'Sunday Live'

[Dimanĉon rekte] en BBC1 la 3an de novembro, kun iama poliestro de la Londona Metropola Polico Ian Blair (nun Lordo Blair), kunaŭtoro de la raporto pri la futbalstadiona katastrofo ĉe Hillsborough, profesoro Phil Scraton, kaj kolumniisto por la gazeto Independent, Owen Jones, kiu publike pardonpetis al Andrew Mitchell pro tio kion li skribis en la tempo de la skandalo (<http://bbb.co.uk/programmes/b03hjb27>).

* Chomsky, 9-11 kaj obskuriga lingviko

Demando pri Konstruaĵo 7 estis metita al la bone konata lingvisto kaj politika verkisto Noam Chomsky, sekve de parolado lia ĉe la Universitato de Florido. Li respondis, nomante la 2000 arĥitektojn kaj inĝenierojn kiuj vokas por deca enketo pri 9-11 "eteta nombro", dirante, ke ili "ne faras kion faras sciencistoj kaj inĝenieroj kiam ili opinias, ke ili ion malkovris". Tiam li diris: "Efektive estas multaj homoj ĉirkaŭe kiuj okazigas horon per la Interreto kaj opinias, ke ili scias multon pri fiziko, sed la afero ne funkcias tiel. Estas kialo, ke ekzistas postdiplomaj kursoj pri tiuj fakoj". Jes, kaj mi estas produkto de unu el ili, kaj same estas 2000 arĥitektoj kaj inĝenieroj (<http://www.openculture.com/2013/10/noam-chomsky-derides-911-truthers.html>).

Estas iomete kiel diri: "La luno estas farita el fromaĝo; iu ajn kiu ne kredas min verku sciencan referaĵon por tion malpruvi". Sed kion mi fakte skribis en la komenta sekcio estis: "Mi tre bedaŭris tion aŭdi de Chomsky. Li blindigas nin per scienco. Kial ne apliki la saman sciencon al la politikistoj kiuj antaŭenigis la ideon, ke Konstruaĵo 7 falis rezulte de la trafo de du flugmaŝinoj al la aliaj turoj? La afero pri 911-vero ne estas tio kion ni kredas, sed tio kion ni ne kredas. Rilate al la propraj ideoj de Chomsky, ke la usona registaro ne povus esti enplektita ĉar ĝi ne uzis tion kiel pretekston por invadi Irakon, kial ne elmeti tion por scienca ekzameno? Fake la Novkonservativuloj provis fari ĝuste tion, sed MI5 konsilis al ili ne fari, supozeble ĉar ili ne kapablas trapuŝi tion inter la britoj. Do ili anstataŭe atakis Afganion, kaj poste, pli malfrue, flankenigis la militservan strebadon kontraŭ Irakon, parte uzante 9-11 kiel pretekston. Kian ludon ludas Chomsky?".

Mi devas scivoli ĝis kia grado Chomsky almetas sian propran laboron al scienca analizo. Lia kerna verko, 'Sintaksaj Strukturoj' estas matematika modelado de frazstrukturoj en la angla, bazita sur statistika tekniko uzata en la fiziko, konata kiel Markovaj Ĉenoj. Mia takso de tiu libro, antaŭ multaj jaroj, estis, ke se li estus almetinta ĝin al matematika fako, la verdikto estus: "Bona provo, sed ĝi ne funkcias". Estis kvazaŭ li provas enŝovi kvadratan kejlon en rondan truon (por uzi anglalingvan esprimon). Fundamente, se vi scias, ke la unua vorto en frazo estas la difina artikolo, neniu statistika modelado povas diri al vi kiaspeca vorto estos la kvina vorto en la frazo. Se oni volus tion priesplori oni analizus grandan anglalingvan tekstaron, kaj tiam provus almeti teorion al tio. Tion ne faris Chomsky.

Alie, eblas nur elmeti ĉiujn eblecojn. Tion li finfine atingis, sed li ne bezonis Markovajn Ĉenojn por tion fari. Infano kvinjaraĝa povintus tion fari se li sukcesus lukti kun la abstraktaĵoj de vortspeco. Por rondigi la angulojn de la kvadrata kejlo, Chomsky prenis daŭre pli grandajn vortgrupojn, tiel malpligante la nombron de kombinoj. Kiam tio ne funkciis, li postulatis norman frazstrukturon, kaj evoluigis aron da matematikaj transformoj por konverti frazstrukturojn kiujn vere uzas homoj al siaj normaj 'profundaj strukturoj'. Mi konkludis, ke lingvistoj akلامas la teorion de sintakso de Chomsky ĉar, eĉ se ili ne komprenas ĝin, ĝi donas matematikan bazon al lingviko, kiun ili provadis establi kiel sciencon.

Kiam mi antaŭenmetis tiun ideon en la retpoŝta diskutgrupo por membroj de Universala Esperanto-Asocio en 2010 (uea-membroj), la tiutempa Prezidanto, usone edukita lingvoprofesoro en Hindia, kaj aŭtoro de libro pri la angla lingvo en Hindio, Profesoro Probal Dasgupta, insiste certigis min, ke la teorio de Chomsky ne estas statistika. Tio iom pruvis mian argumenton. Mi skribis al li, sugestante, ke ni daŭrigu nian diskuton private, kaj li konsentis, sed deziris prokrasti ĝis post la venonta Universala Kongreso de Esperanto en Kubo. Sed tiam leviĝis pli tuja afero, kiam ili provis ĉesigi la kontrakton kun la redaktoro de ilia periodaĵo 'Esperanto', sen klarigo, kaj tiam, dum

la sekva jaro, evitis miajn ripetajn petojn por klarigo pri ilia pensado tiurilate.

Post tio, ĉe la Universala Kongreso de Esperanto en 2011, li faris en la Fermo de la kongreso, paroladon kiu trafis min kiel mirindan sonĝecan alic-en-mirlandan spegulecan distordon de nia diskuto pri Sintaksaj Strukturoj de Chomsky. Li komencis per parolado pri hazardaj statistikoj, kaj pluiris por paroli pri Sintaksaj Strukturoj de Chomsky, kaj specife pri iu antaŭparolo kiun verkis Dasgupta por Esperanta traduko de libro 'Lingvo kaj Menso' de Chomsky. Li ŝajnis implici, ke Chomsky vidis la lumon rilate al Esperanto. Tio estis interesa, ĉar en 2003 Chomsky asertis, ke Esperanto ne estas lingvo (http://eo.wikipedia.org/wiki/Noam_Chomsky/Esperanto_ne_estas_lingvo). Tio ŝajnis tiutempe tre stranga, speciale ĉar al iu ajn kiu parolas la lingvon lia aserto estas tutevidente malvera. Poste evidentiĝis, ke tio kion Chomsky fakte skribis al Dasgupta estis: "Tre bone farita, kaj mi ĝojas tion vidi. Mi neniam pensis pri tiu kuniĝo en kaj la intelekta kaj la morala dimensioj".

Dasgupta tiam asertis, enigme, "Ni devas senĉese pontofari kun tiuj entreprenoj por resti fidelaj al niaj idealoj". Tiam, parolante pri sia propra libro 'Loĝi en homaj lingvoj: la substancisma perspektivo', li asertis, ke en ĝi estas lia 'Manifesto de Esperantismo'. Li estis jam Prezidanto dum kvar jaroj, kaj ankoraŭ neniu havis ajnan ideon kio estas lia intenco, kaj kial la asocio ŝajnas iri nenien. Kompreneble, la Esperantismo kiu tiom motivigis Zamenhof kaj la Esperanto-movadon dum cent jaroj estis la ideo, ke homoj el malsamaj gentoj ĉesu buĉi unu la alian. Pri tio Dasgupta evidentigis nenian veran intereson.

Tiam, mirige, li diris: "Ĉi tion mi volis raporti precipe ĉar vi estas konvinkitaj, ke mi verkas malfacile por malfaciligi vian vivon. Ĉu vi legos mian libron kaj konvinkiĝos pri la malo? Mi dubas". Nu, mi estis tiu kiu diradis, ke liaj artikoloj en 'Esperanto' estas intence obskuraj, kaj ke li tute bone kapablas skribi en komprenebla lingvaĵo. Ne necesis, ke li pruvu, ke li kapablas skribi en komprenebla lingvaĵo. Kaj en Kubo li aŭdacis provi ĉesigi la kontrakton kun la redaktoro de 'Esperanto'

kvazaŭ ĉio estis la kulpo de la redaktoro.

Post sia parolado mi intermiksiĝis kun la homamaso, demandante al homoj, ĉu ili opinias, ke la strategio de la asocio devus esti bazita sur la teorio de sintakso de Chomsky. Ĉiuj el la lingvistoj kiujn mi demandis diris "Ne", kaj ĉiuj aliaj diris, ke ili komprenis eĉ ne unu vorton kiun diris la Prezidanto. Ankaŭ tio estis blindigo de ni per scienco. Mi devis scivoli, ĉu Chomsky kaj Dasgupta estas ie en la sama klubo. Do mi iom ĉirkaŭfosis, kaj trovis aserton de Istvan Ertl, antaŭa redaktoro de la periodaĵo 'Esperanto', en kiu li diris, inter la komentoj sub la teksto de la parolado de Dasgupta: "Chomsky kaj Dasgupta estas delongaj personaj konatoj" (<http://www.liberafolio.org/2011/la-ferma-parolado-de-probal-dasgupta-en-kopenhago>). Mi opinias, ke ili devas ambaŭ esti subtenantoj de la skolo de obskuriga lingviko, eble de la tempo kiam Dasgupta estis studento ĉe la Universitato de Novjorko, aplikante la Generan Gramatikon de Chomsky al la bengala, aŭ pli poste kiel Honora Membro de la Lingvika Societo de Usono [Linguistics Society of America].

La aserto de Chomsky, ke Esperanto ne estas lingvo, ŝajnas esti bazita sur la ideo, ke la mondaj lingvoj estas nuraj dialektoj de unu homa lingvo, kaj ke sintakso estas ennaskita. Antaŭ jaroj mi reiris al fundamentoj en homa komunikado, kaj serĉis ĉiujn eblecojn haveblaj al Dio se li estus elpensinta solvon. Mi rapide konstatis, ke kiun ajn logikan eblecon oni trovas, ĝi estas uzata en iu lingvo, krom se estas bona kialo ne uzi ĝin. Mi konstatis ankaŭ, ke sintaksaj retoj por frazkonstruo en la maŝintraduka projekto DLT, kiun mi prilaboris, estis plej komplikaj por Esperanto, pro ties libera vortordo. Klare estis io malĝusta. Jim Fetzer estas profesoro honoremerita en la filozofio de scienco, kaj li ĵus direktis min al du videoj pri Chomsky, en kiuj li klarigas siajn dubojn pri la lingvikaj ideoj de Chomsky. Tiuj estas enkorporaciitaj en artikolo 'The Assassination of Cpl. Pat Tillman, USA, dated 18 December 2011' (<http://www.veteranstoday.com/2011/12/18/the-assassination-of-cpl-pat-tillman-usa/>).

Tiu ŝajnas esti la ideo surbaze de kiu temis la Chomsky-bazita 'Manifesto de Esperantismo'. Kaj la parolado de profesoro Dasgupta kaj la aserto de Chomsky, ke Esperanto ne estas lingvo pensigas pri parolado de lingvoprofesoro Andreas Blinkenberg, kiel la dana reprezentanto en UNESKO en 1954, en provo bloki rezoluiciproponon pri Esperanto

(http://liberafolio.org/Members/jens_s_larsen/kiu_efektive_estis_blinkenberg). Liaj asertoj estis evidentegaj malveraj, kaj implicis, ke Esperanto ne estas lingvo. La Esperanto-representanto, profesoro Ivo Lapenna, forte rifutis kaj venkis. Poste li enkondukis en Esperanton la verbon 'blinkenbergi', kun la signifo, esence, ' blufi kaj blagi kiel profesoro'. Estas bedaŭrinde, ke tiu vorto malaktualiĝis, kaj ke neniu en 2003 elbuŝigis la vortojn "Chomsky blinkenbergas".

Salutas Ian

Keep Talking

ian@fantom.org.uk

Historio-geografio

Sikullando

Sikullando/Sekellando estas historia regiono en la sud-orienta parto de Transilvanio, tiel ĝi situas proksimume meze de Rumanio. 70-80 % de ĝia loĝantaro konsistas el hungarlingve parolantaj sikuloj/sekeloj (en kelkaj urboj 97 %), ilia kulturo komplete diferencas de la ceteraj partoj de la lando. En la ĉiutaga vivo ili parolas hungare, tamen tiu ĉi lingvo ne estas oficiala, ĉar sur teritorio de la tuta Rumanio nur la rumana lingvo estas oficiala. La sikuloj ŝatus havi aŭtonomion kaj memadministracion ene de Rumanio, kiel tiaj ekzistas en Sud-Tirolo, Sicilio, Vojvodino kaj en ĉiuj hispanaj provincoj.

Hodiaŭ Sikullando apartenas al tri, diversaj, rumaniaj departementoj: preskaŭ al plenaj departementoj Harghita kaj Covasna kaj parte al departemento Mures. (Ceteraj, pli malgrandaj partoj de Sikullando apartenas ankaŭ al aliaj departementoj.) Inter la jaroj 1952 kaj 1968 la regiono ekzistis sub la nomo Hungara Aŭtonoma Provinco, sed poste en 1968 oni kreis en Rumanio la departementojn, pro tio tiu ĉi regiono disiĝis al la supre menciitaj du kaj duono da departementoj. Ekde la jaro 2003 ekzistas la Sikula Nacia Konsilio (SzNT = SNK), kies celo estas atingi la aŭtonomion de Sikullando (unuigo de sikulaj partoj de tiuj ĉi 3 departementoj), kies primara oficiala lingvo estu la hungara kaj sekundara la rumana. Oni antaŭvidas dividi la

aŭtonoman Sikullandon en 8 provincojn, kiuj estas tradicie nomataj „seĝoj”. Sikullando havas ankaŭ flagon, kiu hodiaŭ kompreneble ne estas oficiala, sed ĝi estas vaste uzata, ankaŭ la Sikula Nacia Konsilio uzas tiun flagon. Ili havas ankaŭ himnon (Sikula Himno), kiu estis verkita en 1921. Ili havas planatan, plejaltnivelan, interretan domajnokodon (sic), kaj internacian aŭtomobilsignon (SIC), kiun ili nun uzas neoficiale, en formo de glumarko. La antaŭvidata ĉefurbo estas Marosvásárhely (Targu Mures). La regiono ne celas apartiĝon de Rumanio (kiel tion la rumana gazetaro kelkfoje misklarigas), ili ŝatus nur aŭtonomion kaj memadministracion ene de Rumanio. La rumana registaro neas eĉ la fakton, ke tiu ĉi regiono ekzistas kaj ekzistis dum la historio malgraŭ tio, ke granda plimulto de la homoj vivantaj en Sikullando sin konfesas sikuloj, uzas la sikulan flagon, kantas la sikulan himnon, kaj anstataŭ la oficiala rumana lingvo parolas en sia ĉiutaga vivo la sikulan dialekton de la hungara.

La klopodoj por aŭtonomio hodiaŭ havas neordinaran signifon, ĉar la rumana registaro planas la enkondukon de regionoj, kiuj ne sekvas la limojn de Sikullando, eĉ volas dividi ĝin en 3 partojn, kaj loki en 3 diversajn regionojn, kie la proporcio de la sikuloj estus proksimume nur 30 %. Ni esperas, ke ankaŭ en Rumanio efektiviĝos tiuj principoj, laŭ kiuj Eŭropa Unio ne difinas, sed rekonas la jam ekzistantajn regionojn.

Kelkaj donitaĵoj:

ekzisto: ekde la XIII-a jarcento

loĝantaro: 750.000 – 800.000

sikuloj inter la loĝantaro: 70 – 80 %

areo: ~ 12.000 kvadratkilometroj (~ = Montenegro, Kataro, Jamajko, Porto-Riko)

parto de: Transilvanio

ĝia nomo en diversaj lingvoj: Tinutul Seciuesc (rumane), Székelyföld (hungare),

Terra Siculorum (latine), Szekler Land (angle)

religioj: rom-katolika (53 %), protestanta (21 %), ortodoksa (17 %), unitaria (6 %)

tuta sikula loĝantaro: ~ 1 miliono, el ili 550.000 loĝas en Sikullando, 180.000

alie en Transilvanio, 185.000 en Hungario kaj 100.000 alie en la mondo

rezidejoj de la 8 antaŭvidataj, sikullandaj provincoj: Marosvásárhely, Gyergyószentmiklós, Székelyudvarhely, Csíkszereda, Barót, Kézdivásárhely, Sepsiszentgyörgy, Kovászna

La tradukinto, D-ro Lajos (Ludoviko) Molnár dankas la valoran helpon kaj konsilojn de la provlegantoj: S-ro Leo De Cooman kaj S-ro Jozefo Horváth

Peticio por aŭtonomio de Sikullando:

<http://www.change.org/petitions/government-of-romania-recognize-the-autonomy-of-székely-land>

La tradukinto, D-ro Lajos (Ludoviko) Molnár dankas la valoran helpon kaj konsilojn de la provlegantoj: S-ro Leo De Cooman kaj S-ro Jozefo Horváth

Homaj Rajtoj kaj Spiritaj Devoj



José de Paiva Netto*, ĵurnalisto, radkronikisto kaj verkisto. Li estas direktoro-prezidanto de LBV.

Je la 10-a de decembro oni oficiale celebras la 65-an datrevenon de la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj, kiun aprobis la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj en Parizo, ĉe Palaco Chaillot, en la jaro 1948. Ĝi fariĝis unu el la bazaj principaroj, kiuj gvidas la noblajn iniciatojn de UN, kaj ĝi inspiras ellaboradon de aliaj gravaj dokumentoj kaj konstitucioj, ekzemple la brazilan Ĉarton, proklamitan en la jaro 1988, nome la "civitanan konstitucion", laŭ difino de deputito Ulysses Guimarães (1916-1992), kiu prezidis la Konstituciantan Nacian Asembleon.

LA "MALNETO EL ĜENEVO"

Eleanor Roosevelt (1884-1962), vidvino de la usona prezidento Franklin Delano Roosevelt (1882-1945), estris ekde januaro 1947 la Komisionon por Homaj Rajtoj, kiu kunsidis ĉe UN, ĝis ĝi akceptis siajn 30 alineojn en tiu memorinda monato decembro 1948. Oni konsideris ŝin motoro de tiu projekto, kaj sinjorino Eleanor gvidis grupon de 18 partoprenantoj el nehomogena kultura, politika kaj religia konsistoj, kaj ĝi ellaboris dokumenton konatan kiel "Malneto el Genevo", en la monato septembro 1948, prezentitan kaj submetitan al aprobo de pli ol 50 membroj-ŝtatoj. Kun granda fiero ni rememoras la partoprenon de la grava brazila ĵurnalisto, mia kara amiko Austregésilo de Athayde (1898-1993), unu el la plej elstaraj kunlaborantoj en tiu eksterordinara laboro. Li okupis ankaŭ la postenon de prezidanto de Brazila Akademio de Beletro (ABL) kaj la Honoran Konsilantaron por konstruado de ParlaMundi de LBV, en Braziljo, ĉefurbo de Brazilo.

La dezirata libereco

Laŭlonge de eraoj, studado pri Juro estis perfektigita por doni pli kaj pli solidajn garantiojn al la socio. Ekzemple, la 20-a jarcento transdonis al ni grandegan lecionon per sinsekvaj civilaj konkeroj.

Omaĝe al tiom da aktivuloj, kiuj laŭlonge de la Historio celis liberecon kaj dignajn vivkondiĉojn, kaj kontribue al tia signifoplena mejloŝtono, mi alportas al vi pecon de modesta prelego, kiun mi faris, publikigita inter aliaj en la verko "Meditadoj kaj Pensoj - Dialektiko de Bona Volo" (1987) kaj en "Manifesto de Bona Volo" (la 21-an de oktobro 1991):

Kredi, ke eblas rajtoj sen devoj estas konduki la idealon de libereco al plej granda perdo. Gravas klarigi, ke kiam mi montras la devojn de civitano super liaj rajtoj mem, mi tute ne defendas ian torditan komprenon pri laboro, laŭ kiu sklaveco estas unu el ĝiaj plej abomenindaj aspektoj.

Tial ni deziras, ke ĉiuj homoj estu efektive egalaj laŭ rajtoj kaj ŝancoj, kaj ke iliaj sociaj, intelektaj, kulturaj kaj religiaj meritoj, eĉ se plej laŭdataj kaj rekonataj, ne deflankiĝu de rajtoj kaj libereco de la ceteraj civitanoj. Ĉar libereco sen frateco estas kondamno al ĥaoso.

la socio, en kiu Dio kaj Liaj leĝoj de amo kaj justeco inspiru zorgadon pri la individua libereco, por garantii politikan kaj juran sekurecon al ĉiuj, laŭ inspiro de Kristnasko de la Kristo de Dio. Mi parolas pri la Plejalta Kreanto, ne pri la erarema kompreno, kiu emas fari Lin, kiu estas Amo, la abomeninda ilo por fanatikismo kaj tiraneco, antaŭjuĝo kaj malamo. Sekve, mi ne aludas al homforma dio, karikatura, kreita laŭ la bildo kaj aspekto de malperfekta homo. (...)

Realaj virtoj estas tiuj, kiujn la homo mem plenumas dum honesta ĉiutaga okupiĝado, dum administrado de siaj havaĵoj kaj en respekto pri tio, kio apartenas al aliaj homoj, dum la bela, incita aventuro de vivo. Se nacio konstruiĝas per tiaj elementoj, ĝi estos ĉiam forta kaj nevenkebla.

Mi deziras, ke jam en la 21-a jarcento ni sukcesu solidigi tiujn idealojn kaj plivastigi ilin al la popoloj sur la Tero, por ke oni plene travivu ilin. Kaj tute ne ripeti tion, kio okazis en la 20-a, kiu estis fiasko.

***José de Paiva Netto**, verkisto, ĵurnalisto, radikomunikanto, komponisto kaj poeto, naskiĝis je la 2-a de marto 1941, en Rio-de-Janeiro, RJ, Brazilo. Li estas Direktoro-Prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV), aktiva membro de Brazilia Asocio de Amaskomunikiloj (ABI), de Brazilia Asocio de Internaciaj Amaskomunikiloj (ABI Inter), de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fenaj), de International Federation of Journalists (IFJ), de Beletra Akademio en Centra Brazilo, de Sindikato de Profesiaj Ĵurnalistoj en Subŝtato Rio-de-Janeiro, de Sindikato de Verkistoj en Rio-de-Janeiro, de Sindikato de Radikomunikistoj en Rio-de-Janeiro kaj de Brazilia Unuiĝo de Komponistoj (UBC).

Zlatko Tišljár

Stato de la ŝtatoj de la iama Jugoslavio ... kaj la solvo

Ĝis la 90aj jaroj en la antaŭa Jugoslavio oni progresis kaj ekonomie kaj liberele. Kreskis la nombro de homoj en la meza tavolo. La ŝtato minimume ŝuldis al aliaj ŝtatoj (nur kvar miliardojn da dolaroj en 1990) kaj ĝi havis altan internacian reputacion. Ĝi estis ankaŭ suverena: ne okupis ĝian teritorion fremdaj trupoj.

Al tio komplete kontraŭas la nunaj ŝtatoj de iama Jugoslavio. Ili ĉiuj ekonomie regresas. La eblo ŝanĝi koruptajn politikistojn pli kaj pli malgrandas, do ekzistas malpli da libereco. La kvanto de mizeruloj daŭre kreskas kaj la meza tavolo praktike malaperis.

La ŝtatoj havas nenian internacian renomon kaj ne estas suverenaj. Sur iliaj teritorioj estas fremdaj trupoj: la ŝtatoj eniris Nord-Atlantikan Traktat-Organizaĵon (NATO) aŭ staras sub internacia protekto. Amasiĝas ŝuldoj: ekz. Kroatio nun ŝuldas pli ol 60 miliardojn da eŭroj, Slovenio pli ol 15 miliardojn.

Realisto

Klare, ne eblas reveni al la antaŭa stato. Realisto ne povas pri tio pensi. Sed oni konstata kiel daŭrigi kaj kiel kondukti.

La kaŭzo de la nuna situacio estas simpla. La socialisma (komunisma) ideologio estis venkita fine de la 80aj jaroj, ĉefe pro komunismo mem, kiu

en sia kerno (Sovetio) estis tro rigida kaj malhumana kaj ne kapablis kompreni, ke nepras reformiĝi.

Sed post ĝia falo okazis unu el la plej rabaj sociaj moviĝoj en la historio. Privatigitaj estas la valoroj, kiujn la socialistaj ŝtatoj kreis, kaj kies posedanto estis aŭ la ŝtato, kiel en Sovetio, aŭ la memmastrumantoj, kiel en Jugoslavio. Evidente ne ekzistis kondiĉoj por normala iom-post-ioma transformo baze de laboro kaj kapitalposedo.

Mafiuloj

La iamaj politikaj potenculoj el la komunisma partio, kunlabore kun senskrupulaj mafiuloj, disdividis tiujn valoraĵojn al malmultaj plej potencaj personoj (familioj), kiuj havis nenian alian meriton krom avidemo kaj plua potenco, ĉu en polico, armeo aŭ tribunaloj.

Tiel ekestis sur la fundamentoj de la antaŭaj ŝtatoj primitiva imperiisma kapitalismo, en kiu transprenis la ekonomiajn valorojn malmultaj „ŝarkoj“, fariĝante miliardoj kaj kreante novan politikan sistemon kun ŝajna demokratio. Ekestis plurpartiaj ŝtatoj, en kiuj la politikan potencon transprenis multimiliardoj, ĉar superan politikan rolon povis havi nur tiu, kiu aŭ estis mem riĉa aŭ havis subtenon de la riĉeguloj.

En landoj, kie oni ne povis politike interkonsenti pri la valordistribuo kiel en Jugoslavio, la nova elito decidis militi por kaŝi la ŝtelan distribuon de grandaj valoroj. Milošević kaj Tadjman, ekzemple, antaŭ la interna jugoslava milito, interkonsente fondis du komunajn bankojn en Londono kaj Parizo.

Popoloj

En tiujn ili enmetis monojn senleĝe prenitajn de la koncernaj popoloj. Do la kaŭzo de la milito kuŝis nek en nejusteco nek en ajna nacia demando. Simple oni volis senpune ŝteli grandajn sumojn, ĉar en milito neniu kontrolas, kio okazas en la ŝtata kaso.

La nova elito kreis leĝojn kaj konstituciojn, kiuj ebligis al ĝi nekontrolatan ekspluatadon sed samtempe neniun protektadon por simplaj civitanoj. La rezulto estas senlaboreco kaj neimageblaj ŝuldoj, tiel ke du postaj generacioj de la tiulandaj popoloj ne povos ilin repagi. Tian ekonomian politikon neniam konis la socialismaj ŝtatoj.

Ĉio ĉi tre oportunas al la ĉefa monda potenculo, Usono. Tiel eblas subjugigi ĉiujn ekssocialismajn ŝtatojn. Usonaj trupoj jam eniris iliajn teritoriojn (krom Sovetion, kiu havas nafton kaj tial sukcese evitis totalan enŝuldiĝon), dum sekvis usonaj firmaoj kaj bankoj.

Ĉinio

La granda potenco Ĉinio, kiu formale ankoraŭ ne forigis komunismon, tamen ekonomie akceptis la novan kapitalismon. Malgraŭ tio, ke ĝi sukcesis tre bone ekonomie konkurenci, ĝi submetiĝis al la volo de Usono, obeante internacian gvidadon de la kapitalisma centro, nome usonaj bankoj.

Jen situacio teorie senesperiga, tamen prezentas sin du ebloj. Unue, se tro longe daŭros tia kapitalismo, iom post iom elĉerpiĝos bazaj naturaj rimedoj de la tero. Al la homaro ekmankos ekz. trinkebla akvo, manĝoj kaj eĉ freŝa aero. Rezulto: memdetruo de la homaro.

Due, revolucio kontraŭ tiu sistemo antaŭvideblas laŭ historia precedenco. Respondecos socia tavolo, iĝinta potenca sed ekskludata de politikaj decidoj. En la pasinteco riĉaj fabrikistoj, al kiuj mankis politika povo, provokis burĝajn revoluciojn, kiuj kondukis al la detruo de la feŭda sistemo.

Pentagono

Hodiaŭ la potenca tavolo estas tiu de la komputistoj. Ili povus ĉesigi la nunan vivmanieron. Ili povus, se ili komencus pensi pri si kiel politika socia forto, detruiri bankojn, la usonan defendo-ministerion Pentagono, radarsistemojn, ŝtatajn administraciojn, ktp, do ĉion, kio ŝirmas la nunajn potenculojn.

Kiam la komputistoj organizos sin, ili povos postuli radikalajn ŝanĝojn. Kiajn, ankoraŭ ne certas. Kaj verŝajne ne mankos survoje viktimoj kaj martiroj.

La unuaj jam identigeblas: la usona soldato Bradley Manning, la Wikileaks-respondeculo Julian Assange kaj lia helpanto Edward Snowden. Jen eble nur la komenco.

Ĉerpita el MONATO

El la leteroj

- La eseo de Fatos Lubonja memorigis min pri miaj jaroj en la brita armeo en Palestino, kiam mia devo estis malebligi ke tro da enmigrintoj eniris tiun landon.

Plue, ĝi rilatis al la sorto de malriĉaj afrikanoj kaj iliaj klopodoj migri al Europo, malgrau risiko de droniĝo.

Mi opinias ke estus pli bone se riĉaj landoj certigus ke homoj en malriĉaj landoj havu decan vivnivelon.

Plu faktoro en la situacio estas ke eĉ malriĉuloj spektas televidprogramojn faritajn en riĉaj landoj, kaj tre volas dividi la saman avantaĝon.

Kaŝita fakto estas ke la civitanoj en riĉaj landoj estas la pranepoj de malriĉuloj kiuj organizis sin kontraŭ riĉaj aristokratoj, kiuj faris sian plej eblon ne dividi siajn riĉojn.

La justa divido estas politika afero, kaj nur politika agado povas solvi la problemon.

Amike,

David., Britio

- Ni elkore gratulas al vi pro via E-kurso kaj dankas pro viaj informoj. Bondezirojn al viaj studentoj.
Fartu bone kaj havu la forton daŭrigi vian agadon en Esperantujo.
Elkore salutas vin
Alicja kaj Dieter, Germanio



- Dankegon,
Samideane,
Evandro, Brazilo

- Nu ! KOSOVO-n mi vizitis, kiam mi estis juna instruisto kaj poste , kiam ekestis la milito, mi estis gluita ĉe la televid-ekrano, ĉar mi tiam ekhavis satelitan televidon kaj la angla kanalo SKY - tiam ankoraŭ senpaga - ĉiutage rekte de tie elsendis. Mi retrovis pejzaĝojn konatajn, bedaŭrinde kun teruraj bildoj de milito !

Okaze de mia unua vizito ankoraŭ ne videblis reklamtabuloj 'COOL' kaj 'ADIDAŜ !!!

Kun espero, ke vi trapasis agrablan viziton. Edmond LUDWIG, Francio

- Jam delonge aperis franca traduko de la sloganoj el shtonoj kaj mi legis la libron. Ankau la menciitan novelon de Besnik Mustafaj mi jam delonge legis franclingve. Li estis ja ambasadoro de Albanio en Parizo. Eble mi somere venos al Kroatio, Bosnio, Serbio, Makedonio kaj Albanio por mallonga tempo. Mi ankoraŭ ne scias kiam precize. Sabate mi flugos al Libano, kie estas granda armena komunumo kaj kie mi havas bonan amikon el mia juneco. Mi baldau (29/11/2013) 66-jarighos.

Salutu Shaban Hasani. Plej amike al ambau. Robert PONTNAU, Francio

- Mi fartas bone, feliĉe mi ne loĝas en tiu urboparto, kie okazis katastrofo. Falis tegmento de supervendejo MAXIMA, vespere kiam en la vendejo estis multege da homoj. Hodiaŭ ni havis 3 minutan silenton en la tuta lando je la 10.00 horo. Ni staris ĉe niaj komputiloj.

Mortis 54 homoj, inter ili ankau infanoj kaj savantoj (3). Ankoraŭ multaj estas en hospitaloj. Oni ne povis kalkuli kiom da homoj entute dum tiu tempo estis ene de la vendejo. Dum 3 tagoj parencoj staris tagnokte atendante kiam savantoj elporton novan kadavron por rekoni ĝin. Esti organizita volontula servo, homoj portis por atendatoj kafon, teon, varmajn vestaĵojn, ortodoksa pastro deĵoris kaj esti anoncigitaj telefonnumeroj de psihologia helpo. La tragedio ne estas mondskala, sed ĉe ni en Latvio dum longa, longa tempo ne okazis katastrofoj. Homoj fariĝis trankvilaj, certaj pri la estonteco, eble forgesis pri Dio. Tiu ĉi tragedio kunigis homojn, ili fariĝis multe pli sinceraj, helpemaj.

Nun multaj en ni timas aĉetumadi en grandaj supermarketoj. Kiel mi memoras en via lando esti pli multe da malgrandaj, agrablaj vendejetoj. Vi povas esti certa, en malgranda vendejetoj tegmento ne falos.

Fartu bone, estu sana!
Sincere Mara.Letonio



Saluton!

1) La direktoro-prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV), José de Paiva Netto, plej kontente ricevis viajn simpatiajn vortojn okaze de la 24a fondatreveno de la Templo de Bona Volo kaj dankas tiun fratan geston.

2) Via mesaĝo, kiu tre kortuŝis lin, ankaŭ montras, ke labori favore al Paco, Solidareco kaj Amo estas la trafa maniero transformi la mondon.

3) La filmetoj prezentantaj vian fratecan mesaĝon estis dissenditaj en programado de la Supera Reto Bona Volo pri Komunikado (TV, Radio kaj Interreto).

4) Akceptu en via koro ĉi tiun penson de la fondinto de la Templo de Paco, la Piramido de la Lumaj Spiritoj: "Bona Volo estas la Saĝeco de Dio stampita en la Animo de la homoj".

5) Dio benu vian familion, hodiaŭ kaj ĉiame!

Fratamike kaj samideane,

S-ro Silmar Aparecido de Almeida

Plenuma direktoro de LBV

- Kun plezuro mi aldone sendas al Vi specialan dankmesaĝon fare de la estraro de Legio de Bona Volo (LBV) pro la filmeto sendita de Vi okaze de la solenaĵoj omaĝe al la 24-jariĝo de la Templo de Bona Volo (TBV).

Via filmeto estis diskonigita per Supera Reto Bona Volo pri komunikado al miloj da homoj en la tuta Brazilo kaj alilandoj. Kiel memoraĵo, jen sube ligilo al programo de TV BONA VOLO, kiu prezentis vian filmeton (ĝi estis montrita televide kaj rete):

<http://youtu.be/9DLUZJ8sHqQ>

Ni klarigas, ke tiu videofilmo estas videbla ĉe youtube nur de tiu, kiuj konas la ligilon. Ĝi ne estas publika.

Kun refoja danko pro via omaĝo al Templo de Bona Volo, ni dediĉas al via koro ĉi tiun penson de la fondinto de Templo de Bona Volo, José de Paiva Netto:

“Travivado de Ekumena Spiritualeco, tio estas, de Bonfarado, estas kaŭzo de mensa kaj socia sano por Tutplaneda Civitano”.

Maria Aparecida da Silva

www.bonavolo.com

www.tbv.com.br/esperanto San-Paŭlo, Brazilo, la 26-an de novembro 2013.

- Kara albanaj magistroj kaj bakalaŭroj de AIS,

Elkoran dankon al vi ĉiuj pro via subteno al mi por atingi la premion de Ada Sikorska. Bv. tiun dankon enmeti en vian bultenon.

Laste mi rigardis kun granda intereso televid-filmon pri Albanio. Oni montris monumentojn en Tirana, Skodra kaj Durres i.a. de Skander Beg. Tre interese oni parolis pri la nuna vivon studado kaj ripozo. Mi estas ĉiam tre kortuŝita, kiam mi denove ion scias pri Albanio.

Kun amikaj kaj esperantaj salutoj
Alicja Pollando

- Bonan tagon,
Nia komuna skribantino Adri el Hungario menciis, ke ŝi konas vin. Mi demandis ŝin, ĉu mi povus kontakti vin. Ŝi diris, vi elprovu. "Li estas afabla viro"
.Via lando tre interesas min.
Mi estas emerita lingvoinstruisto el la okcidenta Germanio. Mi korepondas kun ses ĝis sep esperantistoj mondscale, sed urĝe mankas iu el Albanio. Ĉiujn haveblajn informojn pri Albanio mi legis - de la komunisma amikeco kun la Soveta Unio, poste kun Ĉinio, kaj laste la propra vojo de Enver Hoĝa. Nun
vi estas ĉe ni en la Eŭropa Unio. Felice, Mi legis ĉiun specon da informoj

pri Albanio, precipe vojaĝpriskribojn. Mi tre scivolas, kiel via lando evoluis post la fino de la komunismo.

Cetere, miaj najbaroj venas el Kosovo kaj memkompreneble ili parolas la albanan.

Kiel estas la nuna situacio ĉe vi? Ĉu la ruinoj de la antaŭa periodo estas forigitaj, (la unu-persona bunkroj) ? Kiel evoluas la vivnivelo?

Kie vi loĝas? Mi aldonas mapon de mia urbo. <http://goo.gl/maps/jltZa>

Antaŭ kelkaj jaroj mi vizitis la apudan Montenegron kaj povis vidi la Skutari lagon.

Kiel funkcias la E-a movado en via lando? Mi estas loka delegito de UEA kaj multe varbas por nia lingvo.

Mi kunsendas bildon de mi kun varbada ĉemizo, fotita en Jordanio.

Ĉu vi interesiĝas pri korespondado? Mi ĝojus.

amikaj salutoj

Claus. Germanio

- Saluton,

Dankon pro la flataj vortoj rilate al mia intervjuo koncerne al kor-vaskula preventado. (vidu sur MONATO, dec. 2013) Mi konas Andrea Kleiner ekde la liceaj jaroj (li estas nur unu jaron pli juna ol mi), la ideo pri tia intervjuo naskiĝis tuj post mia vizito ĉe lia privata kuracejo, kaj ni ambaŭ ege feliĉas pro via entuziasma reago. Li estas vere lerta kuracisto, kaj klarigis per simplaj vortoj gravajn konceptojn. La enhavo de la intervjuo povas helpi multajn homojn kompreni la riskojn de malkorekta vivmaniero.

Bv. informi min tuj post la apero de albanaj gazetoj enhavontaj la saman intervjuon. Andrea estos tre kontenta, ke lia nomo atingos ankaŭ la limojn de via lando, kaj li ŝatos ricevi kopion (almenaŭ PDF-an) de la koncerna revuo.

Amike,

Roberto Pigro, Italio destinazionecipro@gmail.com


Beletraĵoj

Albana literaturo



Besnik Mustafaj¹

Fragmento el “La rezervita kajero”²



La tria-n de Julio 1994

Mi pasigis neforgeseblan antaŭtagmezon kun mia sampatrujano Hasan Jero. Estis varmege, sed Hasan Jero ne estis vestite malpeze. Maldika kaj envolvita iome ĉe la ŝultroj, la vivo ne permesis al li dikiĝi, sed elegantulo, kun grizkolora kostumo kaj kravato ĉerizkolora, kvazaŭ li irus en solenaĵon je

¹ Verkisto, diplomato, politikisto renoma

² Libro kun memoraĵoj de la verkisto el la periodo 1992-1997 kiam li ambasadoris en Parizo

aparta graveco. Stranga antaŭsento estis instiginta ankaŭ min surmeti la kravaton kaj la jakon.

Li ekde duonjarcento ne interparolis kun ambasadoro albana. Aliel vestite eble mi seniluziigus lin. Tiom fortan mi havis tiun impreson, ke renkontinte sur La Urba Ponto mian amikon Kristian Ruje kun mallongaj pantalonoj kaj dorsosako kvazaŭ kiel dum la dimanĉo, mi ne kuraĝis prezenti al Jero lin kiel Direktoron por La Centra kaj Orienta Eŭropo en la Ministerio de la Eksteraj Aferoj de Francio. Mi timis ke li ekpensus ke la diplomatoj de la jarcentofino estas perdinta sian seriozecon.

La Latina kvartalo, la katedralo de Parizo, la Sena Bordo zumadis pro la turistoj. Estas ja sezono kiam Parizo apartenas pli al ili ol al siaj eternaj loĝantoj. Sendube, mia sampatrujano estis la plej eksterordinara vizitanto, troviĝanta en ĉi tiu urbo. La malplejmulton direndan por li estus ke li ne apartenas al speco de turistoj.

Li revenis ĉi tie post 56 jaroj. Tro sopirita, sed ankaŭ je memorkapablo kaj sano admirinda. Ne forgesu ke li estas 84 jara. Kaj pasigis li vivon, kie ne nur la memorkapablo kaj la nervoj, sed ankaŭ la ostoj, devus esti rompiĝintaj. Post finstudado en Parizo en la stomatologia fakultato, Hasan Jero revenis en Albanio. Li deziris servi la sia lando kiel multaj aliaj albanaj junuloj tiutempaj klerigitaj en la Okcidento. Sed lia impeto ne longis pro la itala okupacio. Li partoprenis en la naciliberiga milito. Ekde la komenco. Estis ĉeflanke de la Komunista Partio. Sed ne la ties membro. Li konfesis ke neniam havis politikan ideologion. Dum la tempo kiam la nova reĝimo dividis la postenojn, do dum la tempo kiam li devus rekompenciĝi pro siaj meritoj, aŭ ellasita almenaŭ kvieta ekzercadi sian profesion de la kuracisto, por kio la lando ege bezonis, oni arestis lin en la jaro 1947 kaj kondamnis je 7 jaroj da enprizoniĝo. Oni rearestis lin en la jaro 1966 kaj pasigis 20 jarojn en la prizono. La intertempaj periodoj kaj la daŭrigo denove en la interniĝejoj. Nur post la establiĝo de la demokratio, en la jaro 1991, li akiris la rajton loĝi en Tirana.

Ĉu la libero alvenis malfrue por tiu viro? Mi certas ke hodiaŭ en Parizo ne estis alia fremdulo je tia vivo.

Sed ne estas nur la prizonaj jaroj kaj la inferaj suferajoj, distingantaj la albanon Hasan Jero disde la usonanoj, japanoj, afrikanoj, novzelandoj kaj, kiu scias pli, vagantaj en Parizo ĉi varmegan diamanĉon, por admiradi la ties monumentojn, ties someron, la belecon de ties knabinoj. Aŭ simple por fieri poste ke ili estis en Parizo, trafoluimante la kolorajn fotoalbumojn. Hasan Jero reprezentas alian relacion, homece tre profundan al Parizo.

Malfacile estas trovi turiston, preterirantan nin, konfesanta tutsincere kaj tutcerte, ke la vivo estas bela kaj se li estis bonŝanculo, prikonsiderante nur kvin jarojn pasigitajn en ĉi tiu urbo. Kaj ne hieraŭ, sed en la periodo, por ni, preskaŭ prehistoria 1930-1935, kiam certe la plimulto de parizanoj kaj de vizitantoj hodiaŭaj ankoraŭ ne estis naskiĝintaj.

- La vivo ĝenerale aŭ via propra vivo? Intervenis mi iom dubinda. Ĉu mi bone aŭdis? Kvin jaroj, malgraŭ belaj, eĉ pli mirindaj ol iu songo, ŝajnas al mi ne sufiĉaj por konkludi tian konfeson optimisman pri la vivo preskaŭ jarcenta.
- La vivo ĝenerale estas bela, estas sciite, sed ankaŭ la mia. Aparte la mia, certe, pliĝustigas li rapide, ne perdinte ion el sia sincereco kaj certeco por diri la veron. Por li ne estas klara la kialo de mia dubo. Aŭ ŝajnas al li neracia kialo. Kaj aldonas per la sama optimismo:- Tial mi konsideras min bonŝanculo. Mi estas feliĉa. Ĉu mi pravas aŭ ne?

Ne povas esti pli granda, signifoplena kaj poetika komplimento al Parizo. Iamaniere, per la ĝojoj kaj plezuroj kiujn estas doninta iam, dum lia juneco, ĉi urbo estas protektinta ĉi tiun fortan viron dum pli ol duonjarcento disde la malespero. La memoraĵoj el ĉi tiu urbo, malgraŭ ampleksis nur kvin jarojn, do proksimume unu sesonon de la periodo pasigita en la prizono, ne prikonsiderante la interniĝeojn, estas savintaj ĉe Hasan Jero la fidon al la vivo, estas malpermesintaj lin kapitulacii. Oni diras ke en la nigraj tagoj, la belaj memoraĵoj el la pasinto pliigas la malĝojegon. La kazo de Hasan Jero pruvas la kontraŭon. Eble ankaŭ tio eniras en la senekzemplaj magioj de Parizo. La reveno en Parizo estis por li la simbolo de la ŝanĝiĝo de la vivofluro de sia lando.

La paradokso estas ke la ruliĝado malsupren de la vivo de Hasan Jeroi rilatas denove al Parizo. Kaj komenciĝis iom antaŭ ol li finstudi tie. Kun alia albano, studento. Jero loĝis en pensionejo, 65 strato Monsieur Le Prince. En la koro de la Latina kvartalo, diras li tutfiere, kaj gvidas nin tien. Lutage iu albana amiko, same studento, petis Jero-n helpi sampatrujanon, al kiu oni estis ĉesiginta la stipendion en Montpelie. La bezonanto nomiĝis Enver Hoxha³. Li venis en Parizon sen mono en la poŝo kaj sen iu plano por la estonto. Hasan Jero ne konis lin kaj neniam aŭdis pri Enver Hoxha. Sed li akceptis helpi lin. Li pagus por li la restoracion.

Natura solidareco inter studentoj, des pli inter sampatrujanoj, diras Jero sen ia pento por la faritaĵo. Sur lia malgrasa vizaĝo ludas junuleca rideto.

Li ankaŭ havis eblecon. Estis filo de riĉa familio.

Tiu solidareco longis kvin monatojn. Sufiĉa tempo por interkonatiĝu kun Enver Hoxha. Por ekscii ke la stipendio estis ĉesigita far la albana ŝtato ne pro iu ne agrabla politika motivo, kiel tion prezentus poste Hoxha mem en siaj pluraj aŭtobiografioj, sed ĉar dum la du jaroj li ne estis transpasinta eĉ unu ekzamenon. Li eĉ neniam estis sin prezentinta antaŭ la jurio en la universitato de Montpelie. Ĉi tiuj kvin monatoj estis ja sufiĉa tempo por ekscii ion pli gravan, kion Enver Hoxha pli poste ne volus scii iu alia. Li venas en Parizo sin apogite sur bastono. Ne pro snobismo aŭ junuleca kaprico. Li iradis envere malfacile. Post kelkaj tagoj li konfesis al sia bonfaranto ke li suferis de veneria malsano. Jero, kiel student de medicine, konsilis lin vizitiĝi ĉe la kuracisto. Kaj akompanis lin kelkfoje en la hospitalo Rocca. Certe, li ankaŭ pagis por la kuracdo.

Post ne tre longe ambaŭ troviĝus denove en Albanio. Ankaŭ en la milito. En la sama flanko, nature kiel antifaŝistoj. Kaj venkus.

Dekdu jarojn post la foriro disde "65, strato Monsieur Le Prince", fariĝinte la plej potenca homo de Albanio, ĝenerala sekretario de la Kompartio, ĉefministro, komandanto de la Armeo kaj ministro de eksteraj aferoj, Enver Hoxha ne estis forgesinta sian bonfaranton en la malfacilaj tempoj kaj

³ La estonta komunista albana diktatoro

rekomepencis lin per enkateniĝo pro la netolerebla akuzo: spiono de la sekretaj francaj servoj. Ne bezonis la pruvoj. Enver konis lin mem. Per la sama akuzo kaj maniero oni kondamnis ankaŭ la virtuozan tradukiston Jusuf Vrioni⁴. Kaj la plimulto de tiuj finstudintaj en Francio dum la jaroj tridek, period koincidinta al la komunista formiĝado de Enver Hoxha tie. Tial oni bezonus pereigi la maloportunajn atestantojn je speco de Hasan Jero. La nova dio de la lando devus esti libera por prilumigi sian pasinton konforme al la intereso de la ŝtatpotenco, kiun li strebis gardi ĝis la fino de sia vivo.

Ĉi tio estis ankaŭ la temo de la intervjuo, kiun miaj francaj amikoj Ĵan Lui Berdo kaj Miŝel Fore, ĵus komencintaj dokumentaran filmon pri Enver Hoxha, disvolvis kun la eksterordinara vizitanto albana, troviĝanta en Parizo.

Kafumante kune, Hasan Jero konfesas per infaneca ĝojo ke ĉi tiu reveno en la sankta urbo de la junularo notas lian definitivan venkon sur la teroriston Hoxha.

- Parizo estas ŝanĝinta sian aspekton- diras li dum momento de promenado.
- Nature, estas pasinta jam duonjarcento...
- Mi ne temas pri la novaj konstruaĵoj, daŭrigas li. Tiaj bonŝance ne estas multaj en miaj karaj lokoj.

Mi ŝultrotiras.

- Parizo fariĝis blanka, klarigas li. Estis ĝi griza. La tuta griza.
- Kiel estas pli bele? Demandas mi, dezirante paroligi lin.
- Blanka, respondas li senhezite, kaj aldonas: Eble mi eraras ĉar estas laciĝinta pro la griza koloro. En la prizono tuto estis griza. Malhela grizo. Parizo griza estis mirinda. Sed blanka ĝi plaĉas pli multe.
- Certe, blanka Parizo estas pli bela.

⁴ En la prizono Jusuf Vrioni tradukus la verkojn de Enver Hoxha. Li gajnis la titolon Kavaliro de Honoro de Francio

Enesperantigis **Bardhyl Selimi**

Fatos Lubonja

La Maro



Fragmento⁵

La transoceaniko “Vlora”

La sepan de aŭgusto 1991. La transoceanika ŝipo “Vlora” estis reveninta en la marhaveno de Durrës de longa vojaĝo: Francio- Nederlando- Kubo. Estis ĝi ŝargita kun sukero en iu kuba marhaveno kaj estis en la proceso de malŝargado.

La ŝipestro ekmiris, kiam vidis aron da homoj apud la ŝipo surborde. La homamaso pligrandiĝis iom post iom. Li ne sciis ke la marhavenon oni ne plu gardis. Dum tiuj du monatoj de la lasta navigado estis okazintaj multaj, ne aŭditaj antaŭe eventoj, aparte post la faligo de la monumento de la diktatoro, je 21-an de februaro samjare. La ŝipestro jam sciis ke aregoj da homoj estis enirintaj en la fremdaj ambasadejoj, kie ili estis petintaj politikan rifuĝejon. Ankaŭ aliaj estis atakintaj la fremdajn ŝipojn por navigi al Okcidento. Sed li

⁵ Ĉerpita el la Almanako Aleph, nr 21/2013 publikigita de la fondaĵo Allianz Kulturstiftung kun la Literarischen Colloquium Berlin kaj Ministrejo de Kulturo de Albanio

neniel pensis ke la aŝtato ne povus gardi la fierecon de nia ŝiparo, sian transoceanikon "Vlora".

Li rememoris ked um la diktaturo amiko lia estis rakontinta anekdoton, laŭ kiu, kiam oni demandis iun personon, kion li farus se la Adriatika Maro frostiĝus, tiu estis respondinta ke li tuj surgrimpus arbon. Kial do?- oni estis denove demandinta lin. - Pork e mi saviĝu, ĉar la homamaso povus piedpremi min ŝturmante por eliri disde la pordoj de ĉi tiu infero. La edzino estis konsilinta lin ne diri tiun anekdoton al iu ajn alia, ĉar, se la informacio atingus la Ŝtatan Sekurecon la plej eta malbono estus la maldungiĝo en la servo de la mara transportado. Kaj li preskaŭ estis forgesinta tion.

Nun li rememoris ĝin ĉar estis okazanta io pruvanta la profecion de ĉi tiu anekdoto. La maro ne frostiĝis, sed ĝin oni ne plu gardis kaj la homoj estis ŝturmanta al ĝi riskante eĉ siajn vivojn, por eliri disde la pordoj de la infero. Ili estis minacanta ankaŭ la vivon de la ŝipestro, kiun antaŭavertis ne foriĝi ĉar li devus konduki ilin al Italio.

La ŝipego "Vlora" ene de kelkaj minutoj, plenpleniĝis, tamen la homoj daŭre surgrimpis piedpremanante sur unu la alian, suprenirante kie eblis, eĉ ĝis la pinto de la fumtubo kaj la mastoj stariĝintaj sur la ŝipo. Oni sin ĵetis en la maron kaj naĝis ĝis la ŝipo, sin alkroĉis al la ŝnuroj ellasitaj de la homoj desupre kaj grimpis je la lerteco de la simioj ĝis kiam atingis la ferdekon.



La ŝipestro insistis diri ke la ŝipo bezonis riparon, ĉar, tiastate, ĝi riskis droniĝi, sed la homoj minacis lin kaj ordonis ekveturigi.

La atestantoj rakontas ke en la ŝipo estis silent, prikonsiderante ke tie ariĝis ĉirkaŭ 15 000 personoj. Eble ĉar multaj deziris revadi dum tiu vojaĝo. Inter la pasaĝiroj estis iuj, kiu scias kiom, kiuj estis vidintaj la transoceanikon de la marbordo, en la atendovico enmare, ĉe la horizontaj pordoj dividintaj la diktaturon disde la alia flanko.

En la ŝipo ekzistis ankaŭ granda solidareco, rakontas la atestantoj.

Sed en la alia marbordo, ilia emocia stato ŝanĝiĝis je drameca maniero. Tie ilin atendis la itala polico kiu forprenis ilin disde la ŝipa kaĝo kaj enfermis en alia kaĝo: en la stadiono de Bari kie la revoj por bela vivo en Italio transformiĝis en seniluziiĝon kaj klopodojn por havigi al si iom da akvo, iom da pano, kiun oni alĵetis ilin el la italaj helikopteroj. De solidareco ili sin turnis al bestioj, forprenantaj la panon de unu la alia.



La plimulton el ili oni revenigis en Albanion tra la sama maro per grandaj tragetoj. La aliajn oni revenigis per aviadiloj.

La okazintaĵo kun la ŝipo “Vlora” notas la daton kiam en la orienta marbordo estingiĝis la ĝojsento pro la finiĝo de la Malvarma Milito kio igis unu flankon venkanta akcepti malfermbrake la viktimojn de ĉi tiu milito dum ĉi lastaj ŝturmis al ili por peti protekton, rifuĝejon, saviĝon, laboron, kriante: “Nun mi estas libera”. Mia familio estas libera!”.



La maro, dum kelkaj monatoj estis turniĝinta en malfermitan elirpordon al la libero, sed nun la malfermitaj brakoj, estis fermitaj, kaj kun ili, ankaŭ la pordoj de Adriatiko kaj Jonio.

Estis komenciĝinta alia milito, je alia speco, kontraŭ la moviĝlibereco. Ĉifoje tio ne estis malvarma milito, nek varma milito. Estis ja ĝi la milito de la riĉuloj en la Okcidento por defendi sian bonfarton de la superbordiĝo far de la malriĉuloj.

La maro turniĝis en la teritorio plej tragika de ĉi tiu milito. La maraj kronikaĵoj komenciĝis pleniĝi je kadavroj de siaj viktimoj. Estis ĝi tute ne egala milito. Ankaŭ la rimedoj ĝiaj estis ne egalaj. La malriĉuloj uzadis ĉefe skafojn kaj gumboatojn. Ĉi lastaj estis iaspeco de navigebla rimedo, nekonata antaŭe, ankaŭ por ili mem, kies ĉefa karakterizaĵo estis ilia alta rapideco. La riĉuloj posedis potencajn fregatojn kaj helikopterojn, ekipitajn per armiloj kaj ĉio necesa por patroli la maron.

La malriĉuloj ne atakis iu ajn. Ili navigadis ĉefe dumnokte kaj havis ununuran celon, atingi la marbordon kaj eniĝi en la teritorion de la riĉuloj, nededektite. Malaperi kiom eble plej multe. La riĉuloj klopodis plejeble por kapti ilin kaj revenigi en sian patrion. La maro estis turniĝinta en estaĵon duforman: unu havis la blankecon de la esperiga lumo por eliĝi transen kaj la alia la nigrecon de la nokta profundeco de la risko je droniĝo en ĝi. Por la riĉuloj ĝi estis pli ol grandega aliancano ĉar ĝi estis ne transpasebla baro natura por la plimulto de la malriĉuloj, dum por tiuj plej frenezuloj, kuraĝintaj defii ĝin, povus plenumi ankaŭ tiujn laborojn kiujn ili ne dezirus plenumi per siaj propraj manoj.

La eta ŝipo

En la longa kronikaĵaro de ĉi tiu milito, kie la “profunda” maro kontraŭstariĝas al la maro kiel “eliro”, produktante tragediojn, estas du eventoj kiuj impresigis senforviŝeble la memoron de la malriĉuloj.

La 29-an de marto 1997, en la marhaveno de Vlora, ĉirkaŭ cent dudek homoj, inter ili multaj virinoj kaj infanoj, estis grimpante en eta ŝipo de la mara militista ŝiparo. Estis ĝi ŝipo ĉirkaŭ dudek metroj longa kun tri etaj kajutoj destinitaj nur por havenaj servoj, kiuj normale povus enteni ekipaĝon el ok naŭ personoj sur sia ferdeko. Estis tago, sed ili insistis ekveturi plej baldaŭe. Kial navigi dumnokte, kaŝe? Ili havis fortan pravigon. Strebis eskapi la ĥaoson de anarkia stato okupinta la landon kaj kiun la fremda preso nomis civila milito. Ankaŭ mem italoj estis forlasintaj haste Vlora-n pro tio. Oni estis alvenintaj kaj forprenintaj la italojn per ŝipoj kaj helikopteroj. Dum ili estis pagintaj de 500 mil ĝis unu miliono la italaj liretoj pokape.

La banditoj kontrolintaj la tutan operacion, kolektis la monon kaj ordonis la ŝipstiriston ekveturi.

Dume la pasaĝiroj ne povus scii ke en la lando de la riĉuloj estis komenciĝinta la kampanjo de la lokaj balotoj kaj la temo por haltigi la barbarojn estis la plej varma en la politiko; ĝuste tiutage, en la plej granda ĵurnalo de la lando de la riĉuloj, “Corriere della Sera”, deputitino de la Parlamento estis ellasinta la alvokon ke, por bremsi la invazion far de ĉi tiuj barbaroj, ilin oni devus “alĵeti en la maron”. Des malpli, ili ne sciis ke tiujn tagojn la ministro pri la eksteraj aferoj de tiu lando estis skribinta la ilian ministron de la ĥaoso ke ili ofertus helpon al la registaro por kontrolado de la albana maro por malhelpi la fuĝon de la homoj al Italio kaj ĉi lasta estis respondinte ke la albana registaro estis tute konsenta je tio.

La ŝipeto forlasis la havenon de Vlora je la tria posttagmeze. Apud la insulo de Sazan ĝi prenis pliajn tri personojn, kiuj estis foririntaj per boato. Tamen, ankoraŭ ne elirinte en la internaciaj akvoj, ekaperis la itala fregato nr 577 “Zeffiri”, ia naviganta kastelo, kiu komencis akompani ĝin, jen unuflanke, jen en la alia flanko, malhelpante la ties vojon. El la ferdeko de la fregato oni

kriegis per laŭparolilo, ke la ekipaĝo de la ŝipo estus arestota dum la aliaj estus reveninigotaj patrien. La albana ŝipo respondis per blanka flago kaj montrante la infanojn.

La akompanado daŭris ĝis la sesa posttagmeze kaj poste la fregato "Zeffiro" malaperis. Post iome, ekaperis alia fregato F 558 "Sibila", akompanata de helikoptero. Ĝi komencis blokigi la vojon por malfaciligi al la ŝipo ke ĉi lasta iru malantaŭen.



Ĉitempe la maro estis forte perturbata. Ĝiaj ondoj, kiuj plialtiĝis kiam alproksimiĝis Sibila, balanciĝis minace la etan ŝipon. La ties stiristo manovradis, jen maldekstren, jen dekstren por eviti kunfrapiĝon, sed ne retroveturante. Poste la pasaĝiroj vidis ke "Sibila" estis notinde alproksimiĝante, eĉ pli proksime ol dudek metrojn. La eta ŝipo ekbalanciĝis danĝere. La homoj swingis ĉion blankan, kiun havis en la manoj. Unu virino levis super sia kapo sian infanon. Sed, ĉirkaŭ la 19-a horo, kiam jam noktiĝis, la fregato, vole aŭ nevole, alproksimiĝis tiel apude kiel frapis la etan ŝipon. Estis tio la fatala frapo far de ŝipo kvar fojojn pli longa, tri fojojn pli larĝa, du fojojn pli rapida kaj dudektri fojojn pli peza. La eta ŝipo pezis nur 56 tunojn dum Sibila 1285. La frapo droniĝis la etan ŝipon kiu pleniĝis je akvo kaj tuj droniĝis.

El 120 personoj kiuj estis sur la ferdeko, dronmortis 81, inter kiuj 31 estis sub la aĝo 16 jara.

Tragedio de la 9-a de januaro

Vespere, je la 9-a de januaro 2004, la skafisto de iu gumboato sin konjektis rekte per la portebla telefono kun la televida kanalo "Top Channel". Li demandis, alarmite, helpon ĉar estis rompiĝinta la motoroj kaj tiel la gumboato estis restinta en la kaptilo de la ondoj de la ŝtorma maro, kun 31 personoj sur ĝi.

La aŭtoritatoj ne reagis. La oficialuloj de la polico, siaflanke, deklaris al la ĵurnalistoj ke la maro estis ege perturbita, kun ondoj 5 metroj altaj kaj tio malhelpis al la savrimedoj atingi en la okazintejo. Almenaŭ tiel ili diris. Ili pludiris ke la ordofortoj nur malmulte da horoj antaŭe estis signalintaj pri gumboato ŝarĝite per drogo, ne per homoj, ekirinta de la bordo de Jonio kaj, laŭ ili, temis pri la sama gumboato.

La morgaŭon, la serĉanta helikoptero dedektis de malproksime gumboaton pluskinta meze de tekoj, valizoj, plastaj sakoj plenigitaj per personaj aĵoj, en maro poluita ĉirkaŭ ĝi per fuelo. Alproksimiĝinte, la pilotoj vidis, ke sub la piedoj de manpleno de homoj ankoraŭ vivaj, svingante la manojn por peti helpon, estis stako de kadavroj. Dekok viroj kaj virinoj estis mortintaj pro la malvarmo. Dekunu aliaj estis en siaj lastaj spiroj.

"La ondoj estis tiel grandaj kiel la tuta akvo eniris en la gumboato".

"Mi aŭdis bruegan krakon kaj vidis flamon kiu tuj disvastiĝis. Bruliĝis la motoroj kaj ni restis".

"Ni vidis ke estis malbona vetero, sed la skafistoj insistis ke en tiaj kazoj estas pli facile eskapi disde italoj" - diris kelkaj el la survivintoj.

"La rezistado de la homo al la malvarmo estas diversa ekster la akvo kaj en la akvo. Oni klopodis moviĝi por varmiĝi, sed alvenis punkto kiam ili apenaŭ povis levi eĉ la brakon. Kiam la homa cerbo rivevas malpli da sango, ĝiaj

funkcioj reduktiĝas. Oni rimarkas malrapidiĝon de la movoj ĝis paraliĝo kaj malfacilaĵoj en la enspirado, kondukantaj al la morto” - diris itala medicinisto ekzamininta la kadavrojn.

Enesperantigis **Bardhyl Selimi**

Nota: jen du interesaj videoj kun filmetoj realaj tiutempaj

<http://www.youtube.com/watch?v=swbxwcE6Z5c>

<http://www.youtube.com/watch?v=GZxfQEXaKoE>

Fatos Kongoli:

La Perdinto



3

La blankan hundeton de Vilma mi venenigis por venĝi. Ĉi tiu ago ne havis alian enhavon. Kiel infanon, mia memo ŝajnis al mi tutegala al la ĉiuj infanoj je la senco kiun pvas havi kaj povas doni dekdujarulo al la socia egaleco. Eksterdube tiutempe mi apenaŭ havis kompleksojn, min ne enkondukis en la kategorio de bastardoj, do en la specio de sensortuloj, nek Vilma-n en la kategorio de hundetoj, tio estas en la specio de feliĉuloj. Ke

ambaŭ mi kaj Vilma apartenis al la diversaj specioj, mi ekkomprenus pli malfrue. Tio estus ankaŭ la dua traŭmo. Sed tiutempe min regis la unua traŭmo, post la batado, kiam mia patro perdiĝis antaŭ miaj okuloj. Por tio devus pagi la hundeto de Vilma. Por ke Vilma proradu tagnokte. Por ke Dĵoda rabiigu pro ĉagreno.

Ĝi estis beleta hundeto. Kiel ĉiuj hundetoj kaj bojegis ĉe la ferkrado, kie eligis sian muzelon kiomfoje preterpasis kelkiu apude. Tiel ĝi bojis ankaŭ al mi. Estis varma posttagmezo kaj Vilma sidis sur eta seĝo ĉe la ŝtuparo, koncentrita en la legado de libro. Tial, je la unuaj bojoj ŝi ne kaplevis. Tamen mi ne moviĝis kaj la hundeto, sinĵetinte al mi, skuis la tutan kvartalon. Tion mi jam estas kalkulinta. Enuiĝinta finfine, Vilma kaplevis. Ŝiaj okuloj alfiksiĝis al la miaj. Estis helaj kiel la marakvo. Ni konatiĝis, sed neniam babilis inter ni. Kontinue ni estis en diversaj paralelaj klasoj. Kaj, la veron dirante, tiujn momentojn apenaŭ mi emis babili kun Vilma.

Komence, ŝi malrektigis la vizaĝon pro malkontento kaj defore kriis ion kiel "Maks, bubaĉo, venu ĉi tien". Poste, ĉar Maks, apenaŭ intencis konvinkiĝi, ŝi ekstariĝis, lasis la libron sur la seĝo kaj preskaŭ kurante alvenis je nia direkton. Mi restintis malatentigite. Maks trankviliĝis nur post kiam la mastrino prenis ĝin en siaj brakoj. Ruĝiĝinte mi inventis ion kiel rideton. Diris ke ŝi havis beletan hundeton. Ne hastu, reagis Vilma, ĝi orgojliĝos kiam aŭdas laŭdojn kaj [ro plezuro pretpretas ekmordi kiun ajn preterpasanta antaŭ la domo.

Subite mi forkuris, foriĝis. Vilma plurestis malantaŭ la ferkradoj kun Maks. Multajn jarojn pli malfrue, rememorante tiun scenon, kiun ŝi same memoris, eksplikus ke mi ŝajnis al ŝi stranga. Kiel vi

rigardis min, kiel vi okulfiksis min. Pli poste mi eliris ĉe la ŝtuparo kun Maks, ŝajnigix mi kvazaŭ legis. Envere mi atendis ke vi preterpasu, revidu min ankoraŭfoje per tiu stranga maniero. Neniu knabo rigardis min tiel kam mi ne komprenis tiun deziron por atendadi. La impresio ke vi preterpasus iutage apud la ferkradoj neniam disŝiris ĉe mi ankaŭ kiam ci sekvis universitaton kaj en la urbeto oni diradis ke vi amaris kun vidvino. Sed ci ne plu aperis. Dum mi atendadis, kvankam ci venenigis Maks-on. Mi ploradis kvazaŭ estis mortinta parenculo. Kaj denove mi atendadis. Certa ke vi neniam plu aperus.

Ekde la momento kiam mi foriĝis forkurante, ankaŭ mi estis certa ke ne plu preterpasus tien. Kiam Vilma levis Maks-on surbrake kaj ekparolis min, mi sentis ke se restus ankoraŭ iome tie, mi ne plenumus mian venĝon. Mi ne scias kiel tion ekspliki, sed mi sentis ke se mi restus ankoraŭ iome paud Vilma, aŭskulyis la voĉon, vidi la okulojn, rigardu kiel ŝi karesis la makzelon de la hundeto, mi apenaŭ kapablus venenigi Maks-on. Kaj se mi ne venenigus Maks-on, Vilma ne plorus. Kaj se Vilma ne plorus, Dĵoda apenaŭ krevus pro ĉagreno.

Maks-on trafis doloriga fino. Antaŭ ol ni plenumi la krimon, Sherif demandis de mi eksciu kiu estis la preferata nutraĵo de ĝi. Post multaj klopodoj, tra knabo kiu iradis ofte al Vilma,- estis ja parencaj- mi eksciis ke la plej ŝatata nutraĵo de Maks estis la ŝafida hepato, boligita. Mi trovi ĝin. Sherif kuiris ĝin kun la venenon de la hepatoj de la bastardaj hundoj. Maks-on ni mortigis iun posttagmezon, kiam Vilma estis eliginte ĝin, kiel agis ofte, por promeni enla randoj de la urbeto, kie komenciĝisla agrotroj.

Sherif rakontis min ke li estis alloginte forte, dum kiam Vilma babilis kun amikino. Maks estis mortinte tuj. Pli poste, ĉio ruliĝis rapidece.

La morgaŭon vespere Sherif alvenis al mia hejmo. Li neniam estis ĉe mi, kaj ĵus rimarkinte lin apogate ĉe la balustrado, mi divenis ke io estis okazinta. Min maltrankviligis ankaŭ alia kaŭzo: tiun tagon Sherig ne ĉeestis en la lernejo. Li aspektis timigita, petis min eliri por babili ie, kie neniu povus vidi, nek aŭdi nin. Mi konsentis. La mallumo helpis nin eviti kaŝe la urbetocentron.

Me rimarkite ni atingis apud la kvartalo de la riverbordo kie lokiĝis malantaŭ dornejo. Sherif tremis. Poste ekploradis, ĝis mi eksciis pri la afero. Ĵus sciiĝinte la mortigo de Maks, oni estis proklaminta eksterordinaran staton en la urbeto. Ĉirkaŭ la tagmanĝo- klarigis Sherif- en mia hejmo alvenis la direktoro. Kune kun li ankaŭ du policistoj. Ili demandis pri la patro. Mi ne scias pri kio ili babilis ekstere, sed mia patro revenis enen nervoplene kaj ĵetis siajn manojn al mia gorĝo. Mi sufokigos cin per miaj manoj se ci estas farinta tiun aferon, diris li.

Povra Sherif, estis mortanta pro timo. Estis certa ke la patro sufokigus envere. Sed tiu teruro apenaŭ estisio antaŭ la alia, probable pli timegiga. Kvankam li ne ĉeestis en la lernejo, Fagu kun sia klano sukcesis trovi lin, tie ĉe riverbordo. Ĉiuj duboj direktiĝis al li. Oni estis bateginta lin minacante ke oni nepre mortgus lin se ne konfesus la veron. Sherif estis maljesinta ĉion. Ĝute tio, ke li maljesis ĉion, igis malesperan lian staton. Ne kredis al li eĉ la patro, nek Fagu. Fine, larmookule, kisantemian manon, mi neniel povas forgesi, li kliniĝis kaj kisis la manon- Sherif petegis

min por ke mi savu lin. Alie, ne estis alternativo, nur droniĝu en la rivero.

Mi ne devis longe pripensi por decidi. Sgerif estis mortanta pro teruro. Mi, kiu instigis lin en ĉi tiu kudo, devus fari ion. Kaj ĉi tiu io estis konfesi kulpa mi mem. Mi akceptis. Ne pro timo ke li sufokigus sin, kvanakm mi kredis ke li farus tion en tiaj kondiĉoj. Mi decidis akcepti la aŭtorecon de la krimo, ĉar mi eksentis ke mi eltenus eĉ la inferajn suferaĵojn, sed neniel liajn abomenindajn kisojn de mia mano. Se mi ne kulpigus min, Sherif alvenus ĉiutage por kisi mian manon. Kiel batita hundo.

La konfeson mi faris al Fagu. Tiel la novaĵo atingus tuje al la ĝusta loko kaj mi havus sufiĉan tempon por pretiĝi anime por la ekspektato. Fagu okulŝiris, estis ja la plej malkredebla konfeso kiun li aŭdis. Li konvinkigixs nur kiam mi eksplikis ke la murdon mi plenumis por venĝi kontraŭ Dĵoda. Ĉiuj sciis ke Dĵoda anta nelonge estis bateginta min. Tial mia venĝo konsideriĝis legitima, eĉ en tiu maniero. Fagu ne povis tuŝi min, alie havus problemojn. Neniu el la bubaĉoj de lia klano pardonus se li, pro Vilma, aŭdacus malbontrakti min.

Tiel okazis. Tiutempe Fagu estis pli altstatura ol mi kja, sendube, pli forta. Kolerigite, li ridis malestime. Kaj foriĝis. Ekde tiu tago mia vivo fariĝis neeltenebla. En la urbeto oni ekrigardis min kiel krimulon. En la lernejo, antaŭ la gelernantoj enviciĝintaj en la granda korto, mia gesto konsideriĝis kiel vagabondaĵo neniam aŭdita plenumita en la urbeto. Oni demetis du notojn en mia konduteco, plue ekskludis tri tagojn disde la lernejo. Alie ol mi antaŭvidintis, la unuan lignobaton mi ricevis ne de Dĵoda, kiu eĉ ne provis inviti min en la direktorejo, sed de mia patro. Ĉi tiu neniam

estis batinta min. Batis min ĵus reveninte de la policstacio, kien oni estis alvokinte por respondi por mi. Kiel tion mi sciis poste, tie li estis paginta rekomepencon al Dĵoda, monsumon je 3-4 miloj da Lekoj. Ankoraŭ hodiaŭ por mi ne estas klara ĉu mia patro punis min pro la gesto, pro la mono elspezenda, aŭ pro la timo penetrinta en lia medolo kiam estis alvokite en la policejo. Kiel ajn, ekde tiu tempo, mia patro eklernis tiun metion. Sed, se li eklernis bati, mi eklernis batiĝi. Kaj, kiam la homo al kutimiĝas per batado, nenio alia plu impresigas lin.

Ismail Kadare:

La filino de Agamemnono



Ĉapitro unua

El la strato audiĝis solena muziko, laŭtaj voĉoj kaj obtuzaj paŝoj de pasantoj - tiu precipa bruo, kian faras amaso da homoj irantaj al la kunvenejo antaŭ la marŝo.

Ŝajne jam por la deka fojo mi iom deŝovis kurtenon kaj senĉese havis antaŭ la okuloj la saman vidaĵon de la homa torento, fluanta malrapide al la urbocentro. Super ĝi, kiel antaŭ jaro, leviĝis paneloj, florbukedoj kaj portretoj de la membroj de la Politika Buroo, Iliaj vizaĝoj aspektis pli rigidaj super tiu amasego da kapoj kaj manoj. Kaj nur de tempo al tempo, pro mano-movoj de la portantoj ili kvazaŭ flankenĵetis siajn rigardojn. Sed eĉ kiam ili rigardis unu la alian, ili impresis tiel, ke ili ne konas sin reciproke.

Mi kunŝovis la kurtenojn kaj ekvidis, ke mi tenas invitilon. Unuafoje mi estis invitita al la honora tribuno kaj kiel en la momento, kiam oni donis al mi la invitilon, mi ne povis ekkredi, ke sur ĝi troviĝas mia nomo. Nekredemon mi vidis ankaŭ en la okuloj de la anstataŭanto de la Partia sekretario. Oni ne povas diri, ke ili montris nur envion. Kaj ne mirinde. Mi ne apartenis al tiuj, kiuj sidadis ĉe la prezido-tabloj kaj staradis sur la festo-tribunoj. Kvankam - kiel mi eksciis poste, la anstataŭanto de la sekretario persone elektis min, ĉar la distrikta komitato de la Partio deziris novajn nomojn, kaj ne ĉiam la samajn, ripetatajn ĉiujare, li plu ne kaŝis sian miron. Efektive li transdonis mian nomon kun aliaj, sed verŝajne li ne kredis, ke la nova listo estos akceptita. Ĉiufoje ili parolas tiel, eble li pensis, sed kiam estas la festo, iras la samaj kiel ĉiam.

„Mi gratulas, mi gratulas!” - li diris, enmanigante la invitilon, kaj tiumomente ŝajnis al mi, ke en lia rigardo, krom la envio kaj mirego, estis io pli. Ia brilo interna, en kiu mi rimarkis samtempe ion ruzan. Eble pli taŭgus la vorto „ridetaĉo”. Mallonga, trabora, iom kanajla, sed precipa, kiel ĉe la homoj kunigitaj per fadeno de interkompreno. Lia ridetaĉo ŝajnis paroli: „La invitilon vi ne ricevis senkaŭze, kolombeto, ĉu ne? Kion vi faris, per kio vi meritis ĝin. Mi gratulas, ruzulo!”

Ĉi tiu demando estis tiel klara, ke mi ruĝiĝis. La sento de kolero ne forlasis min dumvoje al la hejmo, kiam mi demandis min kelkfoj: ĉu vere mi meritas tian honoron?

Pro la stratbruo mia loĝejo ŝajnis pli kvietaj. Kvietaj kaj malplena. Ĉiuj foriris por kunveni antaŭ la marŝo, kaj miaj paŝoj anstataŭ pleniĝi la ĉambrojn, nur plifortigis la impreson pri tio. La silento kaj malpleno estis eksterordinaraj, kiel ĉio okazanta en tiu ĉi tago.

Mi atendis Suzanan. Sed tio, kio min afliktis, tute ne similis al la timo, kiu plej ofte akompanas la atendadon de knabino. Estis sento pli turmenta - certe pro la muziko kaj bruo aŭdiĝantaj el la strato. De tempo al tempo mi havis la impreson, ke iu portreto leviĝos super mia fenestro kaj enrigardos la pentritaj, malgajaj okuloj kaj mi aŭdos la vortojn: „Kion vi faras ĉi tie? Aĥ jes, ĉu atendas vin malplena loko sur la tribuno, ĉar vi aranĝis rendezuon kun knabino?”

- Se mi ne venos duonon post la oka, ne atendu min - diris Suzana.

Ĉiufoje, kiam mi rememoris tiujn vortojn, mi rigardis malgraŭvole la kanapon - lokon de nia lasta interparolo. Malgaja ĝis doloro. Suzana estis duonnuda kaj ankaŭ ŝiaj vortoj estis tiaj - duonklaraj, interrompitaj. Pli kaj pli malfacile ŝi povas renkontiĝi kun mi. Ŝia patro ĉiutage grimpas sur la ŝtupojn de la kariero. Pli malkaŝe ol ĝis nun ŝia familio aperas publike. Antaŭ du semajnoj, dum la plena kunsido de la Centra Komitato, li atingis novan ŝtupon. Do, memkompreneble, ŝi devus nun ŝanĝi la manieron de sia vivo, kunulojn kaj vestojn. Ĉar alie ŝi malutilos por la patro.

- Ĉu li postulis tion de vi (mi ankoraŭ ne sciis, kiel nomi „tion”) aŭ vi mem decidis?

Ŝi rigardis min atente.

- Li - ŝi respondis post momento - sed...

- Nu?

- Kiam li klarigis al mi ĉion, mi konsentis, ke li pravas.

- Ĉu vere?

Mi sentis, ke miaj okuloj ruĝiĝas, kvazaŭ iu estus ŝutinta plenmanon da sablo. Pro kulposento ŝi alpremis la kapon al mia brako. Ŝiaj fingroj - kiel malvarmaj vitrotubetoj kun breĉeta rando - traŝoviĝis sur miaj haroj kaj nuklo.

Sed kial, mi volis demandi, kial ĝuste vi? Infanoj de aliaj superuloj ĝuadas la vivon, kiel ili volas. Aŭtoj, dancadoj en vilaoj ĉe la maro. Certe mi krius al ŝi tion, se ŝi ne estus dirinta. Tiuj donas al siaj infanoj pli da libereco. Kaj ŝia patro... Vere li estas stranga. Neniu scias, kiaj pensoj bolas en lia kapo!... Kaj eble li tute ne estas stranga, kaj nur havas tiajn principojn? Per tio li diferenciĝas de aliaj kaj ĝuste tial li avancas. Do, se li staros dekstre de la Gvidanto sur la unua-maja tribunio, inter ni ĉio estos finita.

Mi ne respondis kaj tiam ŝi ekpensis, ke mi ne komprenis ĝis la fino, kion ŝi diris. Bonvolu, ŝi plorĝemis, Por li, tio signifas por la opinio pri li, ne estos akceptebla, ke ŝi enrudigis en amaĵon kun la junulo, kiu estas fianĉo de alia knabino. Iun tagon tio estos malkaŝita. Precipe nun. Ĉu vi komprenas? Tio estos malkaŝita.

Mi ne sciis, kion respondi. Mia rigardo sin kroĉis al ŝiaj nudaj piedoj.

- Ankaŭ por vi tio malutilos - ŝi diris post momento.

- Ne gravas.

- Nun vi parolas tiel, sed vi bedaŭros. Precipe nun, kiam vi esperas vojaĝi al Vieno por specialiĝi.

Mi plu gapis al la nudaj partoj de ŝia korpo. Mi konfesas, ke mi ne estis certa, ĉu mi povus ŝanĝi tiun blankan, glatan korpon je iu alia, eĉ Vieno. La elizeon de ŝiaj koksoj kun triumfa arko, sub kiu ardas la eterna fajro.

Neniam mi renkontis virinon, kiu en la momentoj de ekstazo ridetus tiel dolĉe, kvazaŭ pro volupta sonĝo. Kaj volupto glitis de ŝiaj vangostoj sur la blankan kusenon, kiu - malplena post ŝia foriro - ŝajnis brili dum kelka tempo en mallumo, kiel ekrano de televidilo, kiu sendas brilon ankoraŭ kelkajn minutojn post elŝalto. Ĉio en ŝi deziregis amon kun tuta sindonemo, ardoplenan kaj fortan.

ANEKDOTOJ EL SHKODER-ALBANIO

Pardonpeto

Post longtempa kverelado la edzino forlasas la hejmon kaj iras al ŝia patrino. Ŝi revenas post tri monatoj.

- Ĉu vi pardonos min pro la forlaso, mia kara?-petis la edzino sian edzon.
- Mi pardonas vin pro la forlaso, sed ne pro la reveno!

Suspekto

- Aŭskultu, kara edzo!- Ŝajnas al mi ke vi flirtas kun fremdaj edzinoj.
- Ne, mia stultulino. Mi apenaŭ flirtas kun tiuj enlokaj- senkulpigis sin la edzo.

La homo mortas nur unufoje

- Kiel tio eblas? Estinte fianĉita, vi estas dirinta ke vi pretas morti por mi, dum nun..
- Nu, la homo mortas nur unufoje..

Klarigo

- Junulo renkontis la patron de lia amantino kaj petis de li permeson por geedziĝi.
- Antaŭ ol decidi- diris la patro mi devas konvinkiĝi ke mia filino ne kunvivos apud stultulo.
- Ne zorgu pri tio, ni kunvivos tre malproksime de ĉi tie.

Tuso

- Dum promenado la edzino tuis de fojo al fojo.
- Ĉu via edzino malvarmumis-diris iu konato renkonte al la geedza paro.
- Ne ŝi estas saniĝanta- respondis la edzo.- Ankoraŭ ne aĉetinte la robon ŝi estis malsana, nun ŝi tudas por atentigi sin.

Kie estis la kapo

- Kolerigite pro sia edzino, edzo malbenas:
- Al diablo! Mi ne povas rememori kie estis ja mia kapo tiun malbenitan momenton kiam mi decidis geedziĝi kun vi.
- Mi diras –intervenis la edzino- tio estis sur mia brusto.

Geamantoj

- Junulo suspektanta por sia amantino petis ŝin:
- Ĉu veras ke mi estas via unua amanto?
- Sendube jes, mia kara. Estu certa je tio. Vi eĉ estas la plej simpatia inter ili.

La vera kaŭzo

Edzino kolerigite al la edzo, iutage estis kriante:

-Ĉu vi vidas tiujn ĉi meblojn? Se ne estus mia mono, ili ne estus ĉi tie. Ankaŭ la aŭto, sen mia mono ne estus ĉi tie. Eĉ la domo, sen mia mono..

-Sen via mono ankaŭ mi ne stus ĉi tie- interrompis ŝin la edzo.

Paloka

En riĉa familio el Shkoder servis viro nomata Paloka. Oni kulpigis lin pro ĉio malagrabra okazinta en la hejmo. Ekz. Oni forgesis la kuirajn sur forno , pro tio kulpis Paloka, rompiĝis io- denove oni kulpigis Paloka-n, falis surteren iu el la gefiloj, la kulpo estis ĉe Paloka..

Ununokte la dommastrino estis ege maltrankvila kaj moviĝis rapide tra la hejmo.

- Kio okazis sinjorino-petis ŝin Paloka.
- Nenio, Paloka, la novedzino estas naskanta bebon.
- Oh, mi povrulo! Ankaŭ pri tio oni kulpigos min- kriis Paloka.

Propono

-Ĉu vi akceptus ke mi fariĝu la suno de via vivo?

-Certe jes. Mi estus tre feliĉa troviĝi je 150 milionoj da kilometroj for de vi.

Aliaj albanaj anekdotoj

Deputito

La kandidato por deputito aldiras al sia elektantaro: mi petas vin kompili liston kun aferoj bezonataj de vi je rekompenco de via voĉo por mi!

Ekvidinte la liston la kandidato konstatas ke ĉiuj bezonas hejmon, escepte de unu kiu bezonis hararon ĉar li estas kalvulo. Tiam la kandidato ordonis al sia sekretario ke ankaŭ la tiu kalvulo noti hejmon.

La kalvulo protestis: mi volas hararon, ne hejmon!

La kandidato respondis: ne protestu envane ĉar ĉiuj vi ja lanajn ricevos!

Novedzino

Iu reĝo havis filinon malsaĝan je aĝo por edziniĝo. Sed li ne volis ankoraŭ edzinigi ŝin. Pro tio li petis sian filinon rifuzi ĉiuj geedziĝproponojn dirante ĉiamfoje nur "Ne" al la demandoj: ĉu vi volas edziniĝi?

Sed iufoje venis iu saĝa junulo kiu demandis ŝin: Ĉu estas vere ke via patro ne volas edzinigi vin?-Ne-respondis la junulino.

Ĉu la patro kontraŭus nian geedziĝon?- Ne –respondis denove la reĝa filino!

Ambigua vorto

La edzo revenas hejmen tre laca kaj petas sian edzinon: diru al mi ion kio samtempe ĝojigus kaj malĝojigus min!

-Nu bone, respondas la edzino: La peniso de nia najbaro estis tre malgranda!

Trafikpolicistoj

Du malsaĝaj trafikpolicistoj veturantaj per Fiat Uno haltigis aŭtilon je tipo Audi A4 kie veturis kvin personoj.-Kial vi haltigis nin, petis la veturantoj?!-Ĉar vi estas ja kvin personoj dum la aŭtilo notas A4!- Aha, tiam kial vi veturas per Fiat Uno dum vi estas du personoj?!..

Skeleto

Dumnokte je apudeco de la tombejo stariĝas la skeleto de iu mortinto kiu volas timigi la hazardajn preterpasantojn. Ekvidinte viron, li postsekvas lin petante cigaredon. La viro tute indiferece respondis: Mi admonus vin rezignu de la fumado, ĉar vi aspektas tre malgrasa!

Ne profesiulo

La edzo laboris fore de sia hejmo, pro tio li venis tien nur unufoje semajne. Lia edzino plendis ĉiam ke io difektiĝis kaj la edzo ne riparigis ĝin. Ekzemple iufoje difektiĝis la akvokrano sed la edzo respondis: mi ne estas hidraŭliko, tial mi ne povas ripari ĝin! Aliffoje difektiĝis la ŝrankoseruro, sed denove la edzo sin pravigis per: mi en estas seruristo!

Post iom da tempo, la edzo konstatis ke la akvokrano kaj la ŝrankoseruro estis jam bone riparitaj. Li demandis la edzinon: kiu riparigis ilin?- Tion faris nia najbaro.-Bone, kion postulis li je rekompenco?- Fakte li demandis min kuiru kukon aŭ surlitiĝi kun li.-Certe vi kuiris kukon, ĉu ne?- Kial do, mi ne estas dolĉaĵisto!

Hebreo

Iu hebrea maljuno estis mortante. Li petis: kie estas mia kara edzino?-Ĉi tie mi estas, kara-respondis la edzino.-Kaj mia kara filino?- Ankaŭ mi ĉeestas, kara patro- Kaj mia kara filo?- Ĉi tie, mia kara patro.- Nu, kiu deĵoras nun ĉe la butikoj?...

Drinkemulo

Iu drinkemulo havigis al si vodkon sed mankis al li drinkmanĝo. Tial li eliris al la marbordo por kapti fiŝon. Sed la fiŝo kaptita estis tre aparta, tute ora kaj ĝi petis la viron ke li lasu ŝin libera ĉar ĝi plenumus al li almenaŭ tri dezirojn. –Nu, bone –respondis la drinkemulo. La unua deziro mia estas ke la tuta maro transformiĝu al vodko.-Bone, farite, diris la ora fiŝo kaj la maro envere envodkiĝis.-La dua deziro mia estas ke ĉiuj riveroj transformiĝu en vodkon.-Bone, farite kaj la riveroj envodkiĝis..La tria deziro, la lasta estas ke vi alportu min du glasetojn da vodko!...

Prostituino

Du patrinoj fanfaronis unu al la alia pri siaj filinoj.- Mia filino, diris la unua, trovis bonan laboron en Italio. Per siaj enspezoj ŝi sukcesis eĉ aĉeti domon, aŭtilon kaj sendis monon ankaŭ al ni. Kaj via filino?- Ankaŭ la mia estas prostituino-respondis la dua..

Plus minus unu metron

Babilis tri viroj, unu greko, unu italo kaj unu albano. La greko diris: ĉe ni en Grekio estis turo 1435 m alta, je proksimeco plus minus unu metron.- Oh, diris la italo, ĉe ni estas ponto je longeco 3245 m je proksimeco plus minus unu metron.- Dum ĉe ni la virinoj naskas siajn bebojn el la buŝo!—Neeble-kontestis la du aliaj.- Mi volus diri: je proksimeco plu minus unu metron-klarigis la albano.

La varmego

Konkuris arabo, nigrulo kaj albano. La arabo diris: ĉe ni estas tiom varmege ke ni bakas la panon sursable.- Dum ĉe ni oni fritas eĉ la ovojn sursable-aldonis la nigrulo.- La albano konkludis: ni manĝigas la kokinojn per glaciaĵo por ke ili ne ellasu boligatajn ovojn..

Nia propagando

Nova informilo en la albana

Lastatempe aperis nova informilo pri Esperanto en la albana. Por tio kontribuis teamo de fremdaj samideanoj gvidata de prof. Renato Corsetti. La informilo eldoniĝos en 5000 ekzempleroj kaj estos liverata al ni senpage. Jen kiel ĝi aspektas:

Esperanto eshte një gjuhë tërheqëse, njësoj sikur ajo të mësohet për të njohur njerëz në tërë botën, për të gjetur miq apo miq të zemrës, për të llafosur edhe në rrjet, për të koresponduar me mesazhe apo me letra, për të udhëtuar apo për ta vënë pak më shumë në punë pjesën gjuhësore të trurit.

Për shkak të gramatikës së thjeshtë, të rregullt dhe me një sistem fjalëformues tepër efikas, Esperanto mësohet më shpejt se gjuhët e tjera.

Esperanto përdoret në mbledhje dhe kongrese të shumënumurta kombëtare dhe ndërkombëtare në mbarë botën. Nëpërmjet shërbimit të mikpritjes 'Pasporta Servo', mund të bujtësh pa kosto te esperantistë dhe kështu të përjetosh drejtpërdrejt format jetësore në qytete dhe/apo vende të tjera.

Prej një kohë të gjatë ekziston edhe letërsia origjinale dhe e përkthyer, muzika, radio dhe televizioni në Esperanto. Në Esperanto gjithnjë ka tema interesante për çdo gjë, veç kësaj ajo kënaq dëshirën për të mësuar gjuhë të tjera dhe gjithashtu e lehtëson mësimin e atyre gjuhëve.

GJUHA NDËRKOMBËTARE

Për të dëgjuar Esperanton

www.ameriko.org/radiokubo

Kurset e Esperantos

kursi-i-esperantos-subscribe@yahoogroups.com

Mëso Esperanton

www.lernu.net

Muzika në Esperanto

www.vinilkosmo.com

Esperanto në botë

www.esperanto.net

Esperanto në Shqipëri

www.esperantoshqipria.weebly.com

albanaj-esperantistoj-subscribe@yahoogroups.com

http://uea.org/landoj/orienta_europo/albanio.html

Esperanto në Evropë

<http://www.europo.eu/>

<http://www.esperanto.it>

<http://www.esperanto.de>

Të dhëna të tjera

Adresa dhe adresa në internet e shoqatës esperantiste në Shqipëri

Bardhyl Selimi, rr. Fortuzi 9/1/3 Tirana 1016

bselimi@gmail.com

Nehat Sokoli

Esperanto estas adoptita kiel unu el la laborlingvoj de “Monda Unio de Bonpo”.

Samtempe "MUB" decidis inviti esperantistinon Eruda Li kiel sian honoran konsilantinon

(“国际雍仲本教联合会”决定采用世界语作为工作语言,同时聘请李仁芝女士为该会的荣誉顾问)
(“Monda Unio de Bonpo”)

La “Monda Unio de Bonpo” (mallongigo MUB) lastatempe faris decidon, ke Esperanto estas adoptita kiel unu el la laborlingvoj de MUB, por tutmonde propagandi la Mahajanon (unu el la budaismaj skoloj, kaj Bonpo estas plej antikva mahajano bazita sur altruismo) kaj pli vaste profitu al popoloj tra la mondo .

Esperanto estas kreita surbaze de hindeŭropa lingvo fare de pola judo, d-ro L.L.Zamenhof en la jaro 1887. La kerna ideo de Esperanto estas forigi lingvan baron en la internacia komunikado, dezirante, ke homoj el diversaj nacioj kun malsamaj haŭtkoloroj harmonie vivu en unu granda familio kiel gefratoj.

Esperanto estas la lingvo gramatike logika, belsona kaj esprimriĉa. ĝi estas internacia helplingvo plej vaste uzata tra la mondo. Troviĝas esperantaj organizoj kaj esperantistoj en preskaŭ ĉiuj landoj aŭ regionoj de la mondo.

Estas multaj mondfamaj verkoj kaj klasikajoj en Esperanta versio, ekzemple la Biblio, la Korano, ktp.....

Samtempe MUB decidis inviti esperantistinon Eruda Li kiel sian honoran konsilantinon.

Sinjorino Eruda Li estas pia budaismulo kiu instruis Esperanton en universitato de Ĉinio. Eruda Li estas la fondinto kaj prezidanto de Hongkonga Esperanto-Asocio, prezidantino de Universala Ligo Kultura kaj Arta kaj servas kiel direktoro de Ĉina Esperanto-Eldonejo. ŝi kelkfoje okazigis enlande kaj eksterlande solo-koncertojn por prezenti ĉinajn popolkantojn en Esperanto. En la jaro 2004 ŝi eldonis la diskon “El Granda Ĉinio”.

Pri ŝi legeblas konciza biografio en la libroj: 《WORLD PERSON DICTIONARY 》 kaj 《THE DICTIONARY OF CONTEMPORARY CELEBRITIES OF WORLD – WIDE CHINESE 》 .

La Jongŝon-Bonpo (雍仲本波) originis en antikva Ĝang ĝungo (Zhang zhong 象雄)(nuna tibeta regiono A-li) ĉe la monto Gangdise (冈底斯神山. Bonismo (雍仲本教) apartenas al Mahajano (大乘佛教), la plej antikva Budaismo en Tibeto, kiu, kun pli ol dekok mil jara historio, nutras la grandiozan kaj pompan antikvan Ĝang ĝung-an civilizacion, kiu troviĝas en la kategorio de "Mondaj Kulturaj Heredaĵoj".

Budao Shenrab Mivo (Shenrab Miwo 幸饶弥沃如来佛祖) estas la fondinto de Bonismo. Li estis princo de la antikva regno Ĝang ĝungo kaj ankaŭ la majstro de la antaŭa ekzisto de Budao ŝakjamunio (ŝakjamunio estas la kvara Budao en la historio)

Bonismo estas la ŝtata religio de la antikva Ĝang ĝung-regno. Tuj post la kreo de Jongŝon-Bonpo, Budao Shenrab Mivo kreis la skriban Ĝang ĝung-lingvon, kiu estis adorata kiel “sankta Jongŝon-hieroglifo”. Ĝi estas ankoraŭ uzata de tre

Nepalo. Li instruis kvin disciplinajn sciencojn: teknologio, lingvistiko, medicino, astronomio kaj budaismo.



Ĉu Filipinoj jam pretas por la Internacia Lingvo?

En sia eseo Albert Stalin T. Garrido, 15-jara ĝenerala sekretario de Filipina Esperantista Junulara Asocio, miras, kial la multaj junuloj, kiuj nun pro interreto malkovras Esperanton kaj lernas ĝin, tamen ne pretas labori por ĝi. ”Ĉu ankoraŭ indas daŭrigi la komencitan laboron rigardinte al la nuntempa situacio?” li demandas – kaj respondas jese.



Ĉu la Respubliko de 7107 insuloj jam pretas por la Lingvo de nenombreblaj popoloj?

Ankaŭ min tiu ĉi demando ĉiam ĝenas. Por la Esperanto-Movado ties loĝlando ne ŝajnas scii pri tiaj ĉi aferoj, tiu ĉi demando ja restas respondenda, kiu plejeble bezonas pli da paĝoj por plene respondi.

Bonvenon al tiu ĉi respubliko de 7107 insuloj kaj preskaŭ 100 milionoj da civitanoj. La pasinta Esperanto-Movado en la Respubliko estis simila al la ondoj kiuj kolizias kun la plaĝoj kaj sabloj ĉie troveblaj ĉirkaŭ la insularo: fojfoje altiĝas, sed poste retroiras kaj silentas. Mi volas ŝanĝi tion. Mi volas fari ke la Movado en la Respubliko estu inda je komparo kun la forta [Narra-arbo](#) (la nacia arbo de Filipinoj) kiu kreskas kaj restas fortikega kaj malfacile hakebla. Aktuale, tio anstataŭe estus la tutmonda Esperanto-Movado, ĉar ĝi efektive jam fariĝis forta tra la jaroj, okaze de moderniĝo, memstariĝo de multaj landoj, kaj akirado de pli fortaj strategioj interne de ĝi kaj de ĝiaj kadroj. Sed la situacio ene de la 7107 insuloj estas malsama. Kial do?

Estis fondita antaŭ ok jaroj la Esperanto-Asocio de Filipinoj (EAPF) de profesoroj kaj aliaj eruditoj, precipe de diversaj universitatoj en la ĉefurbo, Manilo, kaj ĝiaj ĉirkaŭaj urboj. Tamen, estas surprize ke la prezidantino tiam elektita mem ne parolas Esperanton. Ŝaŭ, vere mirinde! Malgraŭ tio, estis ĝojige, ke poste okazis la 1-a Filipina Esperanto-Kongreso, dank' al la helpoj de s-roj Bharat Ghimire de Nepalo kaj Hori Yasuo de Japanio kiuj klopodis por la vigligo de la Esperanto-movado en Filipinoj. Sed poste, kio okazis en la Esperanto-Movado en Filipinoj? Ĉio nuliĝis. Preskaŭ ĉiuj forlasis. La asocio mem disiĝis kaj nenie la personoj malantaŭ ĝi troveblis. Esperanto, denove, estis nekonata por la milionoj da loĝantoj de tiuj insuloj, kaj ĝia Movado, preskaŭ mortinta sed, eble, renaskiĝonta.

Preskaŭ 7 jarojn poste, kvazaŭ ĉio ŝanĝiĝis. Jen tiuj gejunuloj, jes, junaj, kiuj ekestis kaj malkovris Esperanton, koincide samtempe! Dank' al la potenca Interreto kiun oni libere uzas preskaŭ ĉie en la lando, ili povis trovi unu la alian pli facile kaj rapide, kvankam ili ne povis mem renkontiĝi pro malproksimeco inter ties loĝlokoj, la komunikado inter ili ja ekfloris. Tiam, mi kredas ke jam renaskiĝis la ankoraŭ malforta, malgranda, sed evoluanta Esperanto-Movado en Filipinoj.

Tamen, inter tiuj gejunuloj ne eblas facile vekti la intereson, ke ankaŭ ili partoprenu en la Movado. Jes, ili estas tiuj kiuj emas studadi kaj volas fine ellerni la lingvon, tamen iliaj okuloj apenaŭ rigardas al la Movado malantaŭ la lingvo. Kial mi diras tion ĉi? Pro persona sperto, mi devas konstati. Unue, kelkaj estas tiel junaj ke ne ili povas mem agadi kvankam ili emas, ekzemple C. J. T. Quines, mia amiko kaj samasocio, estas nur 13-jara sed jam regas la lingvon sufiĉe bone, sed mi tute ne povas devigi lin ke li agu por la Movado, pro lia aĝo. Aliaj tute ne emas koncentriĝi pri la Movado, nur pri la lingvo, kaj iliajn interesojn mi preskaŭ tute ne povas vekti. Ekzemple, mi jam babilis kun iu samlandano kiu diris al mi ke li ne volas partopreni en la Movado, nur studi la lingvon kaj bone regi ĝin. Due, mi preskaŭ eniris kverelon kuraĝigante alian samlandanon por aliĝi al nia asocio (notu bone: 'kuraĝigante', ne 'devigante'), en kiu li ankaŭ diris, ke li ankoraŭ ne pretas agi por la Movado, emfazante sian okupiĝon pri siaj akademias aferoj. Mi devis agnoski lian decidon kaj tute ne povas kontraŭi lin, sed mi devis agnoski ke ankaŭ mi okupiĝas pri akademias aferoj sed ankoraŭ havas tempon movadi iom post iom por Esperanto, ke mi povas ĝui pli da aferoj ol ili. La bonaĵojn kiujn mi akiris, gajnis, mi meritas, ĉar mi ja agadis por ilin akiri. Jes, mi agnoskas ke mi membriĝis al UEA pere de la Fondaĵo Canuto kiu helpis al mi malgraŭ transpagaj malfacilaĵoj, sed post ĉiuj premioj kaj meritoj, mi vere kredas ke ankaŭ ili meritas tiujn! Cetere, fine, mi konsentigis tiun samlandanon aliĝi al

la asocio, dirante al li ke li ne devas fari ion ajn, kaj jam sufiĉas membriĝi al la asocio. Li fariĝis nia 4-a membro.

Kiel bonas bone regi la lingvon sed ne aktivi en la Movado malantaŭ ĝi? Sen la Movado mem tiu parolanto eble neniel povus malkovri Esperanton. Ĉu ili meritas esti nomataj kiel 'samideanoj'? Al tiuj pri kiuj eble tiu ĉi artikolo parolas, pardonu, sed mi ne incitas vin kaj ne devigas vin ke vi fine aliĝu al nia asocio aŭ movadu kun ni, sed ja tute pli bonas kunlabori kun tiuj kiuj mem agadas ke la lingvo estu disvastigita kaj konata de pli kaj pli da personoj tra la tuta mondo, tamen mi respektas vian decidon, kaj lasas vin, sed esperante ke vi ŝanĝos vian penson. Bonvolu konsideri. Esperanto, ja estas tiu, kiu esperas!

Filipinoj, kvankam estas konata kiel haveno de pliboniĝanta ekonomio kaj de multaj vidindaĵoj kaj vizitindaĵoj en kiuj miaopinie Esperanto estus efika kaj utila afero, estas la lando kiu havas multajn tutlandajn problemojn, financajn, politikajn, sociajn, religiajn: jen militeto inter la registara armeo kaj la islamaj ribeluloj en la provinco Zamboanga, jen malriĉeco, malsato, jen la problemego pri la registaro kies oficoj jam estas koruptitaj laŭ pruvoj kaj atestantoj. En la lando kies civitanoj estas preskaŭ malliberigitaj en tiajn problemojn, oni preskaŭ tute ne havas la volon aŭ tempon pensi pri "eksteraj aferoj", en kiuj oni povas inkluzivi tiel nomatajn planlingvojn kiel Esperanton. Ankaŭ la movadanoj estas malliberigitaj en tiajn situaciojn, malfacile trovante la vojon eksteren. Aliflanke, ekzistas ankaŭ lingvaj problemoj, ekzemple la rifuzo de la parolantoj de Visaja paroli la Tagalogan pro historiaj kialoj. Do, ĉu jam povas eniri Esperanto? Ĉu ankoraŭ estas solvo, aŭ almenaŭ espero?

Do eniras la jenaj demandoj: *Ĉu Filipinoj jam pretas por la Internacia Lingvo? Ĉu ĝiaj 7107 insuloj jam pretas renkonti kaj kunvivi kun la Lingvo de nenombreblaj popoloj? Ĉu ankaŭ Filipinoj meritas ĝui la bonojn de la Internacia Lingvo, kiujn jam delonge ĝuas multaj landoj tra la tuta mondo? Ĉu ankoraŭ indas daŭrigi la komencitan laboron rigardinte al la nuntempa situacio?* Kiel gvidanto de la nuntempa, nove starigita Esperantista junulara asocio en la lando, Filipina Esperantista Junulara Asocio (FEJA), fondita antaŭ unu monato, tiu demando ĉiam restas kaj neniam foriras de miaj menso kaj koro.

La asocio mem esperas ke pli da homoj malkovru kaj ekhavu intereson pri Esperanto. Ja necesas pli da agadoj kaj materialoj por ke la Internacia Lingvo pli kaj pli sukcese disvastiĝu tra la tuta lando. Ĉu ĉi ĉio nur estas revo de junulo kiel mi, kies celoj pri Esperanto kaj Filipinoj ne estas tiom klaraj? Ĉu ĉi ĉio nur estas iluzio, kaj neniel realiĝos? Ĉu ĉi ĉio estas celo tro alta por esti atingita? Ĉu ankoraŭ estas tro frue malfermi la okulojn de la malriĉa, kompatinda lando Filipinoj pri tio ĉi, ke ekzistas iu Esperanto kiu celas solvi la lingvajn barojn kaj defendi homajn rajtojn? Pri ĉi ĉiuj demandoj, mi kredas ke ne. Ni ja estas junuloj, sed junulojn oni opinias la esperoj de la lando! Laŭ fama poemo de nia nacia heroo d-ro José P. Rizal, kiu mem estis poligloto, la junularo estas la espero de la lando, kaj nun, miaopinie el ili kreiĝos multaj mirindaĵoj kaj novaj esperoj, el kiuj la lando povos konstrui sin pli fortika, kaj pli aktiva. La Internacian Lingvon d-ro L. L. Zamenhof prezentis al la tuta mondo almenaŭ 9 jarojn antaŭ la morto de D-ro Rizal, kiu tiam estis en Eŭropo vojaĝante kaj farante multajn verkojn. Eble Rizal mem ekkonis Esperanton, sed neniu scias.

La Esperanto-movado anstataŭe revas pri tiuj junuloj, kiuj ekestos kaj malkovros la Lingvon kaj ekhavos la emon studadi ĝin, kaj fine eklernos pri la movado, kaj, eksciante pri ĝiaj bonoj, agados kun la jam movadantaj uloj. Universala Esperanto-Asocio (UEA) mem dependas de tiuj lingvemuloj. Ankaŭ ni. Fakte, ĉiuj, ĉar sen ili, la movado neniam tiel kreskos.

Filipinoj klopodadas iri laŭ la vojo de moderniĝo, kaj mi esperoplene kredas ke ankaŭ Filipinoj meritas ĝui la bonojn kiujn donas Esperanto mem -- la bonoj neniam pageblaj per mono aŭ iu materialo: interkompreniĝo, amikeco, lingva egaleco, kaj intelekta pliboniĝo. Aliajn bonojn oni povos akiri per sia propra maniero aŭ agado. Ne estas tro frue, nek malfrue por ankaŭ Filipinoj havi sian propran kreskantan, aktivan Esperanto-movadon, kaj ankoraŭ ne estas tro malfrue ekregajni ĉion sopiratan. La Esperanto-movado en la lando ja estis kiel ondoj kiuj iras kolizante kun la ŝtonoj kaj sabloj kaj poste retroiras kaj silentas, sed ĉio ŝanĝeblas. Afriko, kies landojn mi opinias eĉ pli malriĉaj ol Filipinoj (kvankam Filipinoj fakte estas triamonda lando en kiu ĉie troviĝas amasoj da malriĉaj popolanoj), havas tian ĉi komunumon, Kiel ne ankaŭ la Respubliko kies ĉirkaŭaj landoj jam havas Esperanto-komunumojn?

Mi nur povas certiĝi pri unu afero: Filipinoj, se ne nun, ja ekscios pri Esperanto. La tutmondiĝo dezirata de ĉiuj Esperantistoj ja dependas de tiuj unuopuloj kiuj mem havas la intereson (tamen ne nur de la unuopuloj ili dependas). El tio, la malgranda fajro vivanta en siaj koroj pli kaj pli pligrandiĝos. La nuna Ĝenerala Direktoro de UEA/TEJO S-ro Osmo Buller ankaŭ diris, ke mi estas la filipina Hector Hodler, kiu en sia 18-a jaro sukcese fondis la Universalan Esperanto-Asociacion, kaj mi dankas al s-ro Buller pro tiu komplimento kiu efektive donis al mi la honoron kaj plezuron. Ja troveblas kaj videblas la potenco kiun la junularo povus formi, se ili nur agadus kune! La Internacia Lingvo, mia opinie estas ĉiam preta por ĉiuj, kiel Filipinoj. Ĉu Filipinoj jam pretas por Esperanto? Pri tio, nu, ni scios.

Albert Stalin T. Garrido

28-an de oktobro 2013

Valenzuelo-urbo, Filipinoj

Kiosko-esperanto propagandisto



Jen kiel ankaŭ en la kioskoj oni propagandas Esperanton (Brazilo)

Gratulojn al Alicja Lewanderska

SEMAJNO - INFORMILO - 19 -

PREMIO
ADA
SIRKORSKA
20013
AL
ALICJA
LEWANDERSKA
QUEDNAU



Nunjare la Premio Ada Sirkorska Fighiera estas aljuĝita al s-anino Alicja Lewanderska – Quednau.

Plian fojon, estas rekonita la laboro de la virino en la grandaj defioj, kiujn havas la homaro por atingi vivon plej feliĉan. Kaj en ĉi tiu tasko, cele plibonigi la vivon de ĉiu homa estaĵo, la lingvo havas eksterordinaran rolon. Kompreni unu la alian, almenaŭ lingve, estas io, pri kio la homa konscio devas meti ĉiujn siajn fortojn intelektajn kaj fizikajn.

Nu, kion diri pri nia kara Ada, kio ne estis jam dirita. Ŝi estis vera lumo, kiu inundis la mensojn de multaj hispanoj, kiuj aliĝis al tiu paca batalo, kiu estas Esperanto.

Pri Alicja la senditaj proponoj, kiujn ni ricevis, evitis al ni dubi al kiu atribui la Premion. Kvankam ni jam konis ŝian senlacan laboron, ni restis mirigitaj de tion granda dediĉo por la solvo de la lingva problemo, pri kiu la plej altaj aŭtoritatoj, kun ia escepto, restas mutaj kaj blindaj.

La virino ne nur estas patrino, ankaŭ ŝi aliĝas en tiuj taskoj kiuj dignigas la homon kaj sen postuli nenion. Dankon.

Esperanto-kurso en la elementa lernejo

de Pietro Fiocchi

Saluton Avo Li!", tiel la infanoj bonvenigis profesoron Li Weilun en elementa lernejo, kiu nomiĝas 'Eterna Paco'. Post nia frua alveno profesoro Li akompanis min viziti la lernejon kaj konatigis min kun la geinstruistoj.

Dum nia promonado tra koridoroj kaj ŝtuparoj, atendantaj la tagmanĝon kaj la postan ĉiusemajnan lecionon de Esperanto, ĉiuj infanoj, kiujn ni renkontis, ĝoje salutis sian avon Li, kiu same aspektis tre feliĉa denove esti kun siaj junegaj gelernantoj.



La infanoj bonvenigas profesoron Li Weilun.

Tiam mi rememoris tiun frazon, kiun profesoro Li kutimas ripeti en malsamaj okazoj, kvazaŭ moto por priskribi sin mem: "laŭ la aĝo mi estas maljunulo, laŭ la sano mi estas junulo, laŭ la koro mi estas infano". Tie mi havis la impreson vidi aparte saĝan infanon inter infanoj.

Mi preskaŭ surpriziĝis vidi, ke en unu el la koridoroj ĉiu ĉambro havis trilingvan ŝildeton, sur kiu en la ĉina, angla kaj Esperanto estis indikita la uzado de la ĉambro: i.a. la kunvenejo, manĝejo, oficejo de la geinstruistoj kaj se mi bone memoras, ankaŭ la necesejo havis sian trilingvan ŝildeton. Mi vere ŝatis la iniciativon de la estraro de tiu lernejo kaj mi pensis, ke estus bele se ankaŭ en aliaj lokoj publikaj aŭ ne de Pekino oni farus same, ekzemple en parkoj, muzeoj, malsanulejoj, restoracioj kaj tiel plu.



Tri-lingva ŝildeto apud la pordo de la kunvenejo.
Multaj aliaj ĉambroj havas similajn trilingvajn ŝildetojn.

Ni tagmanĝis kune kun la lernejestro, kiu kvankam ne scipovas Esperanton, subtenas ĝian instruadon en la lernejo. Eble li konvinkiĝis pri la pedagogiaj virtoj de la lingvo kaj certe rimarkis, ke la infanoj ege amuziĝas lernante ĝin. Do, ekde 2010 en la lernejo eblas instrui kaj lerni la internacian lingvon, kiun instruas s-ino Yang Hongyan, instruistino de la angla lingvo. Tio okazas unufoje ĉiusemajne kaj la leciono daŭras pli –malpli unu

horon. Certe la tempo estas malmulta, pri tio ni ĉiuj konsentis, tamen tiu leciono jam estas io konkreta, eĉ fruktodona ni opinias. En Ĉinio oni diras, ke longa vojaĝo komenciĝas kun unu paŝo. Paŝon post paŝo oni atingas la celon, se oni dumvoje ne perdas paciencon kaj esperon. Bonŝance ekzistas kelkaj vivantaj ekzemploj, kiuj instigas daŭrigi nian klopodadon.



Dum la tagmanĝo: profesoro Li Wei Lun, la lernejestro S-ro Yan Wei kaj mi

En la klasĉambro la leciono komenciĝis: la infanoj, legante la verdan kursan libreton, kantis ĥore esperante gvidataj de sia instruistino. Profesoro Li aldonis sian voĉon al la ĥoro sidante kune kun la gelernantoj kaj mi sidis apud li. Mi sentis, ke mi estis partoprenanta vere ion specialan, kiun mi neniam forgesos. Eble kelkaj el la tieaj infanoj fariĝos poste bonaj esperantistoj/inoj, kiuj iel kontribuos al nia Movado. Por kelkaj aliaj Esperanto estas kaj estos helpilo en la studado de fremdaj lingvoj, precipe la eŭropaj (la infanoj tie lernas la anglan kaj supozeble daŭrigos ĝian lernadon dum la sekvaj jaroj). Mi aŭdis de ili mem, ke Esperanto estas por ili pli facila ol la angla, kiu fakte havas multajn neregulaĵojn. Certe por ĉiuj tiuj infanoj Esperanto estas nun amuza tempo kaj eble estos ĉiam bela memoraĵo de ilia infaneco.



Dum la kurso: la infanoj kantas esperante.

Post la kantetoj duope la infanoj antaŭ la klaso faris iom da konversacio esperante: "Saluton! Saluton al vi! Kiel vi fartas? Kien vi iras? Mi akompanas vin!" ktp. Aldone unu demandis la alian "kiom estas du kaj du? Kaj du

kaj tri..?" Iu knabineto ankaŭ min demandis kun iomete da infana malico "kiom estas naŭdek kaj kvindek?" "Cent kvardek!" mi diris, la adoltoj konfirmis kaj ŝi surpriziĝis pro mia tuja bona respondo. Eble mi devis ankaŭ diri al ŝi, ke kiam mi aĝis sep aŭ ok jarojn matematiko estis mia koŝmaro.



La infanoj duope interparoletas Esperante.

Profesoro Li gvidis la duan parton de la leciono kaj invitis min interparoli esperante kun la infanoj. Mi tion faris kaj la profesoro tradukis ĉiun frazon. Mi demandis la infanojn kaj ili demandis min pri ĝeneralaj aferoj. Mi diris, ke mi estas italo, do kie estas mia lando. Mi substrekis, ke per Esperanto ili povas amikiĝi kaj amuziĝi kun infanoj el la tuta mondo, ke poste eble Eo donos al ili ŝancojn multe vojaĝi kaj agrable turismumi. Mi rakontis al ili kiom da belaj aventuroj tra la mondo mi havis kaj havas per Eo, kiel ekzemple mia unujara viv-sperto en Pekino. Kiel ĉiam mi multe parolis, sed ŝajne ili atente kaj scivoleme aŭskultis min, kvazaŭ fabelojn mi estis rakontanta. Profesoro Li tradukis kaj aldonis klarigojn, same kiel li faras kun siaj gestudentoj en la Universitato, kun la sama plezuro kaj pasio transdoni scion pri lingvoj kaj humanecon, kiu laŭ mi estas grava parto de ĉia instruado.



Mi, apud la profesoro, aktive partoprenas la kurson.

Post la leciono sekvis babilado kaj kafo-trinkado en la oficejo de la instruistinoj de la angla lingvo, ili estas kvin aŭ ses, multnombraj mi opinias, se mi konsideras, ke dum miaj element-lernejaj jaroj, en la dua duono de la 80-aj jaroj en Romo, ni havis, se mi bone memoras, nur unu instruistino por la tuta lernejo. Ŝi estis s-ino el Britio

kaj mi ege ĝuis ŝiajn lecionojn. Post iom da tempo okazis, ke kelkaj el la gepatroj de la infanoj de mia klaso plendis pri la instruado de la angla lingvo, ĉar laŭ ili tio estis ne necesa afero, perdo de tempo: "ni estas italoj, ni loĝas en Italio, do ni parolu itale!". Ekde tiam ne plu eblis okazigi lecionojn de la angla lingvo por la tuta klaso de lundo ĝis vendredo. Iu patrino hazardis proponon: la infanoj, kiuj deziras daŭre lerni la anglan, povus tion fari sabate matene, ĉu ne? La lernejestrino kaj la afabla instruistino el Britio konsentis. Ni scivolemaj infanoj estis malmultaj kaj niaj gepatroj devis eĉ iom pagi, sed finfine post kelkaj kvereloj ni rajtis daŭrigi nian sopiratan lernadon. Tiam ni ankaŭ kantis, angle, por pli amuze memori vortojn kaj frazojn. Bela ludo estis por ni kaj vere ege utila. Certe tiuj infanoj de la lernejo "Eterna Paco" havas bonŝancon: ĉiuj rajtas senpage lerni la anglan kaj eĉ Esperanton, se ili tion deziras.



La gelernantoj, profesoro Li Weilun, mi kaj la instruistino, s-ino Yang Hongyan

Dum unu horeto en tiu oficejo mi iom pli konatiĝis kun s-ino Yang Hongyan, mirinda instruistino, kiu konstante kaj entuziasme instruas nian lingvon. Dum mia vojaĝo tra Esperantujo oftaj estas la seniluziigoj, tamen multegaj estas la agrablaj surprizoj, ankaŭ ĉi tie en Ĉinio, multe dank' al profesoro Li Weilun, kies senĉesa klopodado donis al la loka Movado multajn Esperanto-instruistojn.

Kiel kutime ili petis min skribi ion en la notlibro de la gastoj: mi dankis profesoron Li pro la vizito al la lernejo kaj aldone rimarkis, ke tiaj okazaĵoj estas ĉiam bela interŝanĝo de scioj kaj emocioj, ambaŭflanke fruktodona.

Natura simbiozo

Lastatempe mi plurfoje re-legis la paroladon de franca profesoro Charles Durand aŭditan dum la Gotenburga Universala Kongreso de Esperanto, sub titolo "La Esperantistoj kaj la asocioj defendantaj la naciajn lingvojn: Natura simbiozo"...

Pluraj samideanoj el pluraj vidpunktoj kritikis min, kiam mi petis subskribojn por subteni la peticion de la sikuloj por teritoria kaj kultura aŭtonomio de Sikullando kadre de Rumanio.

Mi kaptas la okazon elkore, publike danki la subskribojn de miaj pli ol 200 geamikoj.

Danke al la Televido Duna (Danubo) kaj Radio Kossuth, la 27-an de oktobro mi povis sekvi de la komenco ĝis la fino la Grandan Marŝadon de la Sikuloj. Ili estas la lasta nacia/etna minoritato vivanta en unu bloko, kiu en Eŭropa Unio ankoraŭ ne havas aŭtonomion. Pere de tiu ĉi Granda Marŝado ili petis de la nuna, rumana registaro teritorian aŭtonomion, kaj protestis kontraŭ la planoj de la sama registaro, kiu volas dividi Sikullandon en 3 partojn, kaj loki ilin en 3 diversajn regionojn, kie la proporcio de la sikuloj estus maksimume nur 30 %.

Pri la sikuloj/sekeloj kaj Sikullando/Sekellando oni povas esperantlingve legi en mia Ipernity-retejo: <http://www.ipernity.com/home/45435/496443> .

(vidu same la artikolon en ĉi tiu numero-noto de la redaktanto)

La Granda Marŝado komenciĝis per ekumenaj diservoj en urbetoj de Sikullando, kie la partoprenantoj - proksimume 120000-150000 homoj - kolektiĝis. Precipe plaĉis al mi la parolado de franciskana patro Csaba Bőjte (prizorganto de plurmil rumanaj, hungaraj kaj ciganaj orfoj en Sud-Transilvanio). Li tre bele parolis pri la paca kunvivado de la rumanoj kaj sikuloj. La sikuloj ne volas apartiĝi de Rumanio, ili volas nur teritorian aŭtonomion kaj memadministracion.

Dum la ekumena diservo en Kézdivásárhely oni povis vidi grandajn flagojn de Sud-Tirola, Katalunia kaj Vasklanda Aŭtonomioj. Apud multegaj, oraj-blujaj, sikullandaj flagoj mi vidis plurajn hungarajn flagojn kaj unusolan, polan flagon, kiel signon de la plurjarcenta, historia, pola-hungara amikeco.

Post la ekumenaj diservoj komenciĝis la Granda Marŝado, dum kiu la sikuloj-hungaroj kreis 53 kilometrojn longan, vivan ĉenon inter 14 setlejoj de Sikullando.

Kadre de mia Facebook-retejo kiu ajn povas rigardi 2-minutan filmeton pri la Granda Marŝado de la Sikuloj, klakante al la hungara titolo "A Székelyek Nagy Menetelése":

<https://www.facebook.com/ludoviko.molnar?fref=ts>

La 27-an de oktobro de Aŭstralio ĝis Usono ankoraŭ en 33 urboj de la mondo okazis simpatio-manifestacioj...

Kiel Profesoro Charles Durand diris:

"La esperantistoj ne nur promocias Esperanton. Ili ankaŭ postulas la rajton, kiun havas la popoloj por sia digno, pensi, labori per siaj lingvoj, vivi laŭ siaj propraj kulturoj, esti si mem plene kaj sentrude. La esperantistaj asocioj havas multajn, komunajn ecojn kun aliaj grupoj, kiuj kreiĝis dum la pasintaj jaroj dise tra la mondo kaj aparte en Eŭropo. Tiuj grupoj prizorgas la defendon de multaj naciaj lingvoj, kiujn la tutmonda plutokrataro ŝatus nuraj dialektoj, kaj kies rolo tiel iĝus esence folkloro. Jen kial alianco inter esperantistoj kaj la ĵus cititaj asocioj estas alte dezirinda."

Laŭ mia forta konvinkigo la naciaj/etnaj minoritatoj kaj lingvodefendantoj estas niaj naturaj aliancanoj. Ni, por-esperantaj agantoj devus subteni ilin. Se ili vidos nian konsekvencon subtenon, iom post iom ankaŭ ili subtenos nin. Ili - plenrajte - timas, ke ili mem kaj iliaj lingvoj pereos, malaperos. Tre verŝajne ili ankoraŭ ne scias pri Esperanto. Ni devas unue doni al ili nian amikan manon.

Multsalute

Ludoviko Molnár

prezidanto de la Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo

PS.: Kodado: Unicode (UTF-8), programo: Esperanta Klavaro (Ek)

<http://www.esperanto.mv.ru/Ek/index.html>

Ni funebras

Forpasis nia franca amiko Pol Dennis

La anonco

21/11/2013

Ĵus telefonis al mi Isabelle, la filino de Pol DENIS, nia senlaca ĉefredaktoro de LA INFORMILO, kaj ŝi informis min pri la forpaso de Pol pro subita koratako. Pol estis petinta kremacion kun ĉeesto de la nura familio. "Adiaŭ Pol ! Post longjara senlaca laboro por la sukceso de nia kara lingvo".
Edmond LUDWIG

Lasta nia korespondo kun li

31/10/2013

Laŭ via peto ĉe Edmond, jen la 163 "PDF". La venontajn vi ankaŭ ricevos tiamaniere, sed mi opinias, ke "viaj" gelernantoj ŝatus, ankaŭ *palpeble*, malkovri la bultenon. Nenia problemo, ĝin vi paralele ricevos ! (kvietiĝu pri la abono ! hi hi hi !)
Mi jam ekverkis pri la 164.
Plej amike, Pol

25/10/2013

BAR-le-DUC (France),
Bonjour Anisa !

Ĵapprends avec plaisir, selon une information de mon ami Bardhyl -votre "guide" !- que vous avez décidé de compléter "culturellement" votre étude de la technologie informatique par celle de l'espéranto ! Toutes mes félicitations !

Vous allez découvrir et utiliser rapidement un outil moderne d'intercommunication qui va vous ouvrir des perspectives multiples de contacts "hors frontières", autrement dit de "*mettre le monde à votre portée*" ! Avec tous mes encouragements pour vous souhaiter une assimilation facile de la "vraie langue internationale" !

Pol DENIS

Bonan tagon Anisa !

Mi plezure ekscias, laŭ informo de mia amiko Bardhyl -via "gvidanto"-, ke vi decidis kompletigi "kulture" vian studadon de informadiko, aldonante ellernon de Esperanto ! Gratulojn !

Vi tuj malkovros, kaj praktikos rapide, iun modernan ilon de interkomunikado, kiu ofertos al vi multfacetajn perspektivojn de kontaktoj "ekster limoj", ali-esprimite, ebligos al vi "*meti la mondon je via dispono*" !

Akceptu miajn kuraĝigojn por bondeziri al vi senpenan asimiladon de "la lingvo vere internacia" !

Pol DENIS

22/10/2013

Ni ĵus rehejmiĝis (antaŭ 8 horoj !) post duonsemajno en *Speyer* (renkontiĝo aŭtuna german-franca). Interesa programo sed nur 38 partoprenantoj (inter ili 9 francoj ...).

Vian mesaĝon mi malkovras inter ... 395 !

Espereble vi povos uzi libervole -senprobleme !- la aldonitan numeron de "La Informilo" laŭ PDF.

Plej amike de ni ambaŭ !

12/10/2013

Supozeble ĉio "glatas" por la tuta familio ! ... Vere pli ol simpatiajn ridetojn ofertas via idaro ! (laŭ du okultrafaj fotoj).

Ĉu vi povus havigi al mi la strat-adreson de *Gjergji Gusho* ? Li certe aprezus "nian" reportaĝon en "La Informilo"

163 (lia foto ene), kiun mi pretas sendi per poŝto ?
Antaŭdankon! Pol

7/10/2013

Mi certas, ke vi bonŝance ellernis la "tajp-arton" (*dactylographie*) ! Bulteno mi diru 100-paĝa, zorge ilustrita, kaj mi ne forgesu aludi la variecon de la pritrakitaj temoj ! Jen kio incitas min laŭte eldiri, ke la "Albana Instituto" ĝuas ĉekape elstaran sekretarion ! Ĉu vi malkovris efikan metodon por forigi la deziron de "normala nokto-dormado" ? ! ? ! ... Ĉu ankaŭ via komputilo ne "grumbblas" de tempo al tempo, pro ripozmanko ? ... :-) ...

Memkompreneble mi denove devas gratuli vin ! Mi komencis laŭ via propono legi la "literaturan" kaj kulturan parton de via ampleksa verkaĵo sed la ceteraj paĝoj meritas ankaŭ dediĉon, mi frandos ilin !
Plej amike, Pol

6/10/2013

Vi certe aŭdis pri grava polemiko en Francio, rilate al la "destino" de la rubaĵoj ne-uzitaj, produktitaj en la atomenergiaj centraloj, kaj kiuj estas daŭre radioaktivaj, do tre danĝeraj ... Oni kreis "*laboratorion*" specifan, 30 km-ojn de Bar-le-Duc (!), en la vilaĝo BURE, kaj oni boris puton, aktuale en la profundo de 500 m-ojn, cele esplori la geologiajn stratojn por eventuale kaj definitive (?) "enkarcerigi" la aluditajn "restaĵojn" ... Dezirante elmontri al la publiko la faratajn espoloradojn, la fak-entrepreno *ANDRA* proponas "ekskurson" funde de la puto ! Ni do "liftumis" malsupren (7 minutojn !) kaj "vizitis" ... Konfeseme sciigite, ni ambaŭ perpleksiĝas (? ! ? !).

Vi certe malkovros facile sur la foto, la du kontraŭatomajn gebatalantojn ! ! !

Plej amike, Pol kaj Mirej

4/10/2013

Memevidente ne malfruas por gratuli vin pro via diplomiĝo far UEA en la UK de Rejkjaviko ! Ni ambaŭ ja taksas tiun honorigon pli ol meritita, ĉar ni propraokule kaj "proprakore" konstatis konkrete vian dediĉon multfacetan al disvolvigo de nia dua lingvo; lasta "briko" (?) al daŭra solidigo de nia afero: ĵusa startigo de kurso en Tirana !
Plej amike, "koaleta kaj marmotino" !

PS - ĉu ni sciigis al vi niajn "kromnomojn", uzataj en tre intima rondo ? ... :-) ...

4/10/2013

La mesaĝon de Maria mi transsendis al Mirej ... kiu reagis tiel: "*Al la petita intervjuo mi provis elmontri kiomalloqa ĉiuvidpunkte (pejzaĝoj, homoj, kulturo) estas la lando, kiu plenplene ravis min, kaj kion indas ĝin konatiĝi ! ! Bedaŭrinde la "legantino" ne sentis tion kaj preferis kritiki tute aliajn punktojn ...*".

Se pruvon mi povas doni, jen kio mesaĝis komuna amiko, al kiu ni sendis la franclingvan "intervjuon" ...: "*Ben dis donc, Mireille tu me fais saliver ! J'ai vraiment envie de découvrir l'Albanie !*" ... Mi traduku en Eon: "*Nu, Mirej, ci "salivigas" min ! Mi vere ege deziras malkovri Albanion !*" ... Mi ne scias, ĉu la albana lingvo ankaŭ uzas la verbon "*salivi*" por konkretigi nepran allogon ! Oni ankaŭ ofte diras: "*J'en ai l'eau à la bouche*" ... "*Mi ja havas "akvon en la buŝo"*" (pro tio, kion oni vidas aŭ forte deziras).

.../...

Antunaj fulmotondroj kaj pluveto alvenis ĉi-tien !

Plej amike, Pol kaj Mirej

2.10/2013

Dankon pro sendo de la reago de *Maria Buton* ... Konfeseme tajpите, mi ne ŝatus korespondi kun ŝi ! Mi konsentas pri "atentigo" rilate al stilo aŭ eĉ al vortoj, sed ĉi-tie temas pri kritiko certagrade severa (esence al vi !!!... :-) ...). Ŝia aludo al la "franceco" de la geintervjuitoj perpleksigas min ... La cititaj "*francdevenaj Eo-vortoj (?!)*" estas strange elektitaj ! Ili **ja kuŝas en la PIV** ! Mi nur elvoku "*obeita*": Zamenhof esprimiĝis dirante "*Respektu Dion kaj la reĝon, kaj obeu la leĝon*". Nu, obei ja estas transvita verbo, mi do "ortodokse" rajtas respondi al Z, "*Dankon, ek de nun, la leĝo estos obeita*" ! Ĉu oni devas taksi tion

"francismo" " ? : ... Mi eventuale konsentas pri "valorizenda", sed la sufikso -iz pli kaj pli "ŝoviĝas" en la lingvon ! Hi hi hi ... Kiel ili partoprenis en la kongreso = ili enpartoprenis la kongreson (akuzativo !) !
Mi supozas, ke Maria Buto "abomenas" la lingvon de *Karolo Piĉ* !
Bone, mi cetere informos Mirej, ke ŝi *ne respondis al intervjuo* sed "rakontis vojaĝon" ! ? !...
Amuzis nin malkovri la "vojaĝon" ... albanlingve !

PS - "*La informilo*" 163 kuŝas (ĉu francismo ?) en la presejo (en la printejo !).
Plej amike, Pol kaj Mirej

1/10/2013

Oh oh Bardhyl, oni diras en esperanto, "*ĉapelo alten !*" (amuze, la francoj eldiras "*chabeau bas !*", kun la sama signifo !). Sed ĉu vi ne timas "suferigi" vian klavaron ? ...
Bonan nokton ! Vi meritas ! ... :-) ...

1/10/2013

Vesperan saluton !
Nu, plenumis "normale" niaj du serv-oficoj (("franca kaj albana Poŝto") sian taskon ! Daniel Moirand, la tradukinto -siatempo instruisto pri rusa lingvo- estas ja kuraĝulo !
Niaflanke, ni miris, ke vi kvazaŭ fulme legis la "intervjuon", kiun vi ilustris laŭ via emo ... Imagu, ke mi devis reduktis la reskton de Mirej je 4 paĝoj por "La Informilo" ! Ŝii gratulis min (kvankam, ke ŝi ne estas grat-ulino ? !), ĉar mia traduko kvazaŭ perfekte paralelas al ŝia franca teksto. Memkompreneble nia bulteno atingos vin, sed iom malfrue -en la presejo morgaŭ- Vi certe konscios pri mia cerbumado por elimini ggravajn sekvencojn !
Espereble la patrino kaj la bubetino reakiras iom post iom kontentigan sanstaton kaj vi ambaŭ ĝojas pri tio kaj la fotilo funkcias !
Nia kkasisto, André Grossmann tuj enpartoprenos Eo-semajnon en Kataluno. La paro vere ĝisfunde esperantumas de post la atingo de emeriteco !
Plej amike, Pol kaj Mirej !

28/9/2013

Nu, jen la sopirata intervjuo far *Rita Permeti* ! (2 partoj). Senkulpigon pro la sendo-malfruo, sed ni estis ambaŭ superŝutitaj je diversaj taskoj ! ... Kiel vi konstatos, Mirej dediĉis plurajn horojn al ne kutima verkado, kaj Pol same al tradukado paralele al ellaboro de "La infomilo" 163 ! (kiu ne ankoraŭ finpretiĝas ...). Verŝajne vi trovos kelkajn erarojn, kiuj eskapis je relegado ! Novan senkulpigon ! ...
Ĉion bonan al vi ambaŭ,
Plej amike ... kaj plej dankeme !
Mirej kaj Pol

26/9/2013

Jen severa konkurenco pri "reporteraĵoj" ! Antaŭ dudeksep jaroj mi vizitis Grekion per vojaĝ-agentejo. Ĉio ankriĝis en la memoro. Eta anekdoto ... En la monastero "*Les Météores*", ni aĉetis kandelon, naskis fajreton ĉe la ekstremaĵo, kaj demetis ĝin je la adekvata loko. Ĉe la ekstremaĵo de la koridoro, ni okulumis malantaŭen kaj ekvidis monaĥon, kiu forprenis ilin, forblovis la flameton kaj remetis ilin en la kesteton por esti denove venditaj !
! .../...

Vi sciigu kiam vi bezonus la intervjuon pri nia "aventuro" ... Mi ja devis nepre ellabori la bultenon 163 de "La Informilo"; preskaŭ farite (interalie 4 paĝoj pri la aludita amika kunĉeado !). Restas ankoraŭ kelkaj paĝoj anticipe verkitaj de Mirej, franclingve; ŝi ja tre detale respondis al la demandoj !
Ĝis ! Plej amike de ni ambaŭ !

25/9/2013

Bonan vesperon al vi ambaŭ !
Miavice, varman gratulon pro viaj klopodadoj, por alpoti "pluan sangon" al la landa Eo-asocio !
Dankon pro la okul-trafajn fotojn de la "idaro" ! Mirej taksas vian nepineton *gracia* (franclingve "*mignonne*").
Via filo laŭ ŝi estas "*Bardhyl n° 2*" ! ...

.../...

Via (baldaù !) pakaĵo survojas al vi ... ek de hieraù !

Nu, denove, pli kaj pli bonan farton al la patrino kaj al la bubetino !

Plej amike, Pol kaj Mirej

18/9/2013

Saluton al vi ambaù !

Esperable, la sanstato de la patrino kaj de la etulinetoo bone (normale) firmiĝas ...

.../...

Mi finpretigas la bultenon 163. Samtempe mi tradukas esperantlingven la sufiĉe longajn (jes !) respondojn de Mirej al la demandoj de la intervjuistino Rita Prermeti ...

Plej amike ! Pol

8/9/2013

Bonan vesperon al vi ambaù !

Nu, jen finfine evento, kiun la tuta familio atendis certagrade malkviete, kiu ebligas al vi ĉiuj dnove "spiri" ! Konstatiĝas, ke "patriniĝi" restas por ĉiu virino malfacila momento ne ĉiam "normala" ... Feliĉe via bofilino estis en spertaj manoj, kaj la tuta fak-skipo plenumis "sukcese" -mi ja konscias, ke tiu adverbo ne plene taŭgas- tre delikatan taskon. Memkompreneble mi transsendis vian mesaĝon al Mirej, kiu petas min alporti sian amikan "kunestadon". Ŝi plue konigis al mi detalojn, kiujn ofte por viroj restas iom nebulaj !

Ŝi kalkulas pri postaj fotoj de la idineto !... Imagu, ke mi ne bezonas memorigi la daton de la kalendaro, ĉar precize la 6an de septembro, miaflanke, mi naskiĝis ... antaù kelkaj jaroj ! Hi hi hi ! ... Mi deziras al la "pitĉuneton" (tre ofta *am-kromnamo* dediĉata, al freŝbakitaj beboj) vivon tiom longan kiel la mian ! Ah ah ah !

Plej amike al vi ! Pol kaj Mirej

5/9/2013

Konfeseme, "ni" ambaù estas superŝutitaj je plenumendaj diversaj taskoj ! Prizorgi "esperanton" -"La informilo", raportoj, traduko, ktp- estas nur unu el ! Pacienco pli oportunas ol "febra hasto" ! ...

Dankon pro via bild-serio elvokanta feritempon sur la "*albana lazur-marbordo*" ! Vi nepre sciigos vian - provizoran ? !- hejmuon, por ke mi sendu la aluditan pakaĵon !

Neatendite ni daŭre ĝuas "vian" klimaton, la ĉielo bluas kaj la termometron ni certe aĉetis en Tirana , hi hi hi ! ... Kompreneble ni volas ĝisfunde profiti la oportunajon kaj suferas certagrade la komputil-klavaro !

Plej amike, Pol

2/9/2013

Bona recepto de viaj "feri-bildoj" !

Kompense, jen diaporama de la monda evento, kiun mi jam aludis ! (40 km de "Mirej-domo" ... kaj 40 km de "Pol-domo" !)

7/8/2013

"Ni" ĵus rehejmiĝis (hodiaù matene !) post naŭ tagoj da trankvila malkovro de franca regiono, kiun ni nur supraĵe konis (ni uzis la domveturilon de Mirej, nome "la heliketon" ! ... Fotoj tre baldaù sekvos).

Mi ne ankoraù "filtris" la 452 mesaĝojn, kiun eniris mian ret-skatolon... Mi dediĉos grandan atenton alĉiuj viaj sendaĵoj ! Jam la raporton pri la prelego de Tatiana mi tamen tre atente legis !

1/ Antaù sendi la petitan intervjuon, ni deziras re-spekti - ... kun streketo ! ... - multajn kaptitajn fotojn, por pli interesige doni nian opinion pri tiu mirinda aventuro. Vi ja siatempe informis, ke la aludita teksto aperos *fine de trimestro en via bulteno* ...Vi eĉ aldonis... "*Ne hastu !*" .

2/ Grave: sciigu al mi la daton de via propra reveno al Tirana post via feri-tempo en Grekio; mi ja intencas sendi "ion" al vi, kaj mi ŝatus, ke tiun "ion" havigu al vi "enmanen" la leter-portisto... :-) ...

.../...

Senkulpigu pri la iom "kurta" mesaĝo hodiaŭaĵa !
Plej koramike de ni ambaŭ !

29/7/2013

Tutcerte ekridetos vi legante mian informpeton... Mi ja ne plu memoras la nomon de la restoracio en kiu ni kunkune vespermanĝis ! ! ! Ankaŭ Mirej ne plu primemoras.

.../...

Sufiĉe "vigla" ventopuŝo (nur unu !) damaĝis nian regionon hieraŭ. Malpli grave, ne povis okazi la programita provo de neordinara "mondorekordo" : ellasi suprenflugi samtempe 360 "balonoj" ("montgolfieroj") arigitaj sur faktereno, 50km-ojn de ĉi-tie. (grupiĝis bolonoj el 45 landoj !). Mi supozas, ke la kvietigaj veterprognozoj ebligis siukceson ĉi-vespere aŭ morgaŭ .
Plej koramike de ni ambaŭ !

27/7/2013

Ni memoras, ke vi intencas aliri Grekion cele renkonti viajn familianojn... kaj tutcerte por iom feritempi !
Siaflanke, Mirej "kontentigis" la intervjuistinojn, kies demandaron vi sendis. Nu, ni bezonas poluri la rekston, kiun vi laŭnforme ŝovos en vian venontan bultenon. Ĝin ni sendos post via rehejmiĝo. Ni ja intencas venontsemajne uzi la domveturilon de Mirej ("heliketo" nomata, ĉar post 25 jaroj, ĝia rapidec-potenco malaltiĝis !) cele viziton de "centro" de Francio, kiun ni ne pefekte konas !
Kiel ĉiuj samideanoj de Albanio ni ĝojas pri la "eniro" de la lando en UEA-n !
Nu, ni komencas kutimiĝi je la albana temperaturo ! ? ! ? ! ...
Plej koramike, Pol kaj Mirej !

Bonan vesperon al vi ambaŭ !

La 4a bulteno "Aŭroro" de la UK de Rejkjaviko informas pri la eniro de Albana Esperanto-Asocio en la grandan UEA-familion ... Gratulon al ties prezidanto !

Verŝajne Bardhyl elvokis por vi nian eksterordinaran "aventuron" en via lando ! Memevidente ankaŭ multe valoras renkonton de samideanoj, kaj nian komunan, amikan "toston" ni ege aprezis !

Momente, ni certe kunportis ĉi-tien la temperaturon de Tirana ! ? ! ? ! ...

Plej amiksamcelane,

Pol kaj Mirej !

22/7/2013

Ĉar la OSIEK-sesio okazas nuntempe (unu semajno) mi petos informon poste pri via ne-ricevo de la "Gazeto".

Jen la skanitaj paĝoj de viaj enigmoj.

Hem, ni ne estas "aŭtentikaj" albanoj, ĉar ni "grumbas" pri la temperaturo ! ... :-) ... :-) ...

20/7/2013

Ĝus alvenis "La gazeto" 167 ... Mi humile konfesas, ke "vian" problemon de "komplika" testamento, mi rezignis ne solvi ! ... :-) ... :-) ... (feliĉe vi aldonis ŝlosilon ! Hi hi hi !). Mi tamen aŭdacus mencii, ke mi trapasis la abiturientan ekzamenon... kun temo "matematiko" ! Sed restas en mia nebula fak-memoraro nur la fama $ax^2 + bx + c = 0$! ! ! Mi ja tre rapide interesiĝis al lingvoj kaj literaturo !

La regiona gazeto (ĉiutaga) titolas grndliterature: "canicule en perspective" ... Malfacile malkovri la Eo-vorton, kiu ne ankoraŭ ekzistas ! Temas pri "plensomeraj, varmegaj tagoj", dum kiuj la temperaturo rapide ampleksiĝas ekster la normoj kun paralela sekeco. Mi pensas, ke via lingvo posedas specifan vorton, kvankam ŝajnas al "ni", ke la albanoj kutimas daŭre vivi laŭ "caniculaire" vetero ! ? ! ? ! ...

Plej amike, Pol kaj Mirej

19/7/2013

Jes Bardhyl, ni bonfartas : Ni ja efike trejniis "ĉe vi", kaj ni pli facile eltenas la ĉi-tiean temperaturon ! Oni

anoncas 36° venontsemajne (nord-oriente) kaj 38° sude !

Mirej vizitantas sian fraton en Dijon.

Por Bardhyl mi ja "aranĝis" paĝon A4 sur kiu kuŝas ok okulfotoj fotoj memore al nia komuna travivaĵo, kaj mi aldonis duan paĝon samformate kun ok fotoj... kiuj elvokas la "civitan" vivon de mia filino Diana, membro (socialista partio ! Hi hi hi !) de la urba komunumo... kaj plue de la departementa konsilantaro ! Artur estis "scivolema" pri tio !!! ... Espereble la granda koverto ne tro difektiĝis dum la poŝt-flugo !

Memkompreneble ni supozas, ke via edzino kaj vi daŭre ankaŭ bonfartas ... Nu, vi ja kutimas al via blua kaj varmega "ĉielo" ! Ĉu ne tro "akuta" por via patrino ?

PS - Morgaŭ, "malfermo" de la UK en Rejkjaviko. André kaj Masako Grossmann enpartoprenas.

Plej, plej amilksamcelane ! Pol kaj Mirej

13/7/2013

Ĉi-tio ne temas pri "ina" scivolemo sed pri "scienca" !... :-) ... ;-) ... :-! ... (Mirej daŭre protestas kontraŭ la ekzisto de tiuj du scivolemoj ; la "inan" inventis la viroj, ŝi pretendas ! Hi hi hi !).

Kia aŭ kiu estas la lasta libro de franca verkisto aŭ de aŭtoro uzanta la francan lingvon, originalo aŭ traduko en esperanto, kiun vi legis ? Paralela demando, kiom da samspecaj (proksimume), kuŝas -aŭ vertikalas !- sur la bretoj de via biblioteko ? Nu, eble pli oportunos riveli la kialon de nia info-peto ... Ni ja travivis dank' al vi eksterordinaran "aventuron", kaj ni nepre deziras rekompensi vian daŭran kaj pli ol amikan sindonemon dum tiu nekutima vagabondado ! Vi ja posedas duan lingvon -kiel ni !- kaj vi plezure uzas ĝin multfacete, interalie per legado. Ni daŭrigu kaj riĉigu vian plezuron !

Plej koramike, Pol kaj Mirej

12/7/2013

Legadon de la verkoj "*Les étrangers*" (franclingva) de *Yllyet Aliĉka* mi ĵus finis ...

Se ne eraras mia memoro, li petis tradukon esperantlingven ?... Fakte, temas pri traduko de traduko.Ĉu la rezulto strikte fidelus al la originalaĵo ?

Strange... Imagu, ke mi deziris peradon de "*google traduktilo*", kiu proponas la albanan inter aliaj lingvoj; dezirante scii la signifon (franclingve) de la albana titolo *Prëfenjë me ndërkombëtarë*, la traduktilo tute ne

kapablis plenumi mia peton ! Mi ricevis -ne ŝanĝitaj !- la unuan kaj trian vorton... *do*, denove albanlingve, kaj nur *me* tradukiĝis per *avec* (*kun* !) ... Kaj oni emfazas pri la "potenco" de tiuj tradukmaŝinoj !

.../...

Supozeble atingis vin "*La Informilo*" 162 !

Plej koramike, Pol

10/7/2013

"Malgranda" estas nia mondo ! Mi rememoras amikan kafo-trinkon en mia urbo. Tiam mi vizitigis al Tatjana la ... fajro-brigadon ! Sed aliaj renontiĝoj ankaŭ aliloke, kun la ĉarma filino Maja (interalie ĉe Azov-marĝo sub... albana temperaturo !).

Mirej komencis prizorgi la aluditajn respondojn al la intervjuo.

Ĝis !

29° antaŭ mia ekrano ! ... (dom-fasado en ombro !)

Vi vere troigas, aludante niajn "kvalitojn", en via lasta mesaĝo ! Siaflanke, Mirej laŭdas vin plurfacete,

asertante ke vi vere estas unika gastig-ĉiĉerono en Esperantio ! ... Konfeseme, ŝin mi plenplene aprobas !

Aldonite: artikolo ĵus aperinta en nia regiona tag-gazeto.

Plej koramike, Pol

9/7/2013

Dankon pro via lasta mesaĝo ! Ĉi-tie, ni sopiras al fulmo-tondroj (nu, nur la tondroj kun pluvo !!!) ...

Dum la semajnfino, ni festis naskiĝdatrevenon de amikino esperantistino de la urbo... 40 geĝratulantoj !
.../...

Pri via kompilaĵo: post komuna okulumo de ni ambaŭ, ĝi povus "*forflugi eksteren*" se... 1/ vi forigu la sekvencon (?) pri mia "kruro-incidento"... 2/ Vi uzu nur unu foton de ni ambaŭ (ŝajnas, ke vi ŝovis sep)... 3/ vi aludu la sindonemon de Artur (sed vi jam promesis tion) ...

Mi konstatis krome, ke la malica koboldo, kiu petolas fojfoje sur mia klavaro ankaŭ havas "kuzon" loĝanta sur la via ! paĝo 1 - Sro Edmond LUDWIG. paĝo 3 - *katedralo galerio* de la pentroarto. paĝo 6 - *marhaveno*. paĝo 7 - *tranokto*. paĝo 8 - *130 000 rifuĝintojn*

... / ...

Ankaŭ ĉi-semajnfine okazis la jara festivalo *Renaissances*, kiun mi jam aludis. Tiun nomon ĝi portas, ĉar Bar-le-Duc posedas okultrafan kvartalon el tiu histori-periodo.

Plej koramike , "Marmotino" kaj "kohaletto" !!!

8/7/2013

Jes, ni kunportis hejmen la albanan temperaturon... kaj ĉielon !

Pri via "kompilaĵo": ni ja bone notis, ke ĝi celas nur vian propran liston, do ne transiros la landlimojn ! Mirej petas, ke vi konservu nur unu foton de ni ambaŭ; do, vi elektos kaj ne uzos la aliajn; memevidente, valoras tiuj, kie ni aperas "individue", aŭ kun vi aŭ kun Artur ... Cetere, ni bedaŭras, ke vi ne aludis nian elstaran taksistiranton (kiu ankaŭ helpis sindoneme iamaniere dum la ekskursoj).

Plej dankeme kaj koramike ! Pol

5/7/2013

Bonan sunigatan matenon, Bardhyl !

Jen albana vetero, kiu iintencas instaliĝi !

Pri via peto, "*no problem*"! kiel ofte reagis nia kara Arthur ! Mirej memevidente pretas "kunlabori" !

Mi komencis surekrangi ŝian foto-provizon... kKonfidence dirite -tajpите !- mi bezonos "*le petit futé*"por lokigi la kaptajojn ! Via supraĵe aludita ideo pri eventuala ekspozicio meritas maturiĝi ! Selektio de -kvanto diskutenda- okulfrapaj fotoj, prezentutaj laŭ la formato 21x29,7, kun taŭga legendo en esperanto, kiun... vi (? !) tradukus albanlingven. Konkrete, la materialo ni preparus ĉi-tie kaj sendus al vi cele oportunan prezentadon en Tirana. Hem!... mi ne ankoraŭ sugestis tion al Mirej, hi hi hi ! ...

Momente, mi enpoŝtigantas la bulteojn 162, kiu atendis min hejme .

Koramike al vi ambaŭ de ni ambaŭ !

3/7/2013

Nu, ŝajne mi alportis pluvon hejmen ! Feliĉe, nur provizora "akvumadeto", ĉarpost du tagoj "ekos" la jara, urba "*Renasanca Festivalo*" kun multifacetaj spektakloj tra la tuta urbo.

Aldone, du bildoj, kiuj ne kuŝas en la fotaro de Mirej. Egan dankon pro la "viaj", kiuj bone atingis mian retskatolon !

.../...

Ĉar vi aludis la temon en unu el viaj lastaj mesaĝoj, mi supozas, ke mi povas informi lian moŝtan ambasadoron *Ylliet AliĈka*, ke mi estas je lia dispono cele eventualan tradukon. Li donis al mi sian ret-adreson.

Plej koramike ! Pol

2/7/2013

Miaflanke, mi retrovis mian veturilon ĉe Mirej kaj mi ĵus atingis BAR(le-DUC, post unu horon kaj duono ...

Temperaturo preskaŭ "tirana-a" , 26 ° !

Konfidence ni dormis ĝis la deka ĉi-matene... kaj ni preskaŭ atendis la viziton de nia kara Bardhyl por ekekskursumi !!!

.../ ...

Pli longa mesagho morgaŭ ! Salutu ankaŭ vian edzinon !

Plej, plej koramike ! Pol

15/6 2013

Memkompreneble ni pli ol aprezis vian longan mesaĝon, plenplena je informoj !...

Kondiĉe ke tio ne perturbu vian deĵoron ĉe via patrino, Mirej -kaj mi !- akceptus vin "larĝbrake" en la taksio de Artur !... Mirej ... " *Dis lui qŭon sera trè content de le retrouver !* " "Diru al li, ke ni estos tre kontentaj lin retrovi !" (la dua uzo de tiu verbo en franca lingo signifas "denove renkonti" ... "Retrouver", laĉefa senco estas uzata por traduki ... *malkovri perditan objekton ! ... :-)* ...).

Do vi mem elektu, priatente nian substrekitan kondiĉon !

Ni okulumis al la retejo de la hotelo (du "eniroy" ĉe *google* kun multaj fotoj ...); Mi simple tajpis *Albanie Tirana Hotel Freddy's*.

... / ...

Nun, ni daŭrigu nian "enbagaĝigon" ! ? !

Plej amike

15/6/2013

Ne, ne Bardhyl, priatentu denove la aldonitan horaron (kolore)! Temas ja pri **la 18** de junio ... do **mardon** ! ! ...

Fakte, ni havas du elektronikajn biletojn, unu por METZ / ROISSY (flughaveno apud Paris), kies dato estas ja lundon la 17an, (uzota en la rapid-trajno TGV, kiu atingos Roissy je la 19a03, ni do tranoktos de la 17a al la 18a en hotelo de Roissy) kaj la dua, kiu temas pri nia flugo al Tirana, mardon la 18an ! . Kopion de la elektronika bileto METZ /ROISSY mi ne sendis al vi ! Ĉu malica koboldo "petolis" en miaj antaŭaj mesaĝoj ? ! ? !

Bonvolu konfirmi ĉi-tiun alĝustigon ! Dankon !

14/6/2013

Ĉar la aktualaj strikoj ŝajne ne plu perturbas vojaĝintencojn, Mirej ĵus aĉetis flugbiletojn, kiuj ebligas atingi Tirana mardon dumtage (vespere). Ĉu vi jam povus rezervi en la hotelo *Freddy's*, de marde vespere ĝis vendrede matene (3 noktoj), ĉambron kun "larĝa" lito (eble disponeblas). Mirej pensas, ke ni povus ĝui 2 itinerojn "cirklaajn" dum nia turism-gastiĝo, unu al la "nordo", la dua al la "sudo" ... Tio evitus reveni al Tirana ĉiuvespere, kiel okazus se oni elektusplurajn itinerojn, "stel-simile"... Kompreneble, ĉio dependus ankaŭ de via punkta propra disponebleco por akompani ... aŭ helpi !

Nu, bonvolu kalkuli pri pluaj informoj, kiam la trajn-biletoj (TGV) estos aĉetitaj -hodiaŭ-, cele atingi Parizon lunde (kie ni tranoktos); tiam, ni havos horaron kompletan, ankaŭ por rehejmiĝi (trajno / flugoj...).

Denove koran dankon !

Ĝis tre baldaŭ ! Mirej kaj Pol

8/6/2013

Nu, bildoj de Tirana jam "salivigas" nin ! Mirej tre aprezas, tiom pli ke ŝi ŝatas "aerumitajn" urbojn ! Dankon pri tiu unua "reporteraĵo" !

... / ...

Ŝajnas, ke mi jam aludis nian "*koramikecon*". Fakte ni interkonatiĝis okaze de iu Eo-renkontiĝo antaŭ iom pli ol 20 jaroj ... Ŝi eĉ iĝis mia lernantino dum la evento ! Poste, mi aliĝis al ŝia sport-klubo, t.e. "*orientiĝ-kuradoj*" en Metz. (miaopinie tiaj kluboj devas ankaŭ ekzisti "ĉe vi" !)

Depost tio ni tre ofte renkontiĝis (... ĝas !) kaj pro la sama emo al malkovro de la "Naturo", ni multe vojaĝis (...as !) tra la mondo. Ni povos rakonti ...

... / ...

Ŝi havas tre konkretan demandon: ĉu necesas kunpreni specifan konektilon por kapti la elektran fluidon (ŝarĝo de poŝtelefono, fotilo, punkta uzo de "tableto" -mikro ordinateur-, razilo, ktp ...), aŭ ĉu temas pri "klasikaj" mur-konektingoj, t.e. kun 2 truoj ? .

Ni jam okulumas pli serioze al niaj "listoj" (kiuj indikas la necesan enhavon de la bagaĝoj, depende de la sezono aŭ de la klimato de la vizitota lando !).

Ĝis baldaŭ kaj plej amike, Pol kaj Mirej

6/6/2013

Kiel promesite, jen la atendita informo !

Nu, Mirej ĵus ricevis seriozan kuracadon sub formo de "bukedo" de (da ?) masaĝoj, al kiu aldoniĝis uzo de "sekaj kupoj", kaj iom da bone lokigitaj akupunktur-pikoj !... Ŝi fakte tre aprezis la "eventon" kaj preskaŭ "miris.." (memkompreneble, kiam oni antaŭnomiĝas "Mirej" ... :-) ...) konstatante, ke la prizorgado efikis !

Ni paciencu (sen hasto, kiel vi konsilis !...) atendu ĝis dimanĉe, prognozante, ke ĉio estos denove en ordo ! Optimismo estas plua kurac-rimedo ! ... ;-) ...

5/6/2013

Unue, koran dankon pro la ampleksa respondo al la demandoj petitaj de Mirej ! Ni vere estas pli ol kvietige informitaj !

Due, kiel vi skribis (tajpis !)... *tia estas la vivo !* Imagu ja, ke Mirej spertis subite dorsosuferon lastan dimanĉon, sen ke oni detektu la kialon de tiu "neatenditaĵo" Doloras al ŝi, kiam ŝi moviĝas (stariĝo el sieĝo) kaj

kliniĝas malsupren ! Morgaŭ ŝi vizitos plurfakan masaĝistaron, konata de ŝi, kaj memkompreneble ni informos vin pri la rezulto !...

Ni programis for- kaj revenflugon inter la 9a kaj 23a de junio. Evidentiĝas, ke ni devos rekonsideri la datojn, verŝajne unu semajnon poste.

Due, gratulon pro viaj interesoplenaj tekstoj, kiuj atestas, ke esperanto pli ol "ekflorumas" en Albanio.

Kiel rimarkigas Mirej, ni konstatas, ke vi ne nur "ŝatas verki" sed ankaŭ ke vi "emas" labori ĉiuzimuten por antaŭenigi nian aferon !!!

"La Informilo" 162 estas preskaŭ pres-preta ... Miaflanke ankaŭ mi dediĉis sufiĉe da (?) tempo por plenumi mian taskon de redaktoro !

Plej dankeme kaj amike al vi !

Pol kaj Mirej

24/5/2013

Fakte, kiam ni okulumas al la meteo-prognozoj "ĉe vi", ni sopiras al onta flugo por ĝui iom da suno !

Ni esperas, ke via kutima agad-programo kontentige disvolviĝas ... Ĉar vi ne aludis la san-staton de via patrino, ni supozas, ke ŝi tamen certagrade malkvietigas vin. Memevidente, ni tute ne volas, ke nia "semajno" iamaniere perturbu la familian etoson. Informu nin !

Mirej daŭre komparas la eblojn ofertitajn de la flug-firmaoj... Certe, vi mem, kiu uzis plurajn, povas konsili nin prie ! Laŭ la aktualaj malkovroj, ŝajnas ke pli oportunos flugi kun "haltoj" en la "najbaraj" landoj !

Koran dankon pro viaj trafaj proponoj !

Amiksamcelane, Pol kaj Mirej

12/5/2013

Supozeble "aŭtentika" printempo jam atingis la strandojn de Albanio !

Kiel vi imagas, ni jam pli "akute" pripensas nian venontan "aventuron" ! Mirej esploras la flug-eblecojn proponatajn kaj samtempe anticipe vagabondas tra via lando per la gvid-libro, kiun mi jam aludis (kolekto "*le petit futé*"). Miaflanke, mi aĉetis la ĵus aperintan poŝ-konversaci-libreton de la fama eldonejo "*Assimil*". Mi

humile konfesas, ke la fonetika aldonaĵo regule aldonita, ne certigas mian "ortodoksan" prononcadon ! :-) ... ;-)
) ...

Via lasta mesaĝo -gratulo pro la ortodoksa pasko- bone atingis nian ret-skatolon, mesaĝo, kiu jam enirigis nin en la fak-preĝejon de Tirana !

Memkompreneble la redaktoro dankas pro la gratulo, kiun vi verkis pri la bulteno 161 ! Bedaŭrinde ni konstas, ke multaj legantoj ne re-aboniĝis; ĉu "ni" suferas pro la invado de la reto ?

Ĝis kaj amiksamcelane !

Pol kaj Mirej

18/4/2013

Mirigis nin la "fulmeco" de via inform-respondo, kies enhavo ege helpas ellabori nian "programon". Pli ol merititan gratulon !

Jen ampleksa teksto, kiun la "*loĝistikino*" Mirej tuj studados ! ! ! ...

Plej amiksamcelane ! *Pol kaj Mireille*

15/4/2013

Ĉu koincido ?... Via ĵusa mesaĝo pri la vere bedaŭrinda evento, kies via frato iĝis viktimo -vi ne aludis lian sanstaton, espereble li ne grave vundiĝis- kvazaŭ postsekvas densan studadon de nia vizit-projekto !

Ni ja aĉetis ĵus eldonitan gvidlibron « *le petit futé* », en kiu kuŝas tre aktualaj konsiloj al vojaĝantoj. Interalie, oni atentigas pri la sinteno de multaj aŭto-stirantoj survoje, ĉu enurba, ĉu surkampara ! Respekto de la trafik-reguloj tre raras, estas eĉ petite ne uzi lu-veturilojn dumnokte !

Tial estus pli saĝe -tion vi trafe konsilis- uzi servojn de taksioj ... Supozeble tio ne necesus por viziti Tirana, oni povus versŝajne tutsole malkovri la urbon, sed peti servon de taksio por unu tago aŭ du, plurfoje, certe valorus por viziti la montaron de la nacia parko de *Theth* aŭ de *Butrint*, ankaŭ por frandi la lagojn de *Koman* aŭ *Prespa* ...

Memkompreneble ni tre aprezus kaj feliĉus, se vi povus alporti vian kunpartoprenon cele tiujn aluditajn vizitojn, aŭ alilokajn. Ĉar vi estus nia invitito, nenia problemo por pagi restoraciojn aŭ tranokton en hotelo, se tio igus nian « malkovron » pli komfortan... kaj malpli rapidan ! Tial, se vi taksus nian ideon fruktodona, ni estas scivolemaj pri via propra programo, kiun ni memevidente ne deziras perturbi, sekve vi informu pri la tagoj, dum kiuj vi estus disponebla por esti nia gast-vojaĝanto !

Alia ebleco : dungi (kontraŭ pago memkompreneble) iun konatulon de vi, kiu parolas esperantlingve aŭ franclingve ... Dum nia malkovro de Uzbekistano, nia amiksamideano *Anatoli Ionesov* -eble lin vi konas- aranĝis nian gastadon dum unu semajno en Samarkando kun vizitoj al Boukara kaj aliloke, uzante taksion kaj gvidiston, kiu mirige scipovis la francan. Ĉio tre bone disvolviĝis. Tiu solvo ne estis tro rigida ...

Vi informu, se ĝi estus ankaŭ taŭga por profiti fruktodone nian ĉeestadon en Albanio ! Ĉar ni tre ŝatas malkovri montarojn, ŝajnas al vi ke ni « devus » gastiĝi inter la 9a kaj la 23a de junio, periodo dum kiu pli agrablus la temperaturo kaj rara (?) pluvado !

Laŭ viaj informoj pri la supraj proponoj, ni povus jam rezervi niajn biletojn por la flugo.

Plej amike, Pol kaj Mirej

29/3/2013

Hem, Bardhyl, vi troigas ! Pripensu, ke mi "dinosaurĝas" ! Juneco situigis for de la kalendaro ! Hi hi hi ! ...

Ĉu oportunas resciigi al vi, ke Mirej... -multe pli juna ol mi- estas mia "koramikino" ...

Aldone: bildo de "*Lary Danto*" (iama klaŭno... "*la ridanto*") ... Memkompreneble mi ne plu "surpodumiĝas" !

27/12/2012

Dankon pro viaj du lastaj mesaĝoj, kiuj senprobleme atingis min ! Sed mi konfuzas tiom malfrue konfirmi ! Ellaborado de nia bulteno 160 (!) postulis ja iom pli da laboro al mi antaŭsupozis ! Nu, "La Informilo" lokiĝas finfine en la presejo.. Vi ja ricevos ĝin ĉirkaŭ la 10an de ... januaro 2013 !

Niavice (Mirej kaj mi) reciprokas la bondezirojn ! Ne forgesu, ke ni bone notis siatempe nian intencon "vagabondi" tra via lando ! Espereble efektiviĝos nian deziro dum la proksima jaro !

... / ...

Por iom kompensi nian "ne-akuratecon", mi aldonas muzikan diaporamon, kiu konsentos eniri vian komputilon kaj "malfermiĝi" !

Plej amiksamcelane, Pol kaj Mireille, alinome *koaleta* kaj *marmotino* !

Fotoj de Mirej



Tirana, parko



Tirana, historia muzeo



Tirana la strato "George W.Bush"



Tirana, bulvardo




Tirana, mia hejmo



Tirana, en la motelo



Tirana, la urbodomo




Kosovo, apud Prishtina



Kosovo, autovojo



Kosovo, Gjakova



Kosovo, Lipjan- Prishtina Tirana, ortodoksa preghejo



Tirana, historia muzeo



Albanaj Alpoj, Valbona



Durrës, plagho



Tirana, monto "Dajti"



Albanaj Alpoj, Valbona



Pogradec, kun Gjergji Gusho



Berat, restoracio "Eiffel"




Shkodër, Shirokë



Durrës, kafejo



Korça, bazaro



Kosovo, groto




Saranda, amfiteatro



Shkoder, piedirantejo



Albanaj Alpoj, Valbona



Albanaj vojoj, Pol

Kompilis: Bardhyl Selimi

Anoncoj

Konkurso de infan-desegnaĵoj

Ni invitas ĉiujn instruistojn, ĉiujn gepatrojn, kiuj deziras partoprenigi siajn gelernantojn aŭ infanojn al tiu konkurso .

Reguloj

*Jara temo: **Marŝado kontraŭ malegalecoj kaj rasismo***

*Formato : **Centimetraj dimensioj , minimume 30 x30***

*Limdato **la 1an de Marto 2014***

Dorse de la desegnaĵo notu, **esperantlingve**, nomon, aĝon de la infano, adreson de la lernejo aŭ de la E-klubo, **kaj sur la desegnaĵo skribu mesaĝon pri la temo por la tuta mondo !**

La tutaj desegnaĵoj ebligos ekspoziciojn en diversaj lokoj de nia urbo ! Ni sendos fotojn al vi pri tiuj ekspozicioj.

Ni antaŭdankas ĉiujn partoprenantojn ! Bonvolu sendi desegnaĵojn al :

Centre Culturel St Nazaire Esperanto

38, rue de la Croix Fraîche

44600 SAINT NAZAIRE

FRANCE

Brazilano estas la nova redaktoro de UEA-organo



Plia redaktejo de Universala Esperanto-Asocio (UEA) transloĝiĝas al Brazilo. Ĉi-foje temas pri la revuo Esperanto, kies redaktan laboron transprenos la enlandano Fabrício Valle komence de januaro. La oficiala nomumo aperis en la Gazetara Komunikado de UEA (N-ro 519), kiun ni reproduktas sube. Ni gratulas la novan redaktoron kaj deziras novigan kaj fruktodonan laboron!

NOVA REDAKTORO POR LA REVUO "ESPERANTO"

Unuafoje en pli ol cent jaroj, la revuo *Esperanto* havos sian redaktejon ekster Eŭropo. La brazilano Fabrício Valle estas elektita de la Estraro de UEA por transpreni la redaktoran postenon de Stano Marček, ekde la jarkolekto 2014.

Jam en sia skriba sinprezento, Fabrício Valle montris grandan energion kaj kreemon, kaj krome tre realisman ideon pri la redaktora laboro, komentas la Prezidanto de UEA, d-ro Mark Fettes. Tiun impreson plene konfirmis mia telefona intervjuo kun li. Ni estas entuziasmaj pri la ideoj kaj kapabloj, kiujn li alportos al nia komuna afero.

Valle estis unu el ses kandidatoj por la posteno de redaktoro (unu pli ol anoncite en pli frua komunikado). Movadano ekde 1970, li okupis diversajn postenojn en la brazila movado, interalie kiel prezidanto aŭ estrarano de Brazila Esperantista Junulara Organizo (1977-81), oficisto de Brazila Esperanto-Ligo (1996-2001) kaj prezidanto de la Federacia Konsilantaro de BEL (2001-04). Li ankaŭ fondis kaj gvidis propran eldon-entreprenon, Zamenhof Editores, de



1987 ĝis 1995. Lastatempe li okupiĝis pri provoj kreskigi la esperantistan ekonomion kadre de la organizo Intraespo.

La redaktoraĵoj de Valle estas videblaj en la ok numeroj de *Brazila Esperantisto*, kiujn li redaktis en la jaroj 2001-02. Enkondukante novan aspekton kaj novan teamon de kunlaborantoj, li kreis revuon kiu elstaris grafike, stile kaj enhave. Ankaŭ por la revuo *Esperanto* Valle antaŭvidas proksiman kunlaboron kun talentuloj sur diversaj kampoj, cele al revuo kiu *transformiĝos en*

aktivan engaĝilon, en instrugazeton por trejnado de volontuloj, en heroldon de la plej bonaj iniciatoj de la! movadaj organizoj tra la mondo, en gvidilon por veteranaj kaj komencantaj E-gvidantoj, en inspiron por la esperantoj.

Nova direktoro por la Kolekto por Planlingvoj kaj la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko

La direktoro de la Literatura Arkivo de la Aŭstria Nacia Biblioteko, privata docento doktoro Bernhard Fetz, transprenis je la 1-a de aŭgusto 2013 ankaŭ la direktorecon de la Kolekto por Planlingvoj kaj de la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko. En tiu funkcio li sekvas kortegan konsiliston magistron Herbert Mayer, kiu fine de julio 2013 emeritiĝis. Inter la plej gravaj evoluoj dum la oficperiodo de direktoro Mayer, ekde 1988, estas la translokiĝo de la kolekto kaj de la muzeo en la Palais Mollard, la novkonceptado de la Esperantomuzeo kaj la komenco de la ampleksaj ciferecigoj de la biblioteka kaj muzea havaĵoj.

La komuna gvidado de la Literatura Arkivo kaj de la Kolekto por Planlingvoj, kiu restos ankaŭ estontece memstara je la kutima loko en la Palais Mollard, ebligas valorajn kaj riĉigajn sinergiojn en enhava kaj arkiva rilatoj: Ambaŭ kolektoj dokumentas la 20-an jarcenton, precipe la intermilitan periodon, kaj diversajn aspektojn de lingvofilozofio. Ankaŭ rilate la praktikan arkivlaboron rezultigas multnombraj punktoj de kontakto pro la similaj objektotipoj en modernaj postlasaĵoj.

Krome magistro Bernhard Tuidier, fakulo sur la kampo de esperantologio kaj longjara kunlaboranto, estis nomumita teamestro. Li gvidas la laborojn en la interlingvistika fakbiblioteko kaj deĵoras kiel unua kompetenta fakulo por interesatoj kaj fak Kolegoj.

La Kolekto por Planlingvoj kaj precipe la Esperantomuzeo estos ankaŭ estontece vivanta loko de renkontoj por ĉiuj, kiuj interesiĝas por niaj havaĵoj, muzeaj gvidadoj kaj kursoj.

Por demandoj:

Mag. Bernhard Tuidier, bernhard.tuidier@onb.ac.at, T +43 1 53410-731

Palais Mollard, Herrengasse 9, 1010 Wien

<http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen.htm>

<http://www.onb.ac.at/esperantomuseum.htm>

Aktivecoj en Herzberg

Ni klopodas regule organizadi studsesiojn (la 61 estos 13-15 decembro), fakseminariojn en Herzberg, ĉar ni spertas kaj samopinias kun Germain, ke

"... ghis nun, Esperanto restas ĉefe "kluba amuzilo" kaj apenaŭ "faka laborilo"?

Lingvo estigas intereson, kiam ghi vere utilas fake, profesie, ĉu ne?"

Ni volonte invitas ankaŭ vin prelegi, oferti, prezenti fakajn temojn. La planataj klerigesiaj datoj en 2014 estas jam de somero en nia jarkalendaro

<http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=91295910> sube.

Korajn salutojn,

Zsofia

Nova retkurso ĉe Jagelona universitato

Por personoj, kiuj ne povas partopreni lernadon dum labortagoj, la Jagelona Universitato organizas kurson, kiu okazados dum sabatoj - en Interreto, kun instruistino.

Temas pri nova grupo kun la sama programo kiel tiu de la antaŭe anoncita kurso 'SKRIBADO KAJ PAROLADO', por personoj konantaj E-on je meza kaj supera nivelo (B2-C2). Validas la samaj informoj pri la kurso mem:

<https://docs.google.com/document/d/11tZd-r470uOjg1I5lwmkf9rkCwD-Ys5Tu7s8WctPTwQ/preview>

Tie oni trovas ankaŭ informojn pri kiel aliĝi.

Dezirata dato de komenco de la kurso: 9 novembro 2013.

Eblas aliĝi ankaŭ post tiu dato, laŭ disponeblaj lokoj.

La anoncita dum la antaŭaj monatoj dum-semajna E-kurso okazas sukcese kaj bonetose.

Kore invitas lernemajn kaj societemajn personojn

Maria Majerczak

instruistino

